

Mark Fettes

# Ne estas fido nur

## Elektitaj artikoloj kaj paroladoj el la jaroj 2010–2019

Kun aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio

Eldonejo «Impeto»

УДК 811.922
ББК 81.8 Эсп
Ф45

*Mark Fettes*

# Ne estas fido nur

Provlegis *José Antonio Vergara*
Respondecaj redaktoroj *Dmitrij Ŝevĉenko,*
*Anna Striganova*

**Марк Феттес**
Ф45 Ne estas fido nur / Марк Феттес. Не только доверие. На языке эсперанто — М.: Импэто, 2020. — 190 с.
ISBN 978-5-7161-0309-2

Mark Fettes (n. 1961 en Usono) estas longtempa aktivulo en la Esperanto-movado, precipe en UEA, kie li rolis i.a. kiel redaktoro de la revuo *Esperanto* (1986–1992), estrarano (1992–1998) kaj Prezidanto (2013–2019). De post 2002 li estas profesoro pri edukado en la universitato Simon Fraser, Vankuvero, Kanado, kie liaj esploroj rilatas al la aktivigo de la fantazio kaj kreemo de infanoj kaj instruistoj, la interproksimiĝo de lernejoj kaj la loka naturo, kaj la valorigo de indiĝenaj kulturoj kaj lingvoj.

УДК 811.922
ББК 81.8Эсп

ISBN 978-5-7161-0309-2

© Mark Fettes, 2020
© Eldonejo «Impeto», 2020

# Dediĉo

Al miaj prezidintaj antaŭuloj
kaj precipe al Humphrey Tonkin
kies klero, kuraĝo kaj kapablo
estas neelĉerpebla fonto de inspiro

*Ne estas fido nur. Subtenas faktoj.*
*Lingvo estas socia fenomeno,*
*kreaĵo de sociaj intertraktoj*
*kaj ĝin modifas la ŝanĝiĝa sceno.*

*L'epoko ne maturas. Sed bezonon*
*jam sentas kelkaj, kaj bezono trovas*
*sian rimedon, la precizan konon*
*alprenas. Kiu volas, tiu povas.*

*Kaj dum ekzistos la bezon', ekzistos*
*la esprimilo ("ne por la futuro" —*
*ne, tamen eble ankaŭ mi asistos).*
*Ĝi estas revo pela. Kaj aŭguro.*

*Li sciis, kompreneble: "post centjaroj" —*
*ars longa... ho, sed vita estas brevis;*
*ĝi daŭras tikon de la okulharoj*
*kaj ĝi ekzistas nur se oni revis.*

*La revo estas ĉio. Kaj kuraĝo:*
*ĉar revas nur la kuraĝul' unika.*
*Perdiĝas mil kaj mil pro la ĉantaĝo*
*de l' ĉiutaga, mora, hermetika.*

*Li sciis, kompreneble. Kaj li fidis.*
*Kaj per la fido fakte movis monton.*
*Miraklo? Ne. Faktoroj koincidis*
*kaj frua nuno naskis la estonton. ...*

***— William Auld,***
***La infana raso, XVIII***

# Enhavo

**Enkonduko**......................................................................6

**Parto 1: Strategio**..................................................................9
Esperanto kaj la monda eduka problemo (2010)..................11
Strategia vizio por UEA (2012)...........................................21
Daŭripovo kaj ni; La daŭripova vojo (1) kaj (2) (2014)......45

**Parto 2: Ses jaroj prezidaj**.........................................................55
Por fariĝi amasmovado (Novjaro 2014)..............................58
Ni ne estas solaj (Bonaero 2014).........................................61
Turopintoj kaj turnopunktoj (Novjaro 2015).......................65
La valoroj de Zamenhof estas ankaŭ niaj (Lillio 2015).......68
Labori por paco en malpaca mondo (Novjaro 2016)...........75
Por socia justeco kaj lingva justeco (Nitro 2016)................78
En la Zamenhof-Jaro, ni semu kuraĝon kaj
esperon (Novjaro 2017).......................................................84
Movado de bonaj gastoj (Seulo 2017)..................................87
Kultivi movadon indan je fiero (Novjaro 2018)..................93
Partopreni en nia memkuira kulturo (Lisbono 2018)............96
La bezono senti nin kune (Novjaro 2019)...........................103
Lingvo de tera hejmeco (Lahtio 2019)...............................105

**Parto 3: Ne nur lingvo**.............................................................113
Ne nur lingvo! Kiel Zamenhof kreis popolon (2017)........116
Esenco kaj estonteco: La signifoj de Esperanto
kaj UEA por la nuntempa mondo (2019).........................122
Kosmopolitismo en praktiko: Streboj kaj streĉoj
en la Esperanta socibildo (2016).....................................132

**Parto 4: Edukaj defioj**..............................................................147
Lernejo kaj naturo: Novaj ebloj en epoko
de ekologia krizo (2012) ................................................150
Edukado al repaciĝo: Kanadaj lernejoj alfronte
al la indiĝena realo (2016)...............................................165
Indiĝenaj lingvoj kaj la streboj al daŭripovo (2019)..........177

# Enkonduko

Tre frue en mia esperantisteco, mi enamiĝis al la esprimaj kapabloj de Esperanto. Mi ankoraŭ memoras la ravan ŝokon, kiam mi unuafoje malfermis *La infana raso* de Auld, iam en la aŭtuno de 1984 post la Universala Kongreso en Vankuvero. La poemo skuis min, vekante similajn sentojn kiel la memportretoj de Rembrandt aŭ la simfonioj de Dvorak. Mi ekkomprenis, ke jam komenciĝis vivovojaĝo trans nesondeblajn profundojn.

En la postaj jaroj mi konatiĝis kun la movado en monda skalo, kiel la redaktoro de la revuo *Esperanto* de oktobro 1986 ĝis la komenco de 1992, kaj poste kiel estrarano de UEA inter la kongresoj de Vieno (1992) kaj Adelajdo (1998). Vole-nevole, en tiuj jaroj mi devis multe okupiĝi pri verkado, sed ĉefe la verkoj de aliaj. La Manifesto de Prago (1996) staras kiel iuspeca resumo de miaj ideoj el tiu periodo, kvankam oni povas trovi kelkajn eseojn diverstemajn en la kolektoj el la Belartaj Konkursoj kaj aliaj libroj.

Kiam mi revenis al agado en UEA ekde 2010, fariĝante ĝia Prezidanto en 2013, mi apenaŭ antaŭvidis, kian grandan parton de mia laboro konsistigos verkado. Parte temis pri tiaj verkotaskoj, kiujn oni imagus ligitaj al la gvidado de kompleksa, multflanka organizaĵo: la kreo de strategia plano, la kompilado de jarraportoj, la reviziado de la Statuto kaj la regularoj. Apud ili, amaseto de aliaj verkoj celis tre specifan okazon aŭ publikon: salutmesaĝoj al landaj, fakaj kaj regionaj kongresoj; antaŭparoloj al novaj eroj en la Serio Oriento-Okcidento; gazetaraj komunikoj pri tiu aŭ alia temo. Mi investis relative multe da tempo en tiaj taskoj, sed ĉiam kun la konscio, ke la rezultaj tekstoj havas efemeran signifon, aŭ signifon nur en difinita organiza kunteksto. Eble pri ili iam interesiĝos iu posta historiisto aŭ esperantologo, sed por ni nuntempuloj, ilin rapide forportas la rivero de forgeso.

Iom post iom, tamen, mi venis al la konstato, ke kelkaj tekstoj povus havi pli daŭran valoron. Kiel Prezidanto de UEA, mi estis kvazaŭ taskita rigardi la movadon inkluzive, provante kompreni ĝiajn fortojn kaj malfortojn, ĝian ligitecon al la nuntempaj mondaj evoluoj, ĝiajn eblajn evoluvojojn. Ideojn pri tiuj temoj mi disvolvis en miaj novjaraj mesaĝoj, en la kongresaj festparoladoj, kaj en kelkaj aliaj porokazaj paroladoj kaj artikoloj. Ne temas pri vere sistemeca analizo de la aktuala situacio de Esperanto; aliflanke, tia plurflanka prilumado povus doni interesan bildon pri kelkaj aspektoj de la movado kaj komunumo en la dua jardeko de la 21-a jarcento. Kompreneble, malantaŭ tiu bildo ja troviĝas mia persona filozofio, tiel ke pluraj pensfadenoj trakuras la diversajn tekstojn kaj donas al la tuto iom da kohero.

Mi decidis aldone inkluzivi aktualigitajn versiojn de tri IKU-prelegoj, kiujn mi faris en la sama periodo. Tiuj tekstoj estas kompreneble ligitaj al mia profesia vivo kiel universitata profesoro pri edukado, kaj ne fokusiĝas rekte al Esperanto mem. Tamen, mia vivovojo post tiuj fruaj jaroj en Roterdamo estis profunde influita de mia esperantisteco. Atentaj legantoj rimarkos diversajn ideajn ligojn inter tiuj fakaj okupiĝoj pri lernejoj kaj naturo, lernejoj kaj indiĝenaj popoloj, indiĝenaj lingvoj kaj daŭripovo, kaj miaj pensoj pri la signifo de Esperanto en la nuntempa mondo.

Mi krome inkluzivas unu dokumenton, kiu naskiĝis el kolektiva kunpensado en la Komisiono pri Strategiaj Demandoj, kiun mi gvidis en la jaroj antaŭ mia prezidantiĝo. Ĝi estas iom malpli "mia," ol aliaj tekstoj en ĉi tiu libro, sed ĝi helpos legantojn orientiĝi pri la organiza kunteksto, kiu kuŝas fone de ĉi tiuj naŭ jaroj da verkado.

Iom mi devus diri pri la titolo. Siatempe, Ivo Lapenna nomis iom similan kolekton simple *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj*, tiel alproprigante al si la plej simplan kaj trafan solvon. Mi tamen ŝatas aludojn, kaj kiel dirite, mi sentas grandan ŝuldon al Auld, kies verkaron mi daŭre trovas inspira kaj animriĉiga. La 18-a ĉapitro

de *La infana raso* traktas Esperanton kaj Zamenhof senteme kaj rezone (konforme al la pensostilo de la tuta verko), kaj tio estis ankaŭ mia celo, precipe en la paroladoj, kiuj devas tuŝi ne nur la cerbojn sed ankaŭ la korojn.

En la poemo, "ne estas fido nur" malfermas argumenton pri la historia neceso de Esperanto. Mi ne nepre kuniras la tutan vojon kun tiu pensofluo, sed mi plene samopinias, ke Esperanto estas socia kaj kultura realaĵo, pri kiu oni ne havas elekton, ĉu kredi aŭ ne kredi. Same mi vidas UEA kiel organizan realaĵon, kun realaj fortoj kaj malfortoj, realaj ebloj kaj limigoj. Kiel mi argumentis antaŭ multaj jaroj en eseo por la Belartaj Konkursoj, la ideoj kaj idealoj de la komunumo estas parto de ĝia realo, kaj do la gvidantoj de UEA devas ĉiam lukti kun la fakto, ke oni ligas al ĝi, kiel al Esperanto mem, (tro) grandiozajn atendojn. Por mi la titolo volas diri ankaŭ, ke ni ne antaŭeniras *per fido nur*. Necesas ankaŭ la sobra, pacienca, kaj obstina laboro, al kiu Zamenhof (kaj Hodler) vokis nin, kaj en kiu oni devas, certagrade, rezigni pri siaj iluzioj por plukonstrui ion firman kaj daŭran.

Ĉu mi sukcesis kiel Prezidanto elpalpi la ĝustan ekvilibron inter fido kaj faktoj? Nu, pri tio, kara leganto, juĝos la historio; sed per ĉi tiu libro, vi povos mem veni al propra konkludo, almenaŭ se temas pri la tekstoj, kiujn mi taksis indaj por enmeto. Bonan legadon kaj kunpensadon!

***Mark Fettes***
***Vankuvero, aŭgusto 2019***

# Parto 1

# Strategio

# Enkonduke al Parto 1

Ĉi tie aperas tri tekstoj diverskarakteraj: parolado, raporto, kaj artikolserio. Komuna inter ili estas la demando, kia celaro aŭ filozofio povus doni koherecon kaj evoludirekton al UEA, kiel la plej inkluziva kaj reprezenta organizo de la tutmonda esperantistaro? La respondoj en ĉi tiu teksto estas iom malsamaj, sed ili ankaŭ apogas kaj kompletigas unu la alian.

La unua teksto datiĝas de 2010, kiam mi komencis pripensi revenon al aktiva rolo en UEA. Pasis dek jaroj de kiam mi finis mian doktoriĝan disertacion pri la lingva ekologio de modernaj eduksistemoj, kaj mi sentis bezonon klarigi miajn pensojn pri la rilato inter mia profesia laborkampo kaj mia engaĝiĝo pri Esperanto. Tie oni trovas ankaŭ mian zorgon pri ekologiaj demandoj, resumeblan sub la etikedo "daŭripovo." Kun la paso de la tempo, tiu zorgo fariĝis pli kaj pli grava en mia pensado.

La dua teksto venas el 2012. Ĝi estis la unua raporto de la Komisiono pri Strategiaj Demandoj, por kiu mi varbis dekon da diversperspektivaj aktivuloj kiuj dividis mian konvinkon, ke necesas iom funde repripensi kelkajn aspektojn de nia monda organizo. En la posta jaro, ni ellaboris pli ol 30-paĝan Strategian Laborplanon, kiu estis plurrilate utila por mia posta laboro en la Estraro, sed kiu finfine estis tro longa kaj ĉioampleksa por bone funkcii kiel strategia gvidilo. Tiu ĉi "strategia vizio" havas por mi pli daŭran valoron, i.a. pro ĝia konciza superrigardo de la ampleksa agadaro de UEA.

La tria tekst(ar)o aperis felietone en la revuo *Esperanto* en la komencaj monatoj de 2014, mia unua jaro kiel Prezidanto. Tie oni vidas jam iom da repripensado pri la emfazo pri lingva justeco, el la Strategia Vizio kaj la Strategia Laborplano, favore al la enfokusigo de daŭripovo kiel pli inkluziva kaj oportuna gvid-koncepto. Ankoraŭ nun, pli ol kvin jarojn poste, la ideoj prezentitaj en tiu modesta artikolaro ŝajnas al mi aktualaj kaj sekvindaj.

*Prelego en la Malferma Tago de UEA, la 17an de aprilo 2010*

# Esperanto kaj la monda eduka problemo

## Por kio ni havas Esperanton?

Tiu demando, konata al ĉiuj esperantistoj, kuŝas kerne en la debatoj pri strategio, identeco, idearo kaj tiel plu, de la komenco de la lingvo ĝis hodiaŭ.

Ni konas, aŭ devus koni, la respondon de Zamenhof, kiu estis proksimume "Por ke ĉiuj homoj povu interkompreniĝi pli bone kun siaj kunhomoj". Ĉe li la emfazo ĉiam kuŝis ĉe tiu interkompreno: li ne volis krei nur lingvon kiu peras iujn ajn ideojn, sed lingvon kiu povas porti kulturon pacaman kaj egalecan.

Ni ankaŭ scias, ke tiu idealismo estis troa por la okcidenteŭropaj intelektuloj, kiuj ekgvidis la movadon en la fruaj jaroj de la 20a jarcento. Konvinki homojn lerni neŭtralan lingvon estis jam sufiĉe malfacile; konvinki ilin ankaŭ esti pli bonaj homoj ŝajnis afero tute ne praktika. Do, ili preferis formuli sian respondon laŭ pure raciisma spirito: "Por efike komuniki trans ŝtatajn limojn, tutmonde, konforme al la kreskanta interligiteco kaj teknika progreso de la homaro". De tiu epoko venas la propagandaj komparoj inter Esperanto kaj la fervojo, la telefono, kaj simile – rimedoj supozeble neligitaj al iu ajn difinita kredo aŭ principaro.

Duonan jarcenton poste, Ivo Lapenna ellaboris sian propran varianton de tiu formulo: Esperanto ekzistas "por solvi la mondan lingvo-problemon". Por li la ekzisto de tiu problemo estis objektiva fakto, kiun la ŝtatoj kaj la sciencistoj obstine prisilentas. Denove Esperanto aperas kiel praktika rimedo, sed ĉi-foje kun aldona, abstrakta historia signifo. Lapenna klarigis tiun signifon

per la konata triŝtupa lingvomodelo: loka lingvo aŭ dialekto por lokaj bezonoj, nacia lingvo por naciaj bezonoj, kaj internacia lingvo por la internaciaj.

Ni povas vidi en tio ian kreskantan emfazon pri la pure lingva dimensio de Esperanto. Ĉe Zamenhof, la lingvo gravis ĉefe pro la kulturo kaj ideoj, kiujn ĝi portis. Por la antaŭmilitaj gvidantoj, plej emfazindis ĝia praktika uzado. Por Lapenna, estis evidente, ke UEA devas okupiĝi nur pri lingvaj problemoj, kaj ke gravas ĝuste plivastigi la fakajn sciojn kaj informojn sur tiu kampo. Ankoraŭ hodiaŭ, oni vidas ĉiujn tri tendencojn en la movado – la idealisma, la praktika, kaj la politika, se iom sennuance etikedi ilin.

Ne estas mia celo ĉi tie kritiki ĉi tiujn tendencojn, aŭ analizi iliajn sekvojn por nia strategio. Anstataŭe, mi turnos mian atenton al kvara vidpunkto, kvara respondo al tiu baza demando, por kio ni havas Esperanton. Sed por kompreni tiun respondon, necesas unue klarigi la rilaton inter lingvo kaj edukado.

## Du interligitaj konceptoj

"Edukado" kaj "lingvoj" delonge konceptiĝas dise. En mia universitato, kiel en pli-malpli ĉiuj aliaj, oni havas fakon pri edukado kaj fakon pri lingvoscienco, kaj kvankam kelkaj edukistoj kaj kelkaj lingvistoj dividas komunajn interesojn, temas pri specialaĵoj ene de du malsamaj studkampoj.

Tamen tiu moderna disdivido estas kultura atingo, la sekvo de difinitaj strategioj por organizi sociojn. Se ni bildigas al ni la originan socian vivon de la homoj, ni facile vidas ke "edukado" kaj "lingvado" estas intime interligitaj, fakte facetoj de unusola kultura sistemo kiu certigas la kontinuecon de diversaj scioj kaj praktikoj de generacio al generacio. Temas simple pri la integrado de novaj socianoj, ekde la beba aĝo, en kompleksan homan ekologion kiu konkretiĝas pere de reto de daŭrontaj personaj ri-

latoj kaj komunaj praktikoj. Tio kion ni nomas "edukado" kaj "lingvoj" aŭ "lingvado" estas simple du perspektivoj, du lensoj, por kompreni kiel tio okazas.

Ni evidente estas longe for de tiu situacio. Nun tiu "homa ekologio," al kiu ni devas adaptiĝi, ampleksas la tutan terglobon, kaj ni antaŭvidas kun relativa certeco, ke ni pasigos grandan parton de nia vivo kunvivante kaj kunlaborante kun homoj, kiujn ni ne bone konas. Sur la lingva kampo, ni trovas nin en mondo, en kiu la lingvaj dividoj fundamentas la socian organizon je registara nivelo – t.e. la nivelo de la povo, precipe la povo super rimedoj homaj, financaj, kaj komunikaj. Kaj sur la eduka kampo, la vasta kresko de scio, teknikoj, fakoj signifas, ke neniu povas mastri pli ol etan onon de la sumaj homaj kapabloj. Do la iama unueco diseriĝis, kaj ĉiu el ni alfrontas profundan necertecon sur la vojo de naskiĝo ĝis plena socia integriĝo.

Do, tiu necerteco parte estas lingva. Tion brile antaŭvidis Zamenhof, antaŭ pli ol 120 jaroj, proponante rimedon per kiu oni povus reakiri apartenon al unueca komunumo, eĉ mondskale. Sed ĝi estas ankaŭ *eduka* necerteco, kaj mi kredas, ke Zamenhof – kaj ni ĉiuj, kiuj sekvis lin – subtaksis ĝian gravecon, kaj ĝian interplektitecon kun la lingva problemaro.

La radikoj de la problemo reiras longe en la tempo, sed ni povas koncentri nian atenton al la lastaj ducent jaroj. La grandaj ŝtataj eduksistemoj, kiuj ekestis en la 19a jarcento kaj disvastiĝis tutmonde en la 20a, celis krei bazon por nova certeco en mondo, kie pli kaj pli da homoj vivis kaj laboris for de siaj nasklokoj. De unu perspektivo, tiu procezo frape similas koloniigadon (kaj evidente grave rolis en la vera koloniigado) – t.e. pli kaj pli da homoj alkutimiĝas al la ideo, ke bezonataj scioj kreiĝas aliloke kaj devas esti transdonataj de profesiuloj, en lokoj kaj tempoj difinitaj de ili. Estas evidente, ke tia kultura formiĝo ideale pretigas homojn por laboro en grandaj industrioj kaj kompanioj, kaj por vivado en grandaj urboj kaj kulturoj kie oni pli kaj pli ofte turnas sin al la profesiaj kaj ŝtataj servoj por ĉiuj bezonoj.

Homoj estas adaptiĝemaj bestoj, kaj oni akceptis kaj eĉ entuziasme subtenis la novajn sistemojn tiel longe, kiel la promesoj de certeco, prospero kaj sekuro restis kredindaj. Sed en la sesdekaj jaroj, iom radikalaj duboj ekdisvastiĝis. Ĉu vere la specialistoj scias, pri kio ili parolas? Ĉu vere la ŝtataj servoj fidinde anstataŭas familiojn kaj komunumojn? Ĉu vere la hierarkioj de scio kaj povo, kiuj fundamentas la modernan socian ordon, estas morale aŭ etike pravigeblaj? Ĉu ĉio ĉi fakte subpremas la individuan liberon, pri kiu oni parolas jam de la epoko de la Kleriĝo?

Vi eble konas la historion de la postmilita agrikultura revolucio, kiam novaj maŝinoj, novaj kremiaj nutraĵoj, kaj novaj insekticidoj ebligis eksplodan kreskon de la grenrikolto tutmonde. Vi eble ankaŭ scias, kiel la limoj de tiu kresko poste evidentiĝis, ĉar fakte la nova sistemo bezonas konstantan eksteran investadon de energio kaj materialoj. Do, la ŝajna progreso, tre konvinka se oni rigardas deproksime, en pli vasta ekologia perspektivo ŝajnas malprogreso, ĉar la daŭripovo de la tuta sistemo efektive malkreskas. Se subite ne plu haveblos malmultekosta benzino, ekzemple, tiam abrupte ŝrumpos la rikoltoj kaj sekvos amasa malsatado. Ĝis nun, tamen, kreskanta konscio pri tio ne sufiĉas por fundamente ŝanĝi la sistemon.

Al mi ŝajnas pli kaj pli klare, ke nia eduksistemo ankaŭ funkcias kun daŭra ekologia deficito, se tiel diri. Ni rigardu kelkajn facetojn. Kvankam la scienco iĝis kerna evoluiga forto en nia civilizacio, malmultaj homoj havas bonan komprenon de ĝiaj bazaj principoj kaj funkciado. Kvankam la demokratio iĝis baza organiza principo de niaj ŝtatoj, malmultaj homoj aktive engaĝiĝas por ĝia vivtenado. Kvankam laŭ ĉiuj signoj ni proksimiĝas al la limoj de la vartokapablo de la tero, malmultaj homoj ŝanĝis sian vivmanieron por malpligrandigi la ŝarĝon, kiun ili trudas al la naturo. Kaj kvankam la novaj komunikrimedoj kunigis ĉiujn landojn pli proksime ol iam ajn en la historio, multegaj homoj ankoraŭ malhavas atentindan konon de kulturoj ekster sia propra.

Kio subtenas ĉi tiun sistemon kaj ebligas, ke oni ne konsciu pri ĝiaj mankoj? Ekonomia kresko, surbaze de amaskonsuma-

do, kaj ĉiam akceliĝanta teknika progreso – la du narkotaĵoj de modernaj socioj. Denove, tamen, ne sufiĉas konstati la problemon por povi ŝanĝi ĝin. La investoj en la moderna edukado estas preskaŭ same grandaj, kiel tiuj en la moderna agrikulturo, kaj alternativoj sur la eduka kampo estas multe malpli disvastigitaj.

## Esperanto, UEA, kaj la monda eduka problemo

Eble ni nun ŝajnas malproksimiĝi de la problemoj, kiuj okupis la atenton de Zamenhof kiam li laboris por krei kaj poste vivigi kaj kapabligi Esperanton. Sed mi kredas ke ne estas troige diri, ke li antaŭvidis la disfalon de la reganta socia ordo en la multkulturaj zonoj de Centra Eŭropo, ke religiaj kaj naciaj dividoj subfosas ties vivopovon, kaj ke lin inspiris vizio pri alternativa estonteco en kiu ne senelire konfrontiĝos diversaj identecoj, diversaj vivmanieroj, diversaj kredoj kaj konvinkoj. Por tia estonteco necesus alispeca edukado; ĉar la tradiciaj lernejoj, administrataj de la ŝtatoj aŭ la eklezioj, nur plifortigas la dividojn inter la popoloj. Do, tiu sistemo povas elteni nur tiel longe, kiel la interesoj de la diversaj grupoj iras samdirekte. Kiam venas krizo, oni vidas ke fakte okazis mis-edukado, kiu katenas la fantaziojn de la homoj kaj malebligas kreajn solvojn.

La solvo de Zamenhof lokiĝis ekster la formala eduka sistemo. Kreante lingvon, kiun "oni povas lerni ludante," li verŝajne pensis unuavice pri edukado de plenkreskuloj – de homoj, kiuj konscie elektas plivastigi sian personecon kaj horizonton preter naciajn limojn. Kaj kompreneble lia unua zorgo estis krei firman fundamenton por la nova lingvo, sur kiu la nova komunumo povus memfide disvolviĝi. Poste, kiel oni scias, li dediĉis sin al la kreo de religia-etika fundamento, same lokita ekster la establitaj strukturoj de ŝtato kaj eklezio. Oni trovas ĉe li, fakte, iun bazan malfidon pri tiuj institucioj, iun rifuzon atribui al ili iun gvidan rolon en la homa vivo. Ili necesas, jes, sed ne tie oni serĉu siajn vivprincipojn.

Praktikan daŭrigon de la zamenhofa penso oni trovas ĉe Hector Hodler, la fondinto de UEA. Ne erare, sed tute konscie, li elektis kiel la ĉefan celon de la Asocio "kreskigi fortikan senton de solidareco inter siaj anoj kaj disvolvi ĉe ili komprenon kaj estimon por aliaj popoloj". Ofte niaj historiistoj emfazis la praktikan fokuson de Hodler, lian volon doni al Esperanto konkretan utilon en la vivo de ĝiaj uzantoj. Sed mi pensas, tamen, ke tiu utiligado por Hodler estis nur vojo al alia celo, eduka laŭ sia esenco: per propra, rekta sperto de tiu komuna homeco, kiu senteblas okaze de kunagado komerca, scienca, kultura, ktp, la esperantistoj iom post iom elforĝos sian propran etikon, sian propran modelon de harmonie integrita mondo.

Ni vidas, do, ke Zamenhof kaj Hodler, niaj du plej grandaj revoluciuloj, volis per Esperanto kontribui al la solvo de tio, kion oni povus nomi "la monda eduka problemo" – la misagordo inter la ŝtata, industria eduksistemo kaj la fakto, ke ni ĉiuj kunloĝas sur unu limhava planedo. Se, tamen, oni konsideras Esperanton nur teknika rimedo de komunikado, tiu eduka misio facile forgesiĝas; kaj kiom pli facila estas la vivo, se oni ne devas lukti kontraŭ la establita socia ordo! Precipe en la okcidentaj landaj asocioj, kie la kutimaj pensokadroj de la nacia edukado estas kompreneble pli fortaj, la ideo ke Esperanto estas nur lingvo enradikiĝis frue. Sed eĉ en UEA, eĉ antaŭ ol ĝin transprenis la landaj asocioj en 1932, ekregis simila ideologio. La homoj, kritikaj pri la reganta socia ordo, transiris al SAT, kaj ne estas hazarde, ke ĝuste en SAT oni trovas la plej fortan emfazon pri la eduka, kleriga rolo de Esperanto inter la du mondmilitoj.

Post la dua mondmilito, Ivo Lapenna metis sian propran stampon sur la ideologion de UEA. Ĉe li oni ja trovas emfazon pri edukado, eĉ sur la etika kampo, kiun por li difinis la nove potenca koncepto de universalaj homaj rajtoj. Aligante Esperanton al tiuj klopodoj starigi tutmondan juran kaj poltikan ordon, li kredis trovi oran mezon inter la idealismaj klopodoj de Zamenhof kaj Hodler kaj la nacikadraj kutimoj de la landaj asocioj. En

si mem, tio estis tute brila koncepto; sed Lapenna ne volis aŭ ne povis agnoski la kontraŭdirojn en tiu nova koncepto de internacieco, kiu samtempe firmis la nacian suverenecon kaj proklamis la ekziston de supernaciaj normoj. Li volis ligi Esperanton al ambaŭ flankoj, kaj tio siavice pelis lin al la plej mallarĝa interpreto de ĝia lingva misio, direktita nur al la interŝtataj rilatoj – limigo kiun oni certe ne trovis ĉe Hodler aŭ Zamenhof. Kvankam eduka celaro tie ne mankas, ĝi estas plene subordigita al tiu bildo pri la internacia ordo, kiun ĝi kunkreu kaj subtenu – tute analogie al la koncepto pri nacia edukado.

Mi povus, kompreneble, diri sufiĉe multe pri la kontribuoj de la plej grava posteulo de Lapenna, Humphrey Tonkin, por plivastigi kaj plinuancigi ties idearon. Certe hodiaŭ ne regas en UEA, aŭ en la movado ĝenerale, klasika lapenismo; precipe mankas la fido al Unuiĝintaj Nacioj kaj la aliaj internaciaj institucioj, kiu necesus por vivteni lian mondbildon. Sed ŝajnas al mi, tamen, ke malgraŭ siaj mankoj ĝi restas ankoraŭ la plej potenca vizio per kiu oni respondas la demandon, "por kio ni havas Esperanton." Antaŭ deko da jaroj mi mem, per la Praga Manifesto, skizis la bazon de alia respondo – postlapenisma, ni diru. Sed tiu ankoraŭ ne vere enradikiĝis, mi kredas; kaj eble pri tio kulpas interalie nesufiĉe ellaborita eduka principaro. Konklude, do, mi volas prezenti al vi kelkajn pensojn pri tio, kion signifus por UEA reveni al siaj radikoj, kiel organizo kun unuavice eduka celaro.

## Kien do UEA?

Mi diros tuj en la komenco, ke laŭ mi estas fundamenta eraro konsideri UEAn kiel tegmentan asocion, kiu devas kunigi en si ĉiujn tendencojn de la Esperanto-movado. Pro tio, ke Esperanto tamen estas lingvo kaj do disponeblas por ĉiu, kiu volas uzi ĝin, por kiu ajn celo kaj laŭ ĉiuj ajn ideoj, tia tegmenta koncepto de UEA ne povus subteni koheran ideologion; kaj libervola asocio sen ideologio similas ŝipon sen rudro, kiu simple drivas tien, kien la ventoj pelas ĝin.

Dirinte tion, mi tamen opinias, ke la “U” en UEA devas resti maksimume valida. Tio estas, ne taŭgus por UEA alpreni ideologion, kiun oni perceptas kiel ekskluzivan; kaj ĝi devas daŭre okupiĝi pri la kernaj defioj de la Esperanto-movado kiel tuto, nome varbado de novaj anoj kaj ilia enkomunumigo.

Se, tamen, oni rigardas tiujn defiojn ne kiel esence lingvajn, sed kiel unuavice kaj profunde edukajn, oni venas al iom alia bildo pri la fundamentaj gvidaj prioritatoj de UEA. Por mi, tiu bildo enhavas kvar celojn, inter kiuj la unua konsistigas nian respondon al la ĉefa demando de ĉi tiu prelego: Por kio ni havas Esperanton?

1. UEA celas eduki homojn por harmonia kunvivado sur limhava planedo; kadre de tio, ĝi speciale atentas la defiojn de lingva kaj kultura diverseco kaj la disvolvon de interkultura kompreno kaj kunlaboro.

2. UEA celas eduki homojn pri la historio kaj kulturo de Esperanto mem, por ke oni konu kaj komprenu kion oni esperis kaj kion oni atingis per la lingvo, kaj por ebligi kleran kaj klarvidan plukonstruadon sur tiuj atingoj.

3. UEA celas eduki homojn al altnivela esprim- kaj komunik-kapablo en Esperanto, por subteni kiel eble plej altkvalitan reciprokan komprenon kaj kunagadon en la lingvo.

4. UEA celas eduki homojn por efika agado favore al la disvastigo kaj uzado de Esperanto, inkluzive de informado, instruado, organizado, politika lobiado, subvencipetado, interpretado, terminologia laboro, kaj aliaj kampoj esence ligitaj al la progreso de la lingvo kaj ĝia komunumo.

Vi eble rimarkis, ke nenie tiu celaro distingas inter esperantistoj kaj neesperantistoj. Ĉar fakte la edukado ne havas limojn, malsame al lingvoj, kiuj bezonas limojn por povi ekzisti entute. En tio mi vidas unu gravan avantaĝon de ĉi tiu aliro, ĉar iom post iom povos malperi tiu forta sento de “ni” kaj “ili”, kiu tiel fantomas en la memkonscio de la movadanoj. Por asocio kiu konceptas sin kiel unuavice eduka, estas nur “ni” – “ni homoj”, kiuj

venas en la mondon pretaj por lerni, kaj espereble ne ĉesos lerni dum la vivodaŭro. Spertuloj, progresintoj, komencantoj, kaj tiuj kiuj ankoraŭ ne eklernis – ĉiuj troviĝas sur komuna kampo, kie la ĉefa demando ne estas, kia oni proklamas sian lingvan identecon, sed kiel tiu lingva identeco kontribuas al la propra kleriĝo kaj disvolviĝo.

Laŭ tiu koncepto, la kongresoj de UEA, ĝia revuo, ĝiaj retejoj, ĝia sinprezento al la mondo, fariĝus pli kaj pli klare edukcelaj. Mi invitas vin ekzemple bildigi al vi Asocion, kiu fariĝas monde konata kiel peranto kaj organizanto de edukaj interŝanĝoj, en kiuj la ĉefa interlingvo estas Esperanto. Paralele al la sistemo de ĉefdelegitoj kaj perantoj, povus aldoniĝi reto de edukistoj, kiuj ĉefe turnas sin eksteren por organizi tiajn interŝanĝojn. Imagu Asocion, kiu transprenis la prizorgadon de *lernu.net* kaj plivastigis ĝin kun konscio pri ĉiuj kvar edukaj celoj de la asocio: interkultura kompreno, movada klereco, kaj aktivula trejnado, aldone al la tradicia lingvo-instruado. Imagu Asocion, kiu ĉiumonate produktas "podkastojn" kaj aliajn edukajn rimedojn por pliriĉigi vesperajn programojn kaj lokajn kursojn en Esperanto-kluboj tra la mondo.

Ĉiuj tiuj servoj estus pagendaj, kompreneble, je modesta tarifo ligita al membreco en UEA, ĉar necesas tute repripensi la membrostrukturon por la reta epoko. Antaŭe, la t.n. "aligitaj membroj" havis vere sur surpaperan rilaton al UEA, ĉar ne ekzistis iu praktika maniero kontakti ilin rekte. Nun UEA povos havi dekoble aŭ centoble pli vastan *individuan* membraron je la plej baza nivelo, tiu de ioma interesiĝo kaj simpatio pri Esperanto, dum restos la pli altaj kategorioj por homoj, kiuj jam sentas sin pli forte ligitaj al la Asocio, ĝiaj agadoj kaj idealoj, aŭ kiuj volas profiti el pli vasta gamo de ĝiaj servoj. Denove mi volas emfazi, ke se la kerna celaro estas eduka kaj ne lingva, tia gamo de membrecoj estas tute natura kaj komprenebla.

Evidente restus iu parto de UEA, kiu daŭre okupiĝas pri t.n. lingvaj problemoj, lingvaj rajtoj, kaj simile. Tamen, kiel mi kon-

ceptas ĝin, tio estus nur kvazaŭ speciala fako de UEA por homoj, kiuj havas apartan intereson kaj iom da fakaj konoj. Nek tie, nek aliloke, oni pretendus ke Esperanto povas "solvi la mondan lingvo-problemon," kvankam oni daŭre prezentus ĝin kiel atentindan fenomenon kaj kiel praktikan rimedon, kiu meritas seriozan konsideron en diversaj lingvopolitikaj kuntekstoj. Tiel fakte jam okazas, jam de jaroj, kadre de la Nitobe-simpozioj, la seminarioj ĉe UN, kaj simile. Tamen ŝajnas al mi, ke oni ankoraŭ tro akcentas la lingvan dimension de niaj eksteraj rilatoj, kaj maltro la edukan kaj kulturan. Ni povas serĉi aliancanojn ne nur inter pledantoj por tiu aŭ alia lingvo kaj kulturo, sed ankaŭ inter tiuj, kiuj vidas urĝan bezonon de pli vasta mondperspektivo ĉe la ordinaraj homoj de ĉiuj landoj kaj kulturoj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj, ĉu fortaj, ĉu minacataj.

Se nia civilizacio travivos la venontajn jardekojn, tio okazos ĉar ni remalkovros, kiel krei integritajn komunumojn kaj sociojn, kie la lingvado kaj la edukado denove kunharmonias kun la bezonoj de la homoj. En tiu kadro, la agado por Esperanto havas valoron kaj signifon pri kiu ni mem apenaŭ konscias. Mi ne dubas, ke ĝi nur kreskos en graveco, amplekso, kaj profundo tra ĉi tiu mondoŝanĝa jarcento; kaj ke UEA, se ĝi bone repripensos sian celaron kaj agadon, ludos en tiu kreskado kernan rolon.

*Analizo kaj rekomendoj de la Komisiono pri Strategiaj Demandoj (marto, 2012)*

# Strategia vizio por UEA

## Kian strategion ni bezonas?

Ekzistas diversaj modeloj de strategia plano. En firmaoj kaj organizoj kun forta hierarkia strukturo, tiu plano koncernas unuavice la estrojn – tiuj kiuj povas ordoni al la subuloj, kion fari, kaj kiuj povas decidi pri la utiligo de rimedoj homaj, financaj, ktp. Tia strategio similas al la plano de milita kampanjo. Ĉar ekzistas la strukturaj rimedoj por efektivigi ĝin, la plano povas (kaj eĉ devas) esti tre konkreta, kaj verkita esence por interna uzo. Ĝi ankaŭ ne bezonas motivi aŭ inspiri la ordinarajn dungitojn, ĉar ili kutimas obei la decidojn de la estroj.

UEA ne estas tia organizo. Ĝi ne havas fortan hierarkion, kaj multaj el ĝiaj agadoj estas prizorgataj de volontuloj, tial malutilus ordoni al ili kvazaŭ al dungitoj. Krome, la kulturo de Esperantujo ĝenerale estas tre individueca, bazita sur personaj elektoj kaj konvinkoj, kaj rezista al strikta organizado. El tio fontas ankaŭ la granda diverseco de la movado – “kvazaŭ kompleksa sunsistemo, kun planedoj kaj asteroidoj kun plej diversaj (mal)grandecoj, itineroj, fortoj kaj movokapabloj, sufiĉe koliziemaj aŭ male ignoremaj inter si” (J.A. Vergara).

En tia organizo, strategia plano devas ludi ankaŭ edukan kaj inspiran rolon. Oni ne povas atingi unuecon per desupra decidado kaj ordonado; maksimume, oni povas krei vizion, strukturon kaj programon kiuj allogas kunlaborantojn. Kompreneble, tiuj kunlaborantoj bezonas ankaŭ gvidon, do oni ne povas malhavi konkretajn, praktikajn detalojn por la realiga laboro. Sed oni bezonas investi pli da tempo kaj atento en komunikadon kaj kundiskutadon, ol necesas en hierarkia kunteksto.

Tiu ĉi dokumento do celas prezenti ĝeneralan kadron por la strategio de UEA, kun la celo stimuli tian kundiskutadon. Por resti konciza kaj facile trarigardebla, ĝi ne multe traktas la praktikajn detalojn, kvankam la Komisiono klare konscias pri la bezono okupiĝi pri ili. Al tio ni planas dediĉi nin en la venontaj monatoj. Intertempe, ni esperas ke niaj proponoj naskos diskutojn kiuj pliriĉigos nian komprenon de la defioj kaj potencialoj kiujn alfrontas UEA.

## La kernaj agadkampoj

Ekzistas jam tradicia listo de laborkampoj kaj respondecoj en UEA, ekzemple "landa agado," "eksteraj rilatoj," "kongresoj" ktp. Pli ĝenerale, oni ofte distingas inter agadoj por "informado," "instruado" kaj "utiligo" de Esperanto. Tiuj dividoj certe plu havas utilon. Tamen, en niaj diskutoj ni venis al nova, kvaropa etikedaro por la ĉefaj agadkampoj de la Asocio: **konsciigo**, **kapabligo**, **komunumo**, kaj **kunordigo**.

*Komunumo* estas iusence la kerno de la tuto. Temas pri la kompleksa reto de interhomaj rilatoj, kulturaj tradicioj, organizoj, aranĝoj, komunikiloj kaj tiel plu kiuj donas al Esperanto ĝian vivon. UEA ne estas identa kun tiu komunumo, sed ĝi ludas tre gravan rolon en ĝi, praktike kaj simbole. *Praktike,* UEA celas, kiel diras ĝia Statuto, "faciligi ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj," t.e. krei kondiĉojn por fruktodona komunikado kaj kunagado pri plej diversaj temoj kaj por plej diversaj (homamaj, teramaj) celoj. *Simbole*, UEA estas portanto kaj evoluiganto de la esperantista ideAro, kiu disvolviĝas kaj adaptiĝas ĉerpante el la kulturaj fluoj de la monda socio. Ambaŭrilate, la graveco de UEA fontas el ĝia kapablo arigi *grandan nombron da homoj el multaj landoj* kaj el ĝia atingo de *alta nivelo organiza, lingva, kultura kaj intelekta.* Necesas atenti ambaŭ kriteriojn, la kvantan kaj la kvalitan, pensante pri la strategiaj prioritatoj de la Asocio.

*Kapabligo* kovras ĉiujn agadojn, kiuj celas helpi la homojn partopreni pli aktive kaj profunde en la vivo de la komunumo. Temas ne nur pri instruado de la lingvo je diversaj niveloj, sed ankaŭ pri kultura kaj interkultura klerigado, kaj pri aktivula trejnado diversspeca kaj diverscela. Grandparte, tiu kapabligado okazas en neformalaj kadroj, ekster la sistemoj de ŝtataj lernejoj, universitatoj, profesiaj kursaroj ktp. Pli kaj pli ofte, ĝi okazas almenaŭ parte per Interreto. Ni ĉiuj scias, ke tiu vojo al plena esperantistiĝo estas serpentuma kaj malebena; multaj potencialaj uzantoj de la lingvo laciĝas kaj perdiĝas dumvoje. UEA portas respondecon pri la starigo de internaciaj normoj de lingvokono kaj kulturkono, pri la trejnado kaj subtenado de instruistoj tutmonde, pri la eldonado de valoraj lerniloj kaj referencverkoj, kaj tiel plu. Historie, tiu agado ne okupis centran lokon en la strategio de la Asocio; estonte, ĝi devos.

*Konsciigo* aludas al ĉiuj manieroj prezenti la realaĵojn kaj la valorojn de la Esperanto-komunumo al homoj, kiuj ankoraŭ ne kapablas sperti ilin persone. La celataj efikoj de konsciigo povas esti tre diversaj. Veki intereson aŭ simpation pri Esperanto, ĝiaj historio kaj idearo; pensigi pri la realeco de lingvaj baroj kaj malegalecoj en la nuntempa mondo: prezenti ion interesan el nekonata kulturo (menciante la rolon de Esperanto en la perado); inviti al partopreno en difinita kurso aŭ aranĝo – tiuj estas ekzemploj de praktika konsciiga laboro. Kvankam grava parto de tiu agado daŭre okazas sur loka aŭ nacia nivelo, la disvastiĝo de Interreto ege plifortigis ĝian internacian aŭ tutmondan dimension. Nepras trovi novajn manierojn kunlabori trans kulturajn kaj lingvajn limojn por ĝenerale altigi la nivelon de la konsciiga laboro, tiel ke la malfortaj landaj kaj lokaj movadoj lernu de la fortaj (kaj inverse), kaj la novaj aktivuloj lernu de la malnovaj (kaj inverse). En tia tutmonda kunagado, UEA devas ludi kernan rolon.

Per tio ni venas al la kvara agadkampo, *kunordigo.* La uzantoj de Esperanto loĝas tre dise tra la mondo. Jen kaj jen ili fondas novajn grupojn, asociojn, ligojn, aranĝojn, periodaĵojn, retpa-

ĝojn kaj tiel plu. En tiu diverseco kuŝas granda forto – sed ankaŭ signifaj baroj al komunikado kaj kunlaboro. Jam de sia fondo en 1908, UEA okupas unikan lokon kiel la plej videbla kaj, efektive, *universala* organizaĵo de esperantistoj. Pro tiu difina trajto, ĝi vole-nevole devas lukti kun demandoj de demokrateco, inkluziveco kaj celtrafeco – ĉar ne ekzistas unueca difino de tio, kion la esperantistoj volas atingi per sia agado. Certagrade, la sukceso de UEA kuŝas en ĝia kapablo enteni diversajn konkurencajn vidpunktojn kaj tendencojn. Tial tre gravas la komunikaj fluoj en la Asocio, la travidebleco de la decidoj, la efikeco de la strukturoj, kaj la reputacio de la gvidantoj. Tiurilate la publikaj postuloj multe kreskis en la lastaj jaroj. Venis tempo por funda repripensado de niaj organizaj formoj kaj tradicioj, cele al la rekreo de UEA, por ke ĝi kapablu pluvivi kaj disflori tra dua jarcento.

## Agado cele al kio?

La kultivado de la kultura, komunika, interhoma potenco de Esperanto estas esenca por UEA. Tamen, klarigi la valoron de tiu agado al neesperantistoj ne ĉiam estas facile, ĉar temas pri io tre multfaceta kaj plurnivela. Kiuj do estas la valoroj kaj ideoj, kiuj fundamentas la agadon por kaj per Esperanto? Kiel UEA difinas sin inter aliaj neregistaraj organizoj kaj civitanaj movadoj?

Ne eblas definitiva respondo al tiuj demandoj, ĝuste pro la kultura vivanteco de Esperanto. Kulturoj kreskas, adaptiĝas, transformiĝas responde al eksteraj kondiĉoj kaj internaj evoluoj. Certagrade, do, ĉiu maniero prezenti la agadon de UEA al homoj, kiuj nenion scias aŭ malmulte komprenas pri la reala funkciado de Esperanto, estos trosimpliga. Tamen ni devas provi fari tion, samtempe klarigante la direkton en kiu UEA volas stiri la memkomprenon kaj aktivecon de ĝiaj membroj.

Por tiu celdifina flanko de la strategio, la Manifesto de Prago restas fundamenta. Neniu alia celdeklaro de la lastaj jardekoj rikoltis tiel vastan reeĥon de la membroj, nek ampleksas tiel vastan

gamon de temoj. Eble oni povus resumi tiun ĝeneralan direkton kiel "agado por justa, paca kaj daŭripova multlingveco tutmonde." Kompreneble, en difinitaj cirkonstancoj oni povas emfazi iun aŭ alian faceton de tiu agado, ekzemple lingvajn rajtojn, lingvan demokration, aŭ efikan lingvo-instruadon. Gravas tamen konscii, ke ĉiuj tiuj konceptoj estas partoj de pli vasta vizio pri tio, kiel plej bone konduti kiel civitanoj de multlingva mondo.

En pli frua raporto de la Komisiono pri Strategiaj Demandoj, ni proponis nomi tiun vizion "lingva justeco". Jen kiel ni vortumis la vizion kaj mision de UEA en tiu raporto:

### NIA VIZIO

Ni laboras por lingva justeco tutmonde. Nia celo estas mondo de multaj florantaj lingvoj kaj kulturoj, kie ĉies lingvaj rajtoj estas respektataj, kaj ĉiuj homoj povas komuniki kaj kunlabori libere, efike, kaj pace.

### LA MISIO

Por realigi tiun vizion, ni laboras por:

– konsciigi la mondan publikon pri demandoj de lingva justeco, kaj ilia rilato al aliaj gravaj sociaj kaj ekologiaj demandoj;

– kontribui al la ellaboro de sistemoj kaj al la disvastigo de rimedoj kaj metodoj por lingve justa komunikado;

– kreskigi interkulturan konscion, komprenon, kaj kunlaboron tutmonde.

En tiuj agadoj, ĉiuj lingvoj estas gravaj kaj valoraj. Por faciligi egalecan kaj inkluzivan komunikadon inter malsamlingvanoj, ni subtenas la disvastigon kaj utiligon de la internacia lingvo Esperanto. Estante kreita por tiu difinita celo, kaj same atingebla kaj lernebla por ĉiuj, ĝi estas laŭ nia sperto plej justa kaj efika lingva rimedo por kunlaboro kaj interkompreniĝo inter homoj de malsamaj kulturoj.

Formulante tian misi-deklaron, ni volas prezenti UEA-n kiel organizon paralelan al aliaj konataj internaciaj asocioj, kiel Amnestio Internacia pri homaj rajtoj aŭ Monda Fonduso por la Naturo pri ekologia politiko. Efektive UEA estas la sola tutmonda organizo kiu okupiĝas pri la problemaro de lingvo-diverseco en ĉiuj aspektoj, ekde la konservado kaj revivigo de malgrandaj senŝtataj lingvoj ĝis la interna lingvo-politiko de EU kaj UN. Kompreneble, eblas lerni kaj uzi Esperanton sen rilato al tiuj demandoj, simple pro persona intereso, amikeco, aŭ eĉ profesia okupo. Tamen, en monda skalo la Esperanto-movado devas nepre engaĝi sin kun tiuj prilingvaj temoj politikaj, kulturaj, juraj, ekonomiaj, edukaj kaj simile – ne ĉiam por elekti iun flankon de la debato, sed por altigi la nivelon de la diskutoj kaj montri al pli kreaj alternativoj. Ni opinias, ke UEA devas roli kiel la gvida organizo sur tiu kampo, idee kaj praktike, en la Esperanto-komunumo kaj ekster ĝi.


## La membraro en la strategio

Kiel aliaj internaciaj organizoj, UEA devas kalkuli pri kotizoj kaj donacoj, pri la nombro de aktivuloj kaj la partopreno de la landaj kaj fakaj asocioj – tiuj faktoroj estas indicoj de ĝia propra bonfarto kaj la amplekso de ĝiaj rimedoj. Ĉiu strategio devas do konsideri la vojojn kaj rimedojn por kresko kaj aktivigo de la membraro, individua kaj asocia. Kiam strategio transformiĝas en laborplanon, oni devas ankaŭ fiksi konkretajn celojn kaj mezurilojn por pritaksi la progreson tiurilate.

La strukturo de UEA devenas de historia kompromiso inter asocio bazita sur individua membreco, unuflanke, kaj aro de relative fortaj landaj asocioj kunlaborantaj je internacia nivelo, aliflanke. Kvankam politike oportuna, tiu strukturo ne faciligas strategian pensadon, ĉar landaj membraroj, movadoj kaj asocioj estas tre diversaj, kaj ideoj kaj agadoj ofte ne facile transiras de unu asocio al alia. Ankaŭ la individua membraro estas tre diverseca, ekde homoj kiuj ludas gvidan rolon en sia landa movado

ĝis homoj kiuj neniam partoprenas en lokaj kaj landaj aranĝoj kaj ne membriĝas en aliaj asocioj. Ĉe ambaŭ flankoj, la asocia kaj la individua, la gamo de motivoj, interesoj, kapabloj kaj rimedoj estas tre granda – kaj ĝuste tiu gamo konsistigas la bazan forton de la Asocio. Atingi inkluzivan bildon pri ĝi, kaj formuli strategion kiu adekvate respondas al ĝiaj bezonoj kaj potencialoj, ne estas facila defio.

La diskutoj pri tiuj demandoj en la Komisiono naskis jenan diagramon, kiu celas montri la alfluon de novaj membroj kaj aktivuloj al UEA. Diversaj detaloj pliklariĝos, kiam ni prezentos niajn ideojn pri la diversaj agadkampoj; sed jam tuj evidentiĝas la *integriteco* de la membrostrukturo en nia strategia vizio. Se UEA bone prizorgos siajn agadkampojn, pli granda kaj pli aktiva individua membraro plifortigos la landajn asociojn, dum pli multnombraj kaj pli aktive kunlaborantaj landaj asocioj pligrandigos la individuan membraron.



La bildo indikas, kiel la individuaj membroj de UEA konsistigas nur malgrandan parton de la ĝenerala publiko, sed kreskas proporcie se oni rigardas la progreson tra la niveloj de esperantistiĝo. Precipe homoj en la lasta nivelo (“uzantoj, aktivuloj”) pretas kaj kapablas kontribui al la laboro de la landaj asocioj, kiuj partoprenas en ĉiuj agadkampoj menciitaj ĉi-supre. (“Kunordigo” ne aperas ĉi tie, por ne tro kompliki la diagramon.) Strategie, do, UEA volas ne nur varbi membrojn sur tiuj tri agadkampoj, sed ankaŭ “peli” ilin al akiro de pli profunda lingvokapablo kaj pli aktiva partopreno en la komunumo; kaj ĝi volas havi landajn asociojn, kiuj kontribuas konsekvence kaj kunordigite al ĉiuj tri agadkampoj.

Tiu skemo ilustras la kernan gravecon de “kapabligo” (instruado, trejnado, klerigado ktp) en la strategio de UEA. Ĝi ankaŭ pensigas pri la respondecoj, kiujn akceptas la landaj asocioj per sia aliĝo al UEA. Imagu, se ĉiu landa asocio devus formale deklari la kampojn, sur kiuj ĝi volas kunlabori, kaj ĉiujare raporti pri sia agado sur tiuj kampoj en rilato al la strategia plano de UEA. Tio estus unu maniero atingi pli da kohereco en la agado kaj pli bonan informfluon inter la diversaj asocioj. Espereble, ĝi ankaŭ helpus sproni la membrovarbadon por UEA mem.

Evidente, longperspektiva strategia celo devus esti tio, ke ĉiuj landaj asocioj estu egale aktivaj kaj sukcesaj sur ĉiuj agadkampoj. Necesas sobre pritaksi la efektivan situacion en la diversaj landoj, kaj klopodi sisteme plifortigi la malfortajn asociojn, diskonigi la spertojn kaj sciojn de la plej fortaj, kaj tiel iom post iom levi la tutan nivelon de la agado. Inter la mezuroj de sukceso devus nepre troviĝi, interalie, la kreskado de la individua membraro *kaj* la membraroj de la landaj asocioj. Indos malfermi dialogon kun la plej aktivaj landaj asocioj pri la difino de diversaj membro-kategorioj, kiuj plej bone respondas al la interesoj kaj pagopreteco de la (varbotaj) membroj. Plie, UEA devos ellabori sistemon por spuri la progreson de siaj membroj al pli kaj pli

aktiva partopreno en la komunumo kiel tuto. Ni bezonas ne nur pli multajn membrojn, sed pli engaĝitajn membrojn. Partopreno en kongresoj kaj aliaj aranĝoj, abonado de revuoj, aĉetado de libroj kaj diskoj, membriĝo en fakaj asocioj, trapaso de kursoj kaj ekzamenoj… tiuj estas kelkaj el la indikiloj, kiujn oni povus uzi por mezuri nian progreson al tiu strategia celo. Kaj kompreneble, je la plej aktiva nivelo, ni bezonas homojn kiuj organizas, informas, instruas, kantas, verkas… kiuj estas ne nur konsumantoj sed ankaŭ kreantoj de nia komuna kulturo.

## La influo de eksteraj faktoroj

La klasikaj aliroj al strategia planado emfazas la pritaksadon de "ŝancoj kaj minacoj" en tiuj sferoj de la socia vivo, kiuj plej rekte tuŝas la agadon de la organizo. Tio estas tre malfacila defio en la kazo de tutmonda asocio kiel UEA. Evoluoj en unu lando povas esti tute malaj al tiuj en alia lando, kaj tre diversaj faktoroj povas influi la publikan sintenon pri demandoj de lingva justeco, aŭ pri Esperanto specife. Pri diversaj tendencoj ne eblas diri kun certeco, ĉu ili estas ŝancoj, ĉu minacoj. Prenu ekzemple la kreskantan uzadon de maŝina tradukado en la reto: tio certe helpas kreskigi konscion pri la multlingveco de la mondo, kaj eble eĉ nutras respekton kaj simpation al aliaj lingvoj kaj kulturoj, sed ĝi povus samtempe malkuraĝigi aktivan lingvo-lernadon. En la nuna epoko de tutmondiĝo, ekzistas multaj similaj fenomenoj kiuj jen kondukas al pli da interkulturaj kontaktoj kaj kultura diverseco, jen akcelas kulturan unuformiĝon aŭ reciprokan miskomprenon.

En tiu kompleksa situacio, tamen, unu faktoro klare elstaras pro sia grandega influo al la vivo de la Esperanto-komunumo: la disvastiĝo de Interreto mem. Dum la tuta ekzisto de la lingvo, neniu teknika inventaĵo aŭ socia transformiĝo havis tiel profundan efikon sur ĉiuj agadkampoj kaj en ĉiuj landoj. Ne temas pri

tio, ke tiu efiko estas nur kaj nepre pozitiva – kvankam, se paroli ĝenerale, la bilanco ŝajnas esti plusa. Simple, ni ne rajtas ignori la reton, aŭ trakti ĝin kiel nur flankan fenomenon en la strategio de UEA. Ĝi meritas sisteman atenton kaj krean utiligon en ĉiuj aspektoj de nia agado.

Aliflanke, kompreneble, ni devas gardi nin kontraŭ la tento obsediĝi de la reto, kvazaŭ niaj problemoj estus solveblaj per ĝusta apliko de teknika scio. En la fina analizo, Esperanto estas afero de homaj rilatoj, homaj deziroj kaj esperoj, homaj streboj, kaj la reto estas nur rimedo (aŭ rimedaro) por ties plenumo. Tial necesas pensi ne nur pri tio, kion ni povas atingi per la reto, sed ankaŭ kion ni *ne* povas atingi, aŭ povas pli oportune atingi per aliaj rimedoj.

Tiun konstaton la Komisiono enkonstruis en sia traktado de la kvar agadkampoj. Sur ĉiu kampo ni demandis nin, kion ni povus atingi en la venontaj kvin jaroj – kio estas la celinda vizio, kaj kiuj estas la plej prioritataj paŝoj, kiuj kreos bazon por postaj atingoj? Kaj poste: kiel plej bone uzi la reton kadre de tiuj prioritatoj? Tial sur ĉiu agadkampo oni trovas kvazaŭ du kolonojn de la strategio, unu retan, unu pli ĝeneralan. Ilin oni devas trakti kune, ne dise, ĉar unu devus apogi la alian (aŭ, se vi preferas arkitekturan bildon, ambaŭ necesas por porti la strategian arkon).

En tiu traktado, ni donis iom da atento al la necesaj organizaj rimedoj, kaj skizis ankaŭ kelkajn indikilojn kaj konkretajn celojn, kiujn oni povus uzi por mezuri la sukceson de la strategio. Pli detala laborplano tamen postulus multe pli da spaco (kaj esplorado), kaj ni taksis pli oportune lasi tion al posta etapo, por doni al homoj eblecon reagi al la ĝenerala formo kaj enhavo de ĉi tiu strategia aliro. Ĝi ne estas farita surbaze de iu apriora skemo, sed kreskis iom post iom el la diskutoj en la Komisiono, per retmesaĝoj, parolaj kunsidoj skajpe kaj kongrese, kaj la Strategia Forumo en Kopenhago. Espereble ĝia longa ĝermado helpis certigi, ke ĝi radikas firme en la grundo de la komunumo.

## Agadkampo Konsciigo

Ni jam ĉi-supre skizis nian ideon pri la misio de UEA – la celaron, kiun ĝi prezentu al la ekstera mondo. Tiu celaro estus do la fundamento de ĉi tiu agadkampo, kaj ĝi havas du flankojn. Unu flanko konsistas en la klarigado kaj disvastigo de la koncepto "lingva justeco" aŭ "justa, paca kaj daŭripova multlingveco", per kiu ni celas la komplekson de ideoj resumitaj en la Manifesto de Prago kaj traktitaj en la diversaj Nitobe-simpozioj, ekzemple. La alia flanko konsistas en informado pri Esperanto kiel reala, interesa lingva kaj kultura fenomeno kiu meritas respekton kaj simpation. Ambaŭrilate, nia vizio atribuas al UEA gvidan rolon, pere de du sub-branĉoj aŭ organoj kiuj kunordigus la agadon internacie: plifortigita Centro por Esploro kaj Dokumentado (CED) kaj nova Reta Komisiono pri Informado (RKI).

CED estas organo de UEA, fondita en la kvindekaj jaroj, kiu havas internacian estraron de universitataj fakuloj, kaj respondecas interalie pri la lingvopolitika revuo LPLP, la Esperantologia Konferenco kadre de UK, kaj la bulteno *Informilo por Interlingvistoj*. CED tamen havas nek buĝeton, nek oficiston, nek propran retejon. En la lastaj jaroj ĝian terenon parte transprenis la usona fondaĵo ESF, kiu disponas pri ĉiuj tri rimedoj. Laŭ nia analizo, UEA devas ellabori pli aktivan strategion sur tiu kampo. Kiel organizo por lingva justeco, ĝi nepre bezonas organon kiu okupiĝas pri lingvopolitiko en vasta senco, kapablas respondi en informita kaj trafa maniero al evoluoj en la publika aŭ interregistara sferoj, kaj povas antaŭenpuŝi la pensadon pri tiuj demandoj en- kaj ekstermovade. Tio postulos relative modestan investon, sed ĝi devus fariĝi parto de la kerna buĝeto de UEA, ne io flanka kiu plene dependas de volontulaj fortoj por sia ekzisto kaj agado. Sur tia bazo, CED povus ampleksigi sian kunlaborantaron kaj entrepreni diversajn novajn agadojn, inkluzive de subvencipetado

por esploraj projektoj rilate al lingva justeco, plia serio de Nitobe-konferencoj, kaj raportoj kaj libroj por diversnivela publiko. La propono ellabori “indekson de lingva justeco,” iom diskutita en Kopenhago kaj nun prilaborata de internacia laborgrupo, povus aldoniĝi al tiu listo.

Okazis jam diversaj provoj en UEA kunordigi la informan agadon, ĝenerale per interkontaktigo de la landaj respondeculoj pri informado. Tio en si mem estas bona celo, sed ĝi ĉiam pli aŭ pli frue paneis pro la malrapida ritmo de la komunikado kaj la manko de klaraj celoj kaj strategio. Ni opinias, ke la reto nun prezentas al ni ĉiujn bezonatajn rimedojn por sukcesa tutmonda informa laboro en multaj lingvoj; plie, ĝi eĉ postulas la kunordigon de tiu laboro, ĉar nun ĉiu reta uzanto (krom en kazoj de registara cenzuro) havas aliron al informoj el multegaj landoj. La reto do fariĝu la bazo por la informa laboro. La Reta Komisiono pri Informado estus gvidata de homoj jam spertaj kaj aktivaj pri enreta informado, kaj ĝi respondecus interalie pri la ĉefaj retejoj de UEA, *uea.org* kaj *esperanto.net*. Tiu dua retejo bezonas plenan restrukturadon por ebligi multlandan kaj multlingvan kunlaboron, laŭ la koncepto de la paĝaro *aktuale.info*; ĝi eventuale povus eĉ transpreni ties teknikan strukturon, per interkonsento kun E@I kaj ESF. La celo estus kultivi komunumon de centoj aŭ miloj da kunlaborantoj en ĉiuj iom gravaj lingvoj de la reto, provizante ilin ne nur per teknikaj rimedoj kaj fidindaj informoj kaj argumentoj, sed ankaŭ per trejnado pri ĵurnalismo, retpaĝa redaktado, lobiado, reklamado, kaj simile.

En la ĉi-suba tabelo, ni resumas tiujn ideojn, kun iuj tre skizaj sugestoj pri konkretaj celoj por kvinjara periodo (laŭ la principo SMART: specifaj, mezureblaj, atingeblaj, realaj kaj trafaj). En strategia laborplano, ĉio ĉi estus multe pli detale ellaborita, por povi gvidi la laboron de diversaj aktivuloj kaj organizoj.

| | ĜENERALA STRATEGIO | RETA EVOLUIGO |
|---|---|---|
| **KONSCIIGO**<br><br>**Kunordiga instanco:** CED/Reta Komisiono pri Informado | **Strategia vizio:** UEA – portanto de Esperanto kiel movado kaj rimedo por justa, paca kaj daŭripova multlingveco tutmonde<br>**Ĉefa rimedo:** CED – profesieca esplora-dokumenta fako de UEA, kun fokuso al lingva justeco kaj amaskomunikila strategio<br>**Ĉefaj agadoj:**<br>• Indekso de lingva justeco<br>• Nitobe-konferencoj<br>• Serio de lingvopolitikaj kaj kulturpolitikaj raportoj<br>**Kvinjaraj SMART-celoj:**<br>• Indekso: unua versio ellaborita por 34 OEKE-landoj (raporto en 2015)<br>• Konferencoj: minimume du, kun 30-50 prestiĝaj partoprenantoj<br>• Raportoj: 1-2 jare, diverslongaj, diverstemaj, eldonitaj rete kaj prese | **Strategia vizio:** UEA – internacia bazo de la informa laboro kaj fonto de ĝisdataj, ĝustaj, modernstilaj informoj pri Esperanto en praktike ĉiuj lingvoj de la reto<br>**Ĉefa rimedo:** Reta Komisiono pri Informado – novspeca komisiono kiu kunligas la plej aktivajn informaktivulojn ĉiulande<br>**Ĉefaj agadoj:**<br>• Du ampleksaj multlingvaj retpaĝaroj: *uea.org*, kun informoj pri UEA kaj ĝia agado, kaj *esperanto.net*, kun ĝeneralaj informoj pri Esperanto<br>• Monata reta novaĵbulteno abonebla<br>**Kvinjaraj SMART-celoj:**<br>• Nombro de lingvoj (kresko ĝis 30)<br>• Paĝvizitoj (kresko ĝis 1.000.000 monate)<br>• Abonoj al monata bulteno (kresko ĝis 10.000) |

## Agadkampo Kapabligo

Ni jam pli frue konstatis, ke ĉi tiu agadkampo tradicie ne okupis centran lokon en la strategio de UEA; ĝenerale, oni lasis ĝian flegadon (sub la etikedo "edukado") al la instruista asocio ILEI. Ni ankaŭ montris, ke tiu aranĝo estas strategie nepravigebla. La bonfarto de UEA, kaj de la movado ĝenerale, plene dependas de nia sukceso kapabligi la homojn uzi la lingvon aktive, ĝuste, klere, kaj ankaŭ kompetente partopreni sur la diversaj agadkampoj. Ne temas pri tio, ke ILEI ne meritas admiron kaj subtenon! Male, ni proponas, ke ĝi estu multe pli funde integrita en la strukturo de UEA, inkluzive de la buĝeto de la Asocio kaj la laboro de la Centra Oficejo. Al tiu ideo ni revenos post momento.

En la lastaj jaroj, du retaj projektoj akiris aparte grandan influon sur ĉi tiu agadkampo: *lernu.net* kaj *edukado.net*. La unua estas multlingva paĝaro por la senpaga lernado de Esperanto; la dua estas grandega kolekto de rimedoj kaj informoj por Esperanto-instruistoj. Ambaŭ projektoj estis financataj de la usona fondaĵo ESF, kaj iom post iom ekhavis propran vivon pro la konstanta alfluado de novaj vizitantoj, registritaj uzantoj, kaj volontulaj kunlaborantoj. Kvankam okazas iom da kunlaboro inter ili kaj UEA, tiuj projektoj restas esence sendependaj. Laŭ nia vidpunkto, la strategio de UEA pri Kapabligo devus nepre inkluzivi ilin. Kiel tiu kunlaboro povus aspekti, ni ne povas diri nun, ĉar ĝi povos kreski nur el dialogo. Tamen, kiel komencpunkton ni volas prezenti unu eblon en skiza formo.

Ambaŭ retaj projektoj havis iom da sukceso pri varbado de donacoj, enspezado per reklamoj kaj vendoj, kaj simile. Tiuj enspezoj tamen ne sufiĉis ĝis nun por pagi la daŭran teknikan prizorgadon kaj evoluigon de la paĝaroj; necesas daŭra subtenado flanke de ESF. ILEI, siavice, luktas kun buĝeto nesufiĉa por dungi eĉ unu oficiston. Ni proponas krei novan Fondumon (aŭ fondaĵon) por Klerigo kaj Kapabligo, sub la egido de UEA sed kun partopreno de ĉiuj kvar organizoj (aŭ eventuale kvin, kun

ESF). La celo de la Fondumo estus arigi rimedojn por financi la agadon sur ĉi tiu laborkampo, laŭ komunaj prioritatoj kaj kun la intenco iom post iom krei integritan sistemon de kursoj, instruistoj, ekzamenoj, trejnado, konferencoj, retpaĝaroj kaj eldonaĵoj. Ne necesus rapidigi tiun procezon; oni komencus ĉe la plej urĝaj bezonoj kaj la kunlaboro kaj kundecidado kreskus iom post iom.

La ĉi-suba tabelo resumas tiujn ideojn kaj proponas kelkajn SMART-celojn por tiu kampo, kiuj parte baziĝas sur la sukcesa enkonduko de la KER-ekzamensistemo.

| | **ĜENERALA STRATEGIO** | **RETA EVOLUIGO** |
|---|---|---|
| **KAPABLIGO**<br><br>**Kunordiga instanco:** Fondumo por Klerigo kaj Kapabligo, kunlabore kun ILEI/*edukado.net*/*lernu.net* | **Strategia vizio:** UEA – kleriga kaj aktiviga organizo por esperantistoj je ĉiuj niveloj, kun emfazo pri lingvaj kapabloj, movadaj scioj, interkultura komunikado<br>**Ĉefa rimedo:** Funda reorganizo de la eduka/kleriga flanko de UEA, ekz. per Fondumo por Klerigo kaj Kapabligo , cele al longperspektiva integrigo kaj kunfinancado de ILEI, *edukado.net* kaj *lernu.net*<br>**Ĉefaj agadoj:**<br>• Kursoj, seminarioj, aranĝoj por pli altaj niveloj de lingvouzado | **Strategia vizio:** UEA – kanalo por konstanta alfluado de novaj esperantistoj tra retkursoj kaj retforumoj al surlokaj kursoj kaj kulturaj aranĝoj por parol- kaj kultur-kapabligo<br>**Ĉefa rimedo:** Kunlabore kun *edukado.net*, *lernu.net*, kaj ILEI (ekz. kadre de la Fondumo), evoluigo de klerigaj kaj aktivigaj paĝaroj kaj rimedoj en la reto, kun forta ligiteco al eksterretaj agadoj kaj normoj<br>**Ĉefaj agadoj:**<br>• Daŭra evoluigo de retaj kursoj diversnivelaj kaj diversenhavaj |

| | ĜENERALA STRATEGIO | RETA EVOLUIGO |
|---|---|---|
| | • Eldonado kaj disvastigo de valoraj klerigaj verkoj en diversaj ĝenroj<br>• Instruista trejnado pri lingvo-instruado, interkultura komunikado, kultura klerigado por plenkreskuloj<br>**Kvinjaraj SMART-celoj:**<br>• Disvastigo de paroligaj/superaj kursaroj (ĝis 10 jare, diversregione)<br>• Eldonprogramo (4 titoloj jare, kresko ĝis 3000 vendoj jare)<br>• Novaj instruistoj (kresko ĝis 300 jare) | • Eksperimentado pri novspecaj kursoj kaj aranĝoj por retaj lernantoj<br>• Varbado por la KER-ekzamenoj kaj aliaj testoj de kulturaj konoj/lingvaj kapabloj<br>**Kvinjaraj SMART-celoj:**<br>• Sukcesaj trapasoj de retaj kursoj je KER-nivelo B1 (kresko ĝis 5.000 jare)<br>• Partopreno de retaj lernantoj en lokaj aranĝoj (kresko ĝis 2.000 novaj jare)<br>• Sukcesaj ekzameniĝoj je KER niveloj B1, B2, C1 (ĝis 500 jare) |

## Agadkampo Komunumo

Pli frue ni konstatis, ke la signifo de UEA por la Esperanto-komunumo kuŝas ĉefe en du karakterizaj ecoj: ĝia kapablo kunigi multajn homojn el multaj landoj (ekzemple en UK), kaj ĝia rolo kiel garantianto kaj peranto de certa kvalito en ideoj, informoj, agadoj, eldonaĵoj, ktp. Se ni kombinas tiujn ecojn, ni vidas ke estas strategie grave por UEA krei aŭ aŭspicii projektojn kaj agadojn kiuj ebligas relative vastan partoprenon (aŭ estas geografie tre disvastigitaj) kaj *ankaŭ* kvalite elstaras, almenaŭ en siaj plej bonaj ekzemploj.

Ekzemplo de tia agado, kiu estas jam kulture signifa sed povus fariĝi ankoraŭ pli influa, estas la Libroservo. Dum jardekoj tiu servo estis la plej fidinda maniero akiri iun ajn eldonaĵon en Esperanto, kaj ties Katalogo estis nemalhavebla indekso de ĉiuj aĉeteblaj verkoj. Sed en la nuna mondo, la Libroservo bedaŭrinde postrestas. Ne temas nur pri la manko de oportuna elektronika mendosistemo, sed ankaŭ pri tio, ke la reto ebligas la kultivadon de komunumoj de legantoj, muzikŝatantoj kaj simile – kaj ĝuste tia kultivado devus esti strategia prioritato de UEA. En UK okazas renkontiĝoj kun verkistoj, libroprezentoj, premiadoj kaj aliaj aranĝoj kiuj flegas nian legokulturon… sed tion eblus fari tutjare kaj en maniero alirebla por multe pli da homoj.

Laŭ nia vizio, la Libroservo estus nur unu ero en ampleksa kaj longperspektiva strategio de UEA sur ĉi tiu agadkampo. Por disvolvi kaj efektivigi tiun strategion, ni proponas krei novan Komisionon por Kultura Evoluigo, al kiu oni invitus kreantojn kaj aktivulojn el diversaj kulturaj sferoj (muziko, familioj, turismo, literaturo, scienco kaj tekniko, Vikipedio k.a.). Tiu Komisiono havus du ĉefajn taskojn: kunlabori kun la Centra Oficejo pri la evoluigo de la agadoj kaj servoj de UEA por la komunumo, kaj elkovi kaj varti diversajn projektojn partopreneblajn por multaj homoj, laŭ la modelo, ekzemple, de Vikipedio. Eblus, krome, ke tiu Komisiono havu iun rolon en la kunordigado kaj subtenado de la kunlaborantaj fakaj asocioj de UEA, kaj en la modernigo kaj ampleksigo de la Delegita Reto – du eroj en la tradicia strukturo de UEA, kiujn oni kutime (sed nepravigeble) traktas dise de la kultura kampo.

En tiu ĉi komunuma agado, la reto prezentas multajn novajn eblojn, kaj la Universalaj Kongresoj restos grava ĉiujara kulturfestivalo – sed ni vidas ankaŭ graviĝantan rolon por la regionaj komisionoj (pri Azio, Afriko, Ameriko kaj simile). Pere de regionaj kongresoj kaj aliaj aranĝoj (kursaroj kaj kunloĝadoj, konferencoj, lingvofoiroj, turneoj de muzikaj aŭ teatraj grupoj ktp), tiu regiona agado povas multe kontribui al la plivigligo kaj

pliriĉigo de la Esperanto-kulturo. Ni do antaŭvidas pli gravan lokon en la strukturo de UEA por la regionaj komisionoj, kaj la ellaboron de regionaj strategioj por kultura evoluigo en proksima kunlaboro kun la Komisiono por Kultura Evoluigo. Eŭropo, laŭ ni, devus inkluziviĝi en tiu "regionisma" strategio, kaj necesos malfermi diskuton kun ĉiuj landaj asocioj en tiu mondoparto, kaj kun Eŭropa Esperanto-Unio, pri la plej oportunaj organizaj solvoj en tiu historia vartejo de la Esperanto-movado.

Indas diri kelkajn vortojn pri plia aspekto de la komunuma agado: esperantista solidareco. La tutmondiĝon de Esperanto nature akompanis la estiĝo de novaj formoj de amikeco kaj subteno trans ekonomiajn kaj politikajn dividojn – ekzemple inter eŭropanoj kaj afrikanoj, inter japanoj kaj vjetnamanoj, aŭ inter nord- kaj sud-amerikanoj. Tiu agado okazas parte kunordigite, ekzemple per la fondaĵoj de UEA, kaj parte per individuaj iniciatoj. Strategie, UEA devus provi kreskigi la amplekson kaj kvaliton de tiu agado. Ni pensas pri modeloj kiel tiu de la evoluhelpa organizo Oxfam, kiu ebligas al donacantoj elekti inter multaj konkretaj celoj por sia kontribuo, kaj samtempe klerigas ilin pri la realaj kondiĉoj kaj kuntekstoj de la helpagado. Kiel prioritatan novan servon de UEA, ni proponas la kreon de retejo kiu plenumas similan rolon en la Esperanto-movado, prezentante la realajn kondiĉojn, bezonojn, kaj kontribu-povon de individuoj, grupoj kaj asocioj tra la mondo.


Tiujn ideojn pri la agadkampo Komunumo resumas la ĉi-suba tabelo.

| | **ĜENERALA STRATEGIO** | **RETA EVOLUIGO** |
|---|---|---|
| **KOMUNUMO**<br><br>**Kunordiga instanco:** Komisiono por Kultura Evoluigo, | **Strategia vizio:** UEA – asocio por partoprenema, aĉetema, kreema publiko sur diversaj kulturaj kaj fakaj | **Strategia vizio:** UEA – faciliganto de internaciaj projektoj sur la kampoj de kulturo, natur- kaj homsciencoj, |

| | ĜENERALA STRATEGIO | RETA EVOLUIGO |
|---|---|---|
| kunlabore kun la Roterdama CO, la regionaj komisionoj, kaj la fakaj asocioj | kampoj; portanto kaj evoluiganto de la esperantista idearo<br>**Ĉefa rimedo:**<br>Regionaj komisionoj – pli ampleksa kunordiga/inspira/organiza rolo pri regionaj kongresoj, kulturfestivaloj, konferencoj, lingvofoiroj ktp; simila rolo por kelkaj fakaj asocioj<br>**Ĉefaj agadoj:**<br>Komuna strategio pri regionaj kongresoj: programeroj, financado, teknika subteno, reklamado k.s.<br>Komuna strategio pri lingvofoiroj, konferencoj, kaj aliaj kulturaj prezentoj je regiona nivelo<br>**Kvinjaraj SMART-celoj:**<br>Kresko de partopreno en regionaj kongresoj<br>Kresko de vendoj de kulturaj varoj<br>Pli multaj kaj pli profesiaj kulturaj prezentoj en ĉiu regiono | edukado, ekonomio, naturprotektado, solidara helpo k.s.<br>**Ĉefa rimedo:**<br>Komisiono por Kultura Evoluigo – nova komisiono i.a. por la elstarigo kaj antaŭenigo de kelkaj grandaj partoprenigaj projektoj en la reto<br>**Ĉefaj agadoj:**<br>Plivastigo de la Libroservo al plenfunkcia reta vendejo kaj komunumo de uzantoj, kun aldono de recenzoj, komentoj, forumoj k.s.<br>Daŭra pliriĉigado kaj plivastigo de Vikipedio, inkluzive de projekto Vizaĝoj<br>Kreo de retejo por faciligi solidarecajn rilatojn inter esperantistoj<br>**Kvinjaraj SMART-celoj:**<br>Kresko de retaj vendoj kaj uzantoj de la reta komunumo de la Libroservo<br>Ĝis 20000 novaj vikipediaj artikoloj jare, inkl. 400 pri Vizaĝoj<br>Kresko de perretaj donacoj kaj subten-agoj |

## Agadkampo Kunordigo

La demando pri kunordigo trakuras ĉiujn agadkampojn, kiujn ni traktis ĝis nun. Eblas resumi niajn proponojn per jena diagramo:




Kadre de ĉi tiu lasta agadkampo, ni volas fokusiĝi ĉefe al la supra maldekstra parto de tiu bildo, t.e. al la roloj de la Komitato kaj Estraro, la landaj asocioj kaj la regionaj komisionoj, la Centra Oficejo kaj la individuaj membroj.

Al ni estas evidente, ke la nuna strukturo de la gvidorganoj de UEA ne estas adekvata al la strategiaj bezonoj skizitaj en ĉi tiu dokumento. La Komitato, la supera organo de UEA kiu fiksas la buĝeton, elektas la Estraron, kaj respondecas pri la Statuto kaj regularoj, kunsidas nur iom pli ol dek horojn jare, kaj apenaŭ aktivas inter la kongresoj (kvankam unuopaj komitatanoj, kompreneble, povas esti tre aktivaj). La Estraro, siaflanke, ja aktivas tra la jaro, sed kun nur 6-7 volontulaj anoj alfrontas vastan taskaron kiu pli taŭgus por sama nombro de plentempaj oficistoj. Ni

ne povas imagi, ke la programon proponitan ĉi tie eblus kunordigi en tiaj kondiĉoj.

Tial ni proponas la starigon de nova organo, kiu en la komenco povus funkcii simple kiel nova komisiono kreita de la Komitato, sed kiu fariĝus parto de la regula strukturo de UEA per posta revizio de la Statuto. Tiun novan organon ni proponas nomi la Konsilio. Ĝi havus proksimume 20 membrojn, elektitajn el inter la membroj de la Komitato laŭ diversaj kriterioj inkluzive de pruvita aktiveco sur la ĉefaj agadkampoj de UEA, regiona reprezentado, kaj specialaj scioj aŭ laborpreteco. La Estraro povus daŭre elektiĝi per aparta Komitata voĉdono, kiel ĝis nun (por ne tro rompi la tradician strukturon), sed ĉiuj estraranoj estus ankaŭ anoj de la Konsilio.

Laŭ nia ideo, la Konsilio plene dividus la taskaron de la Estraro, escepte de maloftaj konfidencaj demandoj por kiuj pli taŭgus malgranda grupo de decidantoj. Ĉiu estrarano do gvidus pli grandan teamon de homoj, kiuj estus bone informitaj pri la tuta gamo de agadoj kaj strukturoj en UEA, eĉ se ĉiu dediĉus sin al nur unu difinita tasko aŭ agadkampo. La Konsilio respondecus pri la disvolvado kaj efektivigo de la strategio sur ĉiuj agadkampoj. Ĝiaj anoj estus en konstanta kontakto inter si per retaj kaj aliaj rimedoj, kaj formalaj plenkunsidoj okazus kelkfoje jare (ekzemple ĉiun duan aŭ trian monaton).

Unu el la strategiaj prioritatoj de la Konsilio, evidente, estus la kreskigo de la membraro (kaj do la financa bazo) de UEA, laŭ ideoj skizitaj pli frue en ĉi tiu dokumento. Tion ni indikis en la ĉi-supra bildo per du grandaj sagoj, kiu montras la aliĝadon de novaj landaj asocioj (maldekstre) kaj novaj individuaj membroj (dekstre). Kvankam ne eblas plene montri la integritecon de tiu varba agado en la tuta strategio, tio espereble helpos memorigi, ke ĉi tiu strategio ne celas simple vivteni la Asocion, sed meti ĝin sur novan vojon al kresko kvanta kaj kvalita. Grava elemento en tio estos la plivastigo de la reta ĉeesto de UEA, ekzemple per la transformo de la Jarlibro kaj la Delegita Reto al rete konsultebla

kaj redaktebla datumbazo kiu faciligas kontaktojn kaj kunlaboron inter ĉiuj aktivuloj de la Asocio.

Ni diris ankoraŭ nenion pri la rolo de la Centra Oficejo en ĉi tiu strategia vizio. Neniu devus subtaksi la gravecon de la oficeja laboro: ĝi estas absolute kerna en ĉiu realisma provo plibonigi nian agadon. Kelkloke en ĉi tiu dokumento ni esprimis la konvinkon, ke kelkaj agadkampoj bezonas oficejan subtenon, kiun ili ĝis nun ne havis. Ni ankaŭ tuŝis agadojn, ekzemple la Libroservon, kiuj jam apartenas al la taskaro kaj kompetento de la Oficejo. Evidente la praktikaj sekvoj de ĉi tiu strategio por la oficeja laboro estas tre zorge esplorendaj, en kunlaboro kun la Ĝenerala Direktoro kaj aliaj oficistoj. Ne utilas ŝarĝi la Oficejon per novaj taskoj, se oni ne donas al ĝi ankaŭ la necesajn rimedojn por plenumi ilin. Ni antaŭvidas, ke la efektivigo de ĉi tiu strategio postulus signifan investon en la teknika kaj homa kapacito de la Oficejo, kaj rilatojn de reciproka fido kaj subteno inter la Oficejo, Konsilio kaj Estraro. La historio montras, ke tiaj rilatoj ne disvolviĝas de si mem: ili bezonas konscian flegadon. En ĉiuj diskutoj pri nia strategia direkto, ni tenu tiun principon firme en memoro.

En la ĉi-suba tabelo ni resumas ĉi tiujn ideojn pri la agadkampo Kunordigo.

| | **ĜENERALA STRATEGIO** | **RETA EVOLUIGO** |
|---|---|---|
| **KUNORDIGO**<br><br>**Kunordiga instanco:**<br>Nova Konsilio de UEA, kunlabore kun la Estraro kaj Centra Oficejo | **Strategia vizio:**<br>UEA – organiza kadro por strategie konscia, harmonia kunlaboro de multegaj aktivuloj diversnivele kaj tutmonde, kun kontenta kaj efika profesia stabo kaj klara divido de respondecoj | **Strategia vizio:**<br>UEA –peranto de informoj, kontaktoj kaj kunlaboro inter aktivaj esperantistoj ĉiulande por ĉiuspecaj celoj<br>**Ĉefa rimedo:**<br>Transformo de la Jarlibro kaj la Delegita Reto (eventuale ankaŭ |

| | ĜENERALA STRATEGIO | RETA EVOLUIGO |
|---|---|---|
| | **Ĉefa rimedo:** Vidu la ĉi-supran organigramon, kiu ordigas la rimedojn listigitajn sub la aliaj agadkampoj. Aldona novigo estas la kreo de ĉ. 20-kapa Konsilio kiu inkluzivas la Estraron kaj kunlaboras kun ĝi por organizi kaj gvidi la ĉefajn laborojn.<br>**Ĉefaj agadoj:**<br>Plifortigo kaj disvastigo de landaj asocioj<br>Kreskigo kaj aktivigo de individuaj membroj<br>**Kvinjaraj SMART-celoj:**<br>Vidu dekstre (samaj) | Pasporta Servo) al rete konsultebla kaj redaktebla datumbazo de UEA (ligita al *esperanto.tel* aŭ *uea.tel*)<br>**Ĉefaj agadoj:**<br>Investo en la kreo de tia datumbazo (eventuale kunlige kun ĝenerala renovigo de la datumsistemo de UEA)<br>Eksperimentado pri novaj kategorioj de membro, delegito, aktivulo<br>**Kvinjaraj SMART-celoj:**<br>Kresko de landaj asocioj kun almenaŭ 100 membroj (ĝis 80)<br>Kresko de membraro (ĝis 8000)<br>Kresko de Delegita Reto (ĝis 2000)<br>Kresko de aktivularo (ĝis 3000) |

## Kiel pluiri en la strategiaj diskutoj?

Kiel dirite en la komenco, ni celas per ĉi tiu dokumento stimuli kunpensadon kaj kundiskutadon. Strategio, kiel lingvo, ne konsistas nur el surpapera plano; kiel Esperanto mem, ĝi ekvivas en la koroj kaj mensoj de la homoj, kiuj elektas kredi je ĝi kaj utiligi ĝin diversmaniere kaj diverscele. Ni estas ankoraŭ malproksime de tiu situacio. Tamen, per ĉi tiu superrigardo de la strategia tereno, ni invitas vin ekpaŝi sur tiun vojon. Kian Aso-

cion ni volas havi? Kion ni povas fari por estigi ĝin? Kiel niaj diversaj agadkampoj kaj la tuta bunteco de niaj organizoj kaj tradicioj povas kompletigi kaj riĉigi unu la alian? Tiuj demandoj meritas la atenton kaj krean ideadon de ni ĉiuj.

Por faciligi reagojn, diskutojn kaj pluplanadon, la Komisiono pri Strategiaj Demandoj kreis retan forumon, kie eblas afiŝi komentojn, demandojn, kaj proponojn. Same en la UK en Hanojo ni bonvenigos konstruan kritikon kaj kunlaboron. Ekde nun, la fokuso de nia dokumenta laboro estos la kreo de pli detalaj strategiaj laborplanoj pri la diversaj agadkampoj. Ni esperas en la venontaj dek du monatoj kultivi vastan bazon de interkonsento kaj entuziasmo por la realiga laboro, kiu atendas nin ĉiujn.

*La Komisiono pri Strategiaj Demandoj konsistas el dek homoj elektitaj de la Komitato de UEA en Havano en 2010:*

- *Peter Balázs*
- *Osmo Buller*
- *Renato Corsetti*
- *Loes Demmendaal*
- *Mark Fettes (kunordiganto)*
- *Stefan MacGill*
- *Michael Boris Mandirola*
- *Sonja Petrović-Lundberg*
- *Ileana Schroder*
- *José Antonio Vergara.*

*Artikolo en la revuo Esperanto, februaro 2014 (n-ro 1 el 3)*

# Daŭripovo kaj ni

*Artikolserio en la februara, marta kaj aprila numeroj de la revuo Esperanto (2014)*

En mia novjara mesaĝo, kaj similtema malferma artikolo en la januara *Esperanto*, mi ligis nian aferon al la koncepto "daŭripova evoluo." Tio ja estas brule aktuala temo en la nuntempa mondo, kaj intime ligita al la idealoj de paco kaj justeco, kiuj havas longan tradicion en nia movado.

En kiu senco, tamen, ni celas eduki la homaron al daŭripovo? Kion signifas tiu ideo por nia inform-strategioj, por nia interna organizado? Por nia memkompreno?

Respondojn al tiuj demandoj ni malkovros nur iom post iom, kolektive. Per ĉi tiu artikolo kaj postaj, mi esperas stimuli kaj nutri tiajn diskutojn.

## Zamenhof kaj la francoj

Konantoj de nia historio memoros, kiom ĉagreniĝis la gvidantoj de la franca movado pri la "mistikismo" de Zamenhof, kun liaj patosaj preĝoj kaj predikoj, kaj lia emfazo pri la interna ideo. Por la francaj korifeoj, kaj por la plej potenca idea fluo de la movado tra la sekvaj jardekoj, Esperanto estis memevidente moderna komunikilo por modernaj celoj, praktika teknika rimedo kiel telefono kaj fervojo.

En tiu bildo pri nia movado, Esperanto povas simple rajdi la ondojn de la monda evoluo. Ju pli disvastiĝos modernaj pensmanieroj, modernaj ekonomioj kaj socioj, des pli evidente kaj urĝe necesos racia kaj efika solvo al "la monda lingvo-problemo."

Sed la historio ne sekvis tiujn atendojn. La tajdo de moderniĝo ankoraŭ daŭras, sed ekde la sesdekaj jaroj kreskas duboj pri tio, ĉu fakte temas pri evolumodelo kapabla daŭre funkcii je monda skalo. Unue en la Raporto Bruntland (*Nia Komuna Estonteco*, 1972), kaj poste en arego da verkoj sociaj, ekonomiaj, politikaj kaj ekologiaj, sciencistoj kaj fakuloj diversspecaj konkludis, ke ne. Simple dirite, niaj modernaj socioj konsumas tro da rimedoj naturaj, homaj, teknikaj, administraj. Longperspektive necesos alia evolumodelo, pli ŝparema, pli konforma al la ebloj kaj bezonoj de homoj kaj naturo. Al tiu ideala celo oni donis la nomon, "daŭripova evoluo."

Necesas substreki, ke daŭripovo ne estas unuavice scienca-teknika defio, kvankam scienco kaj tekniko estas nepraj elementoj en ĝi. La funda demando estas idea kaj morala – nome, kiel ŝanĝi nian kutiman pensadon pri celinda vivstilo, akceptinda konduto, pagindaj kostoj. Temas do pri ŝanĝo de kulturo, ŝanĝo de memkompreno.

En tiu lumo, la konflikto inter Zamenhof kaj la francaj gvidantoj alprenas alian aspekton. La ruslingva judo estas tiu, kiu komprenis la profundecon de la defio: ŝanĝi ne nur lingvon, sed pensmanieron.

## La vivo de la popoloj

En siaj diversaj argumentoj por "lingvo internacia," Zamenhof ĉiam insistis, ke ĝi ne "entrudiĝu en la doman vivon de la popoloj." Tiun principon ni retrovas nuntempe en la subteno de la esperantistoj al multlingvismo, la vivtenado de indiĝenaj lingvoj, kaj lingvaj rajtoj – diversaj aspektoj de la streboj sekurigi tiun "doman vivon" kontraŭ la premoj de la moderna evolumodelo.

Sed ni memoru, ke la greka prefikso *eko-* signifas ĝuste *doma* en la Zamenhofa senco. Necesas pensi kaj *eko*nomie kaj *eko*logie, dom-mastrume kaj dom-pristude, por kompreni plene

la doman vivon kaj kiel defendi ĝin. Tiuj sciencoj apenaŭ ekzistis, kiam Esperanto naskiĝis; Zamenhof neniel povis bazi siajn argumentojn sur ili. Hodiaŭ ni ne rajtas plu ignori ilin.

La valoro de neŭtrala lingvo fontas el ĝia kapablo dialoge ponti inter malsamecoj. Mondo, en kiu Esperanto daŭre havos sencon, estos mondo, kiu ekonomie kaj ekologie, politike kaj kulture, gardas la diversecon.

Sed ĝuste tio estas unu difino de la daŭripovo!

Laŭ Unesko, la branĉo de Unuiĝintaj Nacioj taskita pri edukado por daŭripova evoluo (EduDE), daŭripovan socion karakterizas:

- *paco kaj justeco* (harmonia kunvivado);
- *demokratio* (respondeca mastrumado kaj regado);
- *daŭripova disvolvado* (ekologi-konforma ekonomio);
- *konservado de naturaj sistemoj* (mediprotekado).

Ĉiu ero en tiu listo rilatas al la pontado inter malsamaj identecoj, interesoj, bezonoj, kaj la ŝirmado de la malfortaj (homoj, kulturoj, specioj, vivsistemoj) kontraŭ ekspluatado. La valoroj de daŭripova mondo estas valoroj zamenhofaj.

Evidente, tiu konstato ne faciligas nian taskon. Sed ĝi ja plivastigas la gamon de niaj aliancanoj. La sorto de Esperanto en la 21a jarcento intime ligiĝos al la progreso al daŭripova monda socio; ni memfide viciĝu inter la movadoj laborantaj tiucele.

Kaj la sekvoj por nia strategio? Pri tio venontfoje.

*Artikolo en la revuo Esperanto, marto 2014 (n-ro 2 el 3)*

# La daŭripova vojo (1)

Se la Esperanto-movado alianciĝos kun aliaj movadoj por "daŭripova mondo," kiel mi proponis en la februara numero, tio havos strategiajn sekvojn. Ne nur por niaj "eksteraj rilatoj," kiel oni diras, sed por ĉiuj agadkampoj en la Strategia Laborplano:

Konsciigo, Kapabligo, Komunumo kaj Kunordigo. En ĉi tiu kaj la venonta numero, mi provos iom prilumi tiun evoludirekton.

Temas, evidente, pri tre longa perspektivo. La moderna epoko en la okcidentaj socioj daŭris jam tri-kvar jarcentojn; necesos certe pluraj generacioj por ellabori ion novan. Sed ĝuste tion ni bezonas: analizon, kiu helpas nin rigardi pli malproksimen ol nur tri-kvar jarojn, kiel en la nuna Plano. Eĉ se la vido estas iom maldetala, ĝi povos orienti nin kaj doni senton pri la irenda vojo.

## Multlingve, realisme

La Konsciiga defio por ni estis ĉiam duflanka: unue, informi pri la realo kaj la ebloj de Esperanto; due, montri kial ĝi estas bezonata. Kiel ni vidis en la lasta artikolo, la ĉefa tendenco en la movado estis prezenti ĝin kiel "modernan lingvon," do kiel rimedon por atingi modernajn celojn – t.e. pli racian, ordan mondan socion.

Sed la logiko de la moderno (en la praktiko, se ne en la teorio) kondukas ne al Esperanto, sed al mondo kie superregas unu industria kaj imperia lingvo (konkrete, en nia epoko, la angla). La sama logiko subpremas kaj marĝenigas pli kaj pli da lingvoj pli malgrandaj, ĝis la prognozata malapero de 90% de la lingva

diverseco sur nia planedo. Tia mondo ne bezonas Esperanton, nek bezonos ĝin estonte.

Tial niaj argumentoj devas celi pli vasten. Se ni laboras por mondo, en kiu Esperanto trovos sian plenan disvolviĝon, ni devas ŝanĝi la pensadon de la homoj pri la mastrumado de lingva diverseco entute. Socio, kiu rajtas nomi sin vere daŭripova, estos socio multlingva kaj multetna, kie plej diversaj komunikaj rimedoj (inkluzive de signolingvoj, maŝina tradukado, homaj interpretistoj, ktp.) servas la celojn de ekonomia kaj kultura integriĝo kaj disvolviĝo. En tia socio, la elekto de taŭga kombino de lingvoj por difinita celo estos grava kaj baza demando, ne io lasata al la hazardo aŭ la premoj de unulingvismo.

Sed tia socio povos ekesti kaj funkcii nur pere de homoj lingve konsciaj, lingve kleraj. En nia nuna mondo amasas miskomprenoj kaj miskredoj pri lingvaj aferoj, interalie pro la profunda influo de naciismaj ideologioj en la moderna mondbildo. Tial, baze de nia celaro, ni devus vidi nin kiel kleriga movado, kiu edukas niajn kunhomojn pri la ebleco rilati al lingvaj fenomenoj kaj lingvaj diferencoj el tutmonda, homarana, sed ankaŭ senkompromise realisma perspektivo.

## La vivo de la plantoj

Jen, laŭ mi, la ĉefa "propedeŭtika valoro" de Esperanto. Ĝi malfermas vojon – eĉ se ne ĉiu esperantisto sukcesas trovi ĝin – al pli sana, pli paca, pli inkluziva kompreno pri la lingva dimensio de nia homeco.

Sed ĉi tie Konsciigo kolizias kun Kapabligo. Por sekvi la daŭripovan vojon, ni bezonas multe pli emfazi, en la E-instruado, ian akompanan prilingvan kleron. Ĉar tion neglektas la modernaj lernejaj sistemoj, ni devos mem kompensi tiun mankon, perante konon de bazaj lingvaj konceptoj, de lingvo-sociologio kaj lingvo-politiko, de terminologio kaj tradukado, kaj ankaŭ de lingvo-instruado kaj lingvo-lernado, kiuj rolas tiel kerne en nia

agado. Lerni nur la lingvon estas kvazaŭ aĉeti aŭton, ne sciante kiel stiri aŭ ripari ĝin; aŭ semi ĝardenon, sen kompreno pri la vivo de la plantoj.

Nu, tia nescio estas preskaŭ difina elemento de modernaj socioj, en kiuj nia ĉiutaga vivo dependas de vastaj kaj kompleksaj sistemoj preter nia kono. Kuraci tion postulos, kiel mi diris en la komenco, longdaŭran kaj penan laboron. Sed tio estas ankaŭ invito kaj instigo.

Jam multaj spertis la krean forton de Esperanto, kiu tiel videblas en nia literaturo. Tiun kreemon ni devas mobilizi ankaŭ por nia propra klerigado. Ĝis nun, ni plejparte simple paŭsis la sistemojn de la naciaj lingvoj. Ni revas pri lerneja instruado, kaj surpriziĝas, kiam miloj da hungaraj mezlernejanoj malaperas senspure post ricevo de sia diplomo. Ni investas en kursoj kaj lernolibroj, kiuj kapabligas lingve sed ne movade; la sukcesajn lernantojn glutas la sistemo de enfermitaj societaj kluboj kaj renkontiĝoj. Ĉio ĉi ne okazas pro la ecoj de Esperanto mem, sed malgraŭ ili – pro nia insisto trakti ĝin, kvazaŭ ĝi estus nur unu plia lingvo.

Ni devas kreski preter tion: kiel movado por konscia multlingvismo; kiel kultivejo de multlingvaj konoj kaj kapabloj. Tiuj ecoj jam embrias en nia komunumo. Pri la sekvoj por nia kultura kaj organiza evoluigo, mi verkos venontfoje.

*Artikolo en la revuo Esperanto, aprilo 2014 (n-ro 3 el 3)*

# La daŭripova vojo (2)

En la lasta numero mi komencis esplori, kiel la Esperanto-movado povos kaj devos evolui, se ni aliancigos kun aliaj movadoj por "daŭripova mondo." Mi argumentis, interalie, ke ni estas "movado por konscia multlingvismo," kaj ke nia kursoj, lernolibroj, kaj informpolitiko devus speguli tiun fakton.

Sed ekzistas alia flanko de la movado, egale esenca, kies kerno estas ne lingva sed kultura. Esperanto ebligas alispecajn rilatojn kaj alispecan kunlaboron inter homoj el malsamaj vivofonoj. Eblas nomi tion la ponta forto de la amikeco (kiel faris nia antaŭa prezidanto Probal Daŝgupto); eblas paroli pri la "humaneca internaciismo," laŭ siatempa formulo de Ivo Lapenna; eblas citi la paroladojn kaj kantojn de Zamenhof, kiu proklamis la kreon de "granda rondo familia." La vortoj ne tiom gravas; sed jes gravas agnoski la rolon de tiu kulturo de solidareco kaj kunkreado en la evoluo de Esperanto kiel socia fenomeno.

Hector Hodler, la fondinto de UEA, klare vidis tion. La sola oficiala celo de lia Asocio estis "la plifaciligo de la ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreo de fortika ligilo de solidareco inter ĝiaj anoj." Tiuj celoj restas en la hodiaŭa Statuto, sed ilin ofte superombras la celoj poste aldonitaj: "la disvastigo de Esperanto" kaj "la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj." Kiel ni nun vidos, en la laboro por daŭripova mondo, la origina vizio de Hodler regajnos sian prioritatan gravecon.

## Kultura evoluigo: kvar prioritatoj

Mi jam klarigis, en pli fruaj artikoloj, ke "daŭripovo" estas tre multflanka koncepto, kiu rilatas ne nur al la natura bazo de la homa ekzisto, sed ankaŭ al la kultivado de sanaj kaj pacaj

homaj socioj. Tio estas, unuavice, kultura problemo. Nia memkompreno, nia konscio pri niaj kunestaĵoj (homaj kaj nehomaj), niaj ĉiutagaj kutimoj de manĝado, vestado, laboro, distro… ĉiuj ĉi estas aferoj, pri kiuj decidas nia kulturo multe pli ol ni kiel individuoj.

Kiel nur lingva movado, ni povus neglekti multajn el tiuj faktoroj. Kiel ankaŭ kultura movado, ni devas alfronti ilin.

La tria ĉefa agadkampo en la Strategia Laborplano nomiĝas Komunumo. Fakte la nomo ne estas plene kontentiga; ĝi kovras ĉion, kion oni tradicie celas per "utiligo de Esperanto," "faka kaj scienca agado," "kulturo" ktp, sed ankaŭ la solidarajn rilatojn inter esperantistoj, la Delegitan Reton, kaj diversajn aliajn facetojn de la movada vivo. Temas esence pri nia Kulturo en plej vasta senco, do ĝuste pri "la ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj" celitaj de Hodler kaj la frua UEA.

Sur la daŭripova vojo, ni devas demandi nin, kiel evoluigi tiun kulturon por respondi al la bezonoj de estonta monda socio? Mi vidas plurajn prioritatojn.

Unue, ni ne bone pretigas niajn anojn por la defioj de interkultura kompreno. Paroli saman lingvon ne sufiĉas por interkompreniĝo. Sed la lingvo ja malfermas spacon, kie povas okazi interkultura kleriĝado de vere alta grado. Do, iom post iom, niaj renkontiĝoj devus fariĝi okazoj ne nur por ĝui niajn komunaĵojn, sed ankaŭ por esplori niajn diferencojn, jen serioze kaj fake, jen gaje kaj lude.

Due, tiu kleriĝado devus inkluzivi niajn rilatojn kun la naturo, ne nur en planeda skalo, sed ankaŭ je loka kaj regiona niveloj. En niaj kongresoj, ekzemple, okazas kursoj kaj prelegoj pri lingvoj kaj kulturoj de la gastiganta lando, sed malofte pri ties arbaroj kaj riveroj, ties birdoj kaj bestoj, aŭ pri la ekologiaj defioj, kiujn frontas la kongresa urbo kaj regiono. Ni devas vidi nin kiel ponto inter ĉiuj malsamecoj, ne nur la homaj.

Trie, ni devas serioze aliri la ekonomian malegalecon, kiu por multaj homoj malhelpas plenan partoprenon en la movado. Tio signifas interalie malfermi niajn kongresojn al pli intensa kaj kontentiga reta partopreno, kaj elserĉi malmultekostajn manierojn disvastigi niajn kulturajn produktojn, kiel libroj, muziko, filmoj ktp.

Kvare, ni devas plifaciligi la spontanan komunikadon kaj kunagadon de homoj el ĉiuj mondopartoj surbaze de komunaj interesoj kaj celoj. Antaŭ cent jaroj, la Jarlibro estis genia eltrovaĵo por tiu celo. Nun la reto proponas multe pli vastajn eblojn, kiujn ni apenaŭ ekspluatis ĝis nun.

## Por organiza renovigo

Per tiu lasta konstato, ni venas al la bezono repripensi la bazajn funkciojn kaj strukturon de UEA mem. Temas do pri la lasta agadkampo: Kunordigo.

La nuna strukturo de UEA apartenas al la 20a jarcento. La daŭripova vojo apartenas al la 21a. Fenomenoj kiel *lernu.net*, kiu sukcesas arigi lernantojn en landoj kie plene mankas organizita movado, aŭ kiel *Muzaiko*, kies elsendoj en Esperanto atingeblas el ĉiuj anguloj de la mondo 24 horojn tage, estis neimageblaj antaŭ dudeko da jaroj. Daŭros tiaj evoluoj.

Ni do devas ekpensi pri pli flekseblaj kaj adaptiĝemaj strukturoj, en la kadro de naskiĝanta tutmonda socio. La defio malfacilas. La mondo ankoraŭ grandparte funkcias surbaze de sendependaj ŝtatoj, do necesas plue organiziĝi kaj kunagi je landa nivelo por diversaj celoj. Sed la nuna evoluvojo klare kondukos al ĉiam pli granda rolo por translima kunplanado kaj kunagado.

Nia movado sola ne povas krei daŭripovan mondan socion. Sed ni povas jes strebi reformi nin en avangardon de tia monda socio, ne nur lingve, sed ankaŭ kulture kaj organize. Kiel mi jam plurfoje emfazis, tio ne estos nur kelkjara laboro, sed tasko por jardekoj. Tamen, indas jam konscii pri la irenda vojo. Kaj ekpaŝi, kuraĝe.



## Parto 2

# Ses jaroj prezidaj

# Enkonduke al Parto 2

Du jaraj verk-okazoj atendas ĉiun Prezidanton de UEA. Iusence ambaŭ rilatas al jarkomencoj. La kalendara jaro, kiu kuras de januaro al decembro, tradicie inaŭguriĝas per novjara mesaĝo, kiu povus esti nur rutinaĵo, sed kiu fakte donas okazon por iom pripensi la situacion kaj evoluon de la movado en monda skalo. Kaj la ekiro de la Esperanta jaro, per la Tago de la Unua Libro la 26an de julio, koincidas (pli-malpli) kun la malferma ceremonio de la jara Universala Kongreso, en kiu centran lokon havas t.n. festparolado, ofte (kvankam ne nepre) en plenumo de la Prezidanto mem.

Ĉar mi ŝatas verki, kaj mi alte taksas la oratoran arton, mi profitis ambaŭ okazojn por disvolvi miajn ideojn en relative polurita formo. Mi skribas "relative," ĉar ĉiam temis pri rigoraj limdatoj, fiksitaj de la revuo *Esperanto* (por la januara numero) aŭ de la kongresa inaŭguro. Plej ofte mi metis la finajn tuŝojn al la festparolado en la sabata nokto, aŭ eĉ la dimanĉa mateno, antaŭ la solenaĵo. La disciplino de tiuj limdatoj (limhoroj?) tamen helpis doni al la tekstoj iun viglon, kiun mi ankoraŭ retrovas en ili, jarojn poste.

La enhavon de la festparoladoj forte influis la koncernaj kongresaj temoj, al kiuj mi eksplicite aludas en la tekstoj. En 2015 kaj 2016 kunrolis aliaj kuntekstaj konsideroj. Por la 100a Universala Kongreso, proksime de la urbo de la unua UK, mi volis nepre enfokusigi la pensaron de Zamenhof kaj precipe liajn vortojn en Bulonjo-ĉe-Maro. La postan jaron, en Nitro, mi volis emfazi la ligitecon de Esperanto kun homaj rajtoj, pro samurba konferenco pri lingvo-politiko, organizita de Jozef Reinvart kun loka universitato. En ĉiuj paroladoj, mi krome strebis elstarigi iujn aspektojn de la gastiganta urbo, aŭ lando, kiuj helpas prilumi la temon kaj estigi sentojn de parenceco kaj hejmeco inter la kongresanoj kaj la lokanoj.

La novjaraj mesaĝoj ĝenerale spegulas miajn zorgojn aŭ esperojn en la monato (decembro), kiam mi verkis ilin. Fine de 2013 kaj 2014, mi volis komuniki pli optimisman, ekspansian vizion pri la movado, ol tiu kiun mi ofte renkontis en esperantistaj rondoj. Fine de 2015, jaro de atencoj kaj teroraĵoj en multaj landoj (kaj jaro ankaŭ de la "krizo de rifuĝintoj" en Eŭropo), mi sentis bezonon reaserti kaj reaktualigi la porpacan mision de Esperanto, kvankam sen troaj pretendoj; kaj dek du monatojn poste, la Zamenhof-Jaro donis al mi okazon loki tiujn ideojn eĉ pli firme en niaj penstradicioj. Post tio, mian energion sorbis precipe internaj movadaj demandoj (organizaj, financaj, politikaj, personaraj), kaj miaj mesaĝoj por 2018 kaj 2019 reflektas miajn zorgojn pri la kohereco kaj solidareco de niaj organizoj kaj nia membraro tra tiu malfacila periodo.

Mi elektis disigi ĉi tiun serion de la aliaj tekstoj en ĉi tiu volumo, ĉar plaĉas al mi tiu sesmonata ritmo, alternanta inter novjara skizo kaj festparola elokvento.

*Malferme (revuo Esperanto, januaro 2014)*

# Por fariĝi amasmovado

Vi trovas en viaj manoj, aŭ sur via ekrano, renovigitan revuon. Nia nova redaktoro, Fabricio Valle, energie ĵetis sin en la laboron por rekoncepti kaj relanĉi ĉi tiun gvidan velŝipon de la esperanta gazetaro. Nun li atendas viajn reagojn, konsilojn, kaj kunlaboron en la pluvelado.

Mi persone tre ĝojas pro la entuziasmo kaj ambicio de Fabricio, ĉar la redaktoro de la revuo estas kvazaŭ aldona estrarano de UEA, kiu helpas doni direkton kaj agordi la tonon de la tuta Asocio. Aliflanke necesas agnoski, ke la renovigo de la revuo estas nur unu paŝo en tiu pli vasta renovigo, kiun celas la nuna Estraro.

Enkonduke al la nova jaro, kaj prilume al la kovrila temo, mi ŝatus dividi kun vi kelkajn pensojn pri tiu renovigo. Pli ĝuste, pri nur du ŝlosilaj demandoj: kia movado ni fakte estas? Kaj kiel evolui al movado, kiu povas ŝanĝi la mondon?

## Plenumo de deziroj

Kiu movadano ne devas foje respondi al la demando, kiom da homoj fakte parolas la lingvon? Kaj oni parolas jen pri dekmiloj, jen pri centmiloj, eĉ foje pri milionoj da esperantistoj, kvankam ni ĉiuj scias, ke en la lastaj jaroj UEA apenaŭ sukcesas kunskrapi kvinmilon da individuaj membroj.

Evidente gravas la difinoj. La KER-ekzamenoj, ekzemple, liveras al ni utilan difinaron, pri lingvokapabloj en niveloj A1 ĝis C2. Ĝis nun la ekzamenojn trapasis, en unu nivelo aŭ alia, ĉ. 1400 homoj. Estus bele, se ni povus kreskigi tiun nombron al 14.000, aŭ eĉ al 140.000, ĉar tio komencus doni pli kredindan bildon pri la amplekso de la lingvo-komunumo. Kaj tia dokumentado ja apartenas al niaj prioritatoj.

Sed ne tiel, aŭ ne nur tiel, ni ekhavos amasmovadon. Por tio necesas plivastigi nian komprenon de esperantisteco, por inkluzivi ankaŭ niajn *samideanojn*. Kiel foje skribis Helmut Welger, ni pli bone komprenos Esperanton se ni imagos ĝin, ne kiel lingvon kun interna ideo, sed kiel ideon kun interna lingvo. Kaj tiu *ideo* – de homa digno, homa solidareco, egaleca kaj sincera interhoma komunikado je tutmonda skalo – estas tio, kio povas tuŝi la korojn de milionoj.

De Kees Ruig, nederlanda fakulo pri enmerkatigo, mi lastatempe ricevis la konsilon: aĉetantoj ne aĉetas produkton, ili aĉetas dezirplenumiĝon. Do, necesas konscii, ke ni vendas ne nur lingvon. Ni vendas unue, kaj ĉefe, homaranecon.

## Paroli kaj aŭskulti

Per "homaraneco" mi celas la senton, ke oni mem aktive partoprenas en iuspeca tutmonda kulturo – ne simple kiel konsumanto aŭ kliento, sed kiel kunkonstruanto. Tiu kulturo mem, do, estas alia ol la kulturo de la grandaj kompanioj kaj interŝtataj kunvenoj. Oni povus nomi ĝin "civitana kulturo" aŭ, kiel proponas Fabricio ĉi-numere, "kulturo de la tria sektoro". Mia elekto de "homaraneca" omaĝas la pensaron de Zamenhof, al kiu ni ŝuldas pioniran laboron pri ĝia etika bazo.

Kiom da homoj en nia nuntempa mondo sentas ligitecon al tiu homaraneca kulturo? Certe temas pri minoritato: ĉu 2%? 5%? Tutmonde, tamen, temas tutcerte pri dekoj da milionoj. Tiuj homoj estas niaj aliancanoj – niaj samideanoj. Multaj el ili verŝajne neniam aŭdis pri Esperanto. Ili estus tamen pretaj subteni ĝin, ĉar ĝi kongruas kun iliaj valoroj, ilia mondbildo.

Por fariĝi amasmovado, ni devos do lerni paroli kun tiuj homoj. Tio signifas ankaŭ lerni aŭskulti ilin. Ni alportas homaranecan rigardon al la lingva sfero; ni elserĉu kaj akceptu homaranecajn kontribuojn en aliaj sferoj. La fakto, ke UEA jam de 65 jaroj

emfazas la ŝlosilan gravecon de la homaj rajtoj en nia laboro por Esperanto, estas modelo de tia evoluo; sed ni ne imagu, ke tie jam finiĝas niaj devoj.

## Ĉu la nepoj nin benos?

Tiel tekstas, iom provoke, la unua parto de la kongresa temo de la venonta UK en Bonaero. Pri ĝi vi povos legi pli amplekse alipaĝe. Ĉi tie sufiĉas konstati, ke la temo traktas ĝuste la kampon, al kiu mi aludis ĉi tie.

Kial ne ekkoncepti nin kiel movado por daŭripova evoluo? Aŭ, eĉ pli bone, kiel *eduka* movado por daŭripova mondo? Kiel movado, kies edukado okazas ĉe la radikoj de la homa identeco, en tiu profunde intima, emocia, intuicia nivelo de la lingvokono?

Esperanto: lingvo por daŭripova mondo. Jen slogano por ni en ĉi tiu nova jaro. Slogano, kiu postulas laboron ankaŭ de nia flanko, por kompreni ĝian amplekson, ĝiajn implicojn.

Malgraŭ la saĝo de Zamenhof, ne sufiĉas pacience elteni. Necesas ankaŭ dinamike evolui. Nia renovigita revuo proponas daŭran inviton: evoluu kun ni!

*Festparolado en la 99a Universala Kongreso de Esperanto (Bonaero, Argentino, la 27an de julio, 2014)*

# Ni ne estas solaj

Karaj kongresanoj, karaj honoraj gastoj, estimataj gesinjoroj,

Mi komencos per kelkaj vortoj, kiujn eble rekonos la argentinanoj inter ni:

*Ĉi tie do mi ekkantas*
*laŭ ritma sono gitara,*
*ĉar kiun neordinara*
*sufer' afliktas, simile*
*al bird' soleca, laŭttrile*
*konsolas lin kanto klara.*

Tiel malfermiĝas unu el la grandaj verkoj de la argentina literaturo, *El gaucho Martin Fierro*, epopea poemo de José Hernández el 1872. Kiel vi jam povas diveni, ĝi ne rakontas gajan aventuron, sed la tre malfacilan vivovojon de argentina gaŭĉo, kiu maljuste perdas sian familion.

*Bonvolu ĉiuj memori*
*pri jenaj vortoj de vero :*
*en la lernej' de sufero*
*mi havis mian lekcion*
*kaj studis mi tie ĉion*
*ek de l' plej frua espero.*

*Martin Fierro* estis vaste populara en sia epoko, kaj ne nur inter argentinanoj. Temas pri portreto, ne nur de homo, sed de tuta popolo kies sorto estas minacata de sociaj fortoj preskaŭ ne regeblaj. La verko estas defio al tiuj, kiuj vidas nur unu veron, unu vojon al progreso, unu recepton por la socia evoluo. Ĝi asertas la valoron de la fremdulo, la aliulo, la marĝenulo, kontraŭ ĉiuj regantaj supozoj kaj antaŭjuĝoj.

Antaŭ precize duona jarcento, en 1964, Esperanta traduko de *Martin Fierro* fariĝis la kvina verko de la mondliteraturo, akceptita por la Serio Oriento-Okcidento de UEA. Kaj la ideo por tiu traduko naskiĝis ĝuste ĉi tie, en Bonaero, en la kadro de multjara amikeco de speco, kiun ĉiu esperantisto rekonos – amikeco trans la limoj de nacieco, lingvo, profesio, klaso, aĝo.

La tradukanto de *Martin Fierro* estas Ernesto Sonnenfeld, germanlingvano kiu ekkreskis en la ŝtato Aŭstrio-Hungario, fariĝis plenkreskulo en sendependa Ĉeĥoslovakio, kaj fine elmigris al Argentino en 1938, kiam la situacio en Centra Eŭropo klare survojis al nazia superregado. En Bonaero li konatiĝis kun la mondvojaĝanto Tibor Sekelj, juna hungardevena jugoslava civitano, kiu alvenis en 1939 kaj en la postaj jaroj fariĝis fama argentina ĵurnalisto, esploristo kaj aŭtoro.

Ĉar tiel funkcias Bonaero: ĝi estas granda haveno por homoj el la tuta mondo, kaj aparte el tuta Eŭropo. Argentinanoj foje nomas sin “la idoj de la ŝipoj,” kaj jen ni vidas ilin, du tiajn ŝipanojn, kiuj en la ŝtormo de mondaj eventoj renkontiĝas ĉi tie, en la trinkejoj kaj restoracioj, la muzikejoj kaj teatrejoj de Bonaero. Kaj kiuj trovas en la argentina kulturo tion, kion ili serĉas: vivoĝuon kaj gastamon; valorigon de la individuo; akceptemon pri diverseco; kaj la kapablon elturniĝi kaj adaptiĝi, eĉ en plej malfacilaj cirkonstancoj.

Do, oni povas diri, ke estas granda kongruo inter la argentina kulturo kaj la Esperanta kulturo. En tiu senco estas iom surprize, ke nur nun, en nia 99a kongreso, ni finfine venas al Bonaero. Ja la urbo kvazaŭ atendas nin de la komenco. Kaj mi certas, ke vi ĉiuj kaptos la okazon por iom konatiĝi kun ĝia riĉa pasinteco, ĝia vigla surstrata vivo, ĝiaj muzeoj, manĝejoj kaj vendejoj.

Sed mi volas nun paroli iom pri la estonteco – ne nur de ĉi tiu urbo, nek de ĉi tiu lando, sed de ni ĉiuj – de nia mondo. Ĉar ni memoru, ke tiu ĉi estas nia mondkongreso, eĉ se de tre modesta grandeco, kiu donas al ni okazon rigardi trans la limojn de nia ĉiutaga vivo, niaj propraj zorgoj, al pli grandaj demandoj.

Nia kongresa temo starigas ĝuste tian demandon: "Ĉu la nepoj nin benos?" Ĝi aludas kompreneble al la fama poemo de Zamenhof, "La vojo" –

*Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,*
*pri l' tempoj estontaj pensante.*
*Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, –*
*ni semas kaj semas konstante.*
*"Ho, ĉesu!" mokante la homoj admonas, –*
*"Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas:*
*"Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,*
*se vi pacience eltenos".*

"Obstine antaŭen." Ni ĉiuj komprenas, kion Zamenhof volis diri per tiuj vortoj – ke ni ne perdu kuraĝon, se ni elektis vojon kiu ne estas tuj komprenebla por aliaj homoj. Kaj ni efektive bezonis tiun kuraĝon ofte en la 118 jaroj, kiuj pasis post la apero de "La vojo" en *Lingvo Internacia*. Tamen, se ni rigardas iom pli vaste, pensante ne nur pri Esperanto, sed pri la tuta evoluvojo de la homaro en tiuj 118 jaroj, tiuj vortoj povas soni iom ironie.

Obstine antaŭen – en la tranĉeojn de la Unua Mondmilito.

Obstine antaŭen – en la disvastigo de senbrida kapitalismo, kiu kondukis al la ekonomia kolapso de la tridekaj jaroj, kaj daŭre minacas la stabilecon kaj socian koherecon de multaj landoj tra la mondo, inkluzive de tiu ĉi lando, Argentino.

Obstine antaŭen – al la eksportado de la okcidenta modelo de demokratio, aŭ la okcidenta modelo de komunismo, ambaŭ ĉe la fino de pafilo.

Obstine antaŭen – al la disvastigo de industria agrikulturo kiu detruas la grundon, malpurigas la akvojn, kaj senposedigas la etbienulojn.

Obstine antaŭen – al pli kaj pli intensa utiligo de karbo, nafto, tergaso, fosiliaj energifontoj kiuj intertempe liberigis tiom da karbondioksido, ke la klimato de la tuta planedo komencas ŝanĝiĝi.

Obstineco ne sufiĉas. Necesas ankaŭ saĝo. Necesas la preteco rigardi klarvide la propran konduton, la proprajn konvinkojn, kaj la preteco ŝanĝi ilin, se necese.

Nia ĉi-jara kongresa temo donas okazon por tiaj diskutoj. Ni lernu unu de la aliaj, ĉar finfine por tio Esperanto estas kreita – por ebligi al ni ĉiuj pliriĉiĝi per la spertoj de aliaj, la vidpunktoj de aliaj, la esplorado kaj ĝuado de nia komuna homeco. Kaj parto de tiu homeco troviĝas ĝuste en la situacioj, kiuj prezentas al ni *Martin Fierro* – kiam ni, kiel individuoj, sentas nin preskaŭ senpovaj kontraŭ la premo de eventoj, la tajdo de la historio. Ĉiu el ni, en ĉi tiu epoko, en ĉi tiu mondo, estas ankaŭ parte gaŭĉo.

Frontante tiujn defiojn, ni tamen povas preni konsolon el la vortoj de alia granda argentinano, la bonaera verkisto Jorge Luis Borges. Borges estis granda admiranto de *Martin Fierro* kaj ĝia elstarigo de la valoroj de individuismo, de rezisto al la premoj de maljusta socia sistemo. Sed li estas ankaŭ tiu verkisto kiu diris, fine de sia vivo:

"Mi ne certas ke ekzistas *mi*, efektive. Mi estas ĉiuj verkistoj kiujn mi legis, ĉiuj homoj kiujn mi konis, ĉiuj virinoj kiujn mi amis, ĉiuj urboj kiujn mi vizitis, ĉiuj miaj prauloj."

Tiel estas ankaŭ por ni esperantistoj. Ni ne estas solaj. Ni estas ĉiuj verkistoj kaj tradukantoj kiujn ni legas, ĉiuj muzikistoj kiujn ni aŭskultas, ĉiuj amikoj kiujn ni renkontis tra la mondo, ĉiuj urboj kie ni kongresis, ĉiuj niaj pioniroj.

Dum ĉi tiu kongreso, mi esperas ke vi sentos la forton, la potencon de tiuj tradicioj, kiuj portas nin antaŭen. Diskutu bone, laboru bone, trejniĝu bone, amikiĝu bone, distriĝu bone. Ĝuu la lingvon. Ĝuu Bonaeron!

*Novjara mesaĝo 2015*

# Turopintoj kaj turnopunktoj

Ni esperantistoj ŝatas festojn. Mi aprezas tiun econ; ĝi montras ion gravan pri la spirito de la lingvo kaj movado, iajn vivoĝojon kaj dankemon, kiuj certe helpis al ni travivi la lastan defioplenan jarcenton.

Tiel estas taŭge malfermi ĉi tiujn jarmalfermajn pensojn per aludo al la 100a Universala Kongreso, kiu post nur kelkaj monatoj bonvenigos homojn el la tuta mondo al Lillo, Francio. Tiu gaja evento estos ankaŭ la pinto de la Jaro Montevideo 60, okazo por prifieri diversmaniere nian sesdekjaran kunlaboron kun Unesko. Ambaŭrilate, ni havas multajn kaŭzojn por ĝojo, multajn kaŭzojn por dankemo. Pensu nur pri tio, kiom kreskis nia kulturo dum tiuj jardekoj, aŭ kiom pli tutmonda estas nia komunumo, ol ĝi estis en 1905!

Temas do pri festa jaro, jaro animaltiga, kiun bele simbolas la Lilla turopinto en la kongresa emblemo. Sed atendas nin ankaŭ laboro, ĉar ni troviĝas ankoraŭ longe for de niaj revoj kaj aspiroj. Gravas ne nur agnoski la atingitajn pintojn, sed ankaŭ elserĉi la eblajn turnopunktojn, kiu povus malfermi novajn ŝancojn por nia lingvo kaj movado.

Tiurilate indas noti, ke 2015 estos grava jaro por Unuiĝintaj Nacioj, kiam diversaj plurjaraj streboj (pri edukado, pri evoluigo, pri klimatŝanĝo) atingos sian kulminon. Interalie, la Jarmilaj Evoluigaj Celoj atingos sian limdaton kaj bezonos renovigon. Temas pri kolekto de la ĉefaj prioritatoj por la UN-sistemo kiel tuto; inter la Jarmilaj troviĝas i.a. la universaligo de baza edukado, la reduktado de infanaj mortoj, kaj la provizado de pura trinkakvo. En la lastaj jaroj, la neceso interkonsenti pri novaj ce-

loj post 2015 spronis vastan debaton pri la prioritataj direktoj de la evoluiga politiko, en kiu rolas konsideroj pri homoj rajtoj, daŭripovo, enurbiĝo, migrado, kaj aliaj nuntempaj tendencoj.

Se *ni* rigardus dudek jarojn antaŭen, kiel oni klopodas fari nun en UN, kion ni ŝatus vidi? Sendube mondon, en kiu oni pli serioze traktus la defiojn de multlingveco. Mondon, en kiu Esperanto estus pli vaste rigardata kiel valora rimedo por kunlaboro kaj interkompreniĝo, kiel vojo al pli egalecaj kaj solidaraj rilatoj inter homoj el malsamaj landoj kaj kulturoj. Mondon, en kiu ni nombrus la membrojn de UEA ne per miloj, sed per centmiloj.

Tiuj celoj estas interligitaj. Ne eblas atingi la lastan, sen progresi pri la aliaj. Tial UEA tiel insistas en la rondoj de UN pri lingvaj rajtoj, pri lingva egaleco, pri la protektado de malgrandaj lingvoj kaj kulturoj. Organizo, kiu flankenmetas tiajn demandojn, certe ne estos preta serioze konsideri la rolon de nia lingvo en la streboj por pli justa mondo.

Nu, se ni rigardas la nunan debaton pri evoluigo, ne tuj troviĝas multaj kialoj por optimismo. Lingvo preskaŭ tute mankas kiel temo en la prepardokumentoj por la evoluigaj celoj post 2015. La fakto, ke tiuj dokumentoj aperis nur en la angla, estas plia signo de tiu malzorgo pri lingvaj demandoj. En la tuta kompleksa sistemo de UN, kun dekoj da diversfakaj branĉoj kaj organoj, ŝajne troviĝas neniu memkonscia ĉampiono de la multlingvismo, nek pledantoj por kohera lingvopolitiko bazita sur klaraj principoj kaj realisma analizo.

Aliflanke, disvastiĝis la konscio, ke la ĝisnunaj evoluigaj modeloj estas mankohavaj, ĝuste ĉar ili ne traktas la profundajn radikojn de socia malegaleco, sed koncentriĝas al simptomoj (kiel ekzemple la manko de pura akvo, kiu ja estas ege grava, sed rezultas el historie kreskintaj strukturoj de ekonomia kaj ekologia maljusteco). Tiaj kritikoj venas ne nur de akademiaj esploristoj kaj funkciuloj de UN, sed ankaŭ de homoj en influaj pozicioj en la internacia politiko, ĉar ili vidas, kion diras la raportoj kaj statistikoj. Do, kreskas la preteco konsideri sistemajn, strukturajn ŝanĝojn, eĉ se tio ankoraŭ ne etendiĝis al la lingva kampo.

Por plene partopreni en tiaj diskutoj, tamen, ni esperantistoj devas esti simile malfermitaj al novaj ideoj, novaj perspektivoj. Se ni havas ion valoran kaj unikan por kontribui pri la lingva dimensio de la socia evoluo, aliaj movadoj povas nemalhaveble kontribui pri aliaj dimensioj. Ni ne imagu, ke "la lingva problemo" povos iam solviĝi aparte de aliaj gravaj demandoj. Fakte ne ekzistas unusola "lingva problemo," sed lingvaj aspektoj de tre multaj diversaj sociaj problemoj, al kiuj ni kiel esperantistoj povas rilati kun intereso kaj simpatio, sed kiujn Esperanto sola ne povas solvi.

Do, kvankam mi komencis ĉi tiun artikolon parolante pri fiero, mi nun volas substreki la ekvilibrigan valoron de humileco. Ni havu memfidon, sed ne tro. Ni ne timu prezenti Esperanton kiel valoran rimedon por homa komunikado, kunlaboro kaj interkompreniĝo; aliflanke ni komprenu, ke ĝi devas trovi sian lokon en pli vasta strebaro por daŭripova estonteco. Se ni predikas dialogon, ni praktiku dialogon. Se ni serĉas la subtenon de aliaj, ni estu pretaj reciproke subteni ilin.

Kie troviĝas la neŭtraleco en ĉio ĉi? Nu, tro ofte oni pensas, ke por esti neŭtrala oni devas agi tute sendepende kaj memcentre, kiel homo kun alta muro ĉirkaŭ sia domo, aŭ firmao, kiu okupiĝas nur pri la propra profito. Sed ni prefere kondutu kiel homo, kiu volas teni bonajn rilatojn kun ĉiuj najbaroj, kaj kiu investas parton de sia laboro por la bonfarto de la komunumo. Nuntempe, tiu komunumo tre evidente devas inkluzivi la naturon en ĝia plena diverseco. Do, al la homaj rajtoj kiel bazo por nia agado, ni devas hodiaŭ aldoni ekologian justecon, kune kun la zamenhofaj valoroj de toleremo, respekto, kaj inkluziveco.

En tiu spirito, mi deziras al ĉiuj esperantistoj justan kaj dialogo-plenan novan jaron!

*Festparolado en la 100a Universala Kongreso de Esperanto (Lillo, Francio, la 26an de julio, 2015)*

# La valoroj de Zamenhof estas ankaŭ niaj

*Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas.*

Per tiuj vortoj, eldiritaj nur 150 kilometrojn de ĉi tie, en la urba teatro de Bulonjo-ĉe-Maro, Ludoviko Zamenhof fariĝis la unua kongresa festparolanto en nia historio. Post 18 malfacilaj jaroj – jaroj de persona malriĉeco kaj foja malespero, jaroj de reformproponoj kaj rivalecoj, jaroj de seninterrompa korespondа, verka, redakta kaj traduka laboro – li finfine povis sperti tion, kion ni ja ĉiuj konas: la unikan etoson de Esperanto-kongreso.

Nemirinde, ke skuis lin emocio.

*Sankta estas por ni la hodiaŭa tago. Modesta estas nia kunveno; la mondo ekstera ne multe scias pri ĝi, kaj la vortoj, kiuj estas parolataj en nia kunveno, ne flugos telegrafe al ĉiuj urboj kaj urbetoj de la mondo; ne kunvenis regnestroj, nek ministroj, por ŝanĝi la politikan karton de la mondo, ne brilas luksaj vestoj kaj multego da imponantaj ordenoj en nia salono, ne bruas pafilegoj ĉirkaŭ la modesta domo, en kiu ni troviĝas; sed tra la aero de nia salono flugas misteraj sonoj, sonoj tre mallaŭtaj, ne aŭdeblaj por la orelo, sed senteblaj por ĉiu animo sentema: ĝi estas la sono de io granda, kio nun naskiĝas.*

Nia 100a Universala Kongreso estas la heredanto kaj portanto de tiu spirito, de tiu misio, pri kiu parolis Zamenhof. Ĝi estas *io granda*. Kaj mi volas nun paroli al vi iom pri la dimensioj

de tiu grando, pri ĝiaj longo kaj larĝo kaj profundo. Ĉar en nia ĉiutaga Esperanto-vivo, ni eble tro facile forgesas la pli vastan pejzaĝon, en kiu ni situas. En tiu ĉi jubilea tago, ĝuste 128 jarojn post la apero de la Unua Libro, indas retrorigardi al la longa vojo kiu kondukis nin al Lillo.

Nia ĉi-jara kongresa temo provizas nin per lenso por tiu rigardado. "Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj" – tiel ĝi arigas la kernajn ideojn por nia ekzamenado. Esperanto, ni povus diri, kunigas tiujn fenomenojn en kompleksan tuton: dialogon, arton, kulturon, lingvon, valorojn. Homoj mortas en la nomo de tiaj aferoj. Kiel skribis William Auld, ili ne estas ludo por la kabineto.

*Ni montros al la mondo, ke reciproka kompreniĝado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, ke por ĉi tio tute ne estas necese, ke unu popolo humiligu aŭ englutu alian, ke la muroj inter la popoloj tute ne estas io necesega kaj eterna, ke reciproka kompreniĝado inter kreitaĵoj de tiu sama speco estas ne ia fantazia revo, sed apero tute natura, kiu pro tre bedaŭrindaj kaj hontindaj cirkonstancoj estis nur tre longe prokrastita, sed kiu pli aŭ malpli frue nepre devis veni kaj kiu fine nun venis, kiu nun elpaŝas ankoraŭ tre malkuraĝe, sed, unu fojon ekirinte, jam ne haltos kaj baldaŭ tiel potencege ekregos en la mondo, ke niaj nepoj eĉ ne volos kredi, ke estis iam alie, ke la homoj, la reĝoj de la mondo, longan tempon ne komprenis unu la alian!*

Tiel Zamenhof prezentis sian vizion de la dialogo inter kulturoj. Rimarku la emfazojn: la reciprokeco, la natureco, la rajto kaj kapablo de ĉiu popolo resti esence si mem, dume malfermante sin al vera kompreniĝo kun homoj alipensaj, aliestaj. Kian kuraĝon, kian memfidon ni retrovas en tiu sinteno; por uzi zamenhofan vorton, kian potencon! Kaj samtempe, kian kondamnon de la "tre bedaŭrindaj kaj hontindaj cirkonstancoj," kiuj malhelpas tiun dialogon. En postaj kongresaj paroladoj, Zamenhof parolos pli klare kaj rekte pri "la nigraj semantoj de malpaco," kiuj pro-

fitas de la homa egoismo kaj timemo por inciti unu popolon kontraŭ alian, unu kredantaron kontraŭ alian.

Ve, malpli ol dek jarojn post tiu gaja bulonja tago, la semantoj de malpaco gajnis malgloran venkon, trenante la landojn de Eŭropo, kaj iliajn koloniojn, en la Grandan Militon. Nur dekojn da kilometroj for de ĉi tie, la armeoj fosis, pafis, bombis, gasis, mortis. Batalo de fortoj anstataŭis dialogon de vortoj. Kaj tiu milito, kiel ni scias, aŭguris postan, eĉ pli teruran, kies sekvoj restas ankoraŭ kun ni.

Kiel al tiuj hororoj kontraŭmeti la arton?

*La celoj ĉie dronis. Jam emerĝas*
*Ĥimeroj por apokalipsa rajdo.*
*La time trema koro vane serĉas*
*Eskapon de l' minaca sanga tajdo.*

Tiuj vortoj ne estas de Zamenhof, sed de Kalocsay, unu el la grandaj figuroj de la Esperanto-kulturo. Starante ĉe la sojlo de la Dua Mondmilito, la hungara poeto klare vidis la limigitan povon de la poezio. Kaj tamen li verkis, kaj lasis al ni versojn kiuj ankoraŭ nun vekas esperon en lacaj koroj:

*Kiam anoncis ploro kaj ve-krio*
*Kaj en la noktoj horizonta ruĝo*
*"La gotaj hordoj en la Imperio!"*
*En Romo iu staris sen rifuĝo*
*Pensante reve pri l' Aŭgusta paco*
*Kaj flustris kelkajn versojn el Horaco.*

La arto ne nur konsolas; la arto daŭras. Ĝi fundamentas la civilizacion. La gotaj hordoj venas kaj iras, sed en la fosejoj kaj koncentrejoj oni muzikas kaj pentras, poemas kaj pensas, kaj io travivas. *Io granda.*

Zamenhof multe uzis la esprimon "lingvo arta" por priskribi Esperanton. Nuntempe oni pli ofte diras "planlingvo," sed mia-

opinie la malnova termino pli rekte tuŝas la kernon de la afero. Lingvo arta estas lingvo, kiu vekas la spiriton, kiu tuŝas la koron, kiu invitas al kreado kaj al ĝojo. Ne povas esti dubo, ke ĝuste tiel Zamenhof konceptis sian projekton. Aŭskultu lin denove en Bulonjo:

*Tra la aero flugas misteraj fantomoj; la okuloj ilin ne vidas, sed la animo ilin sentas; ili estas imagoj de tempo estonta, de tempo tute nova. La fantomoj flugos en la mondon, korpiĝos kaj potenciĝos, kaj niaj filoj kaj nepoj ilin vidos, ilin sentos kaj ĝuos.*

Tiu lingvaĵo de sentemo kaj ĝuo, de imagoj kaj animoj, estas la esprimrimedo de artisto – de la homo, kiu lanĉis sian lingvo-projekton ne per dikaj vortaro kaj gramatiko sed per elokventa eseo kaj tri poemoj. Kiam en niaj kongresoj ni dediĉas tiom da atento al la arta programo, al la koncertoj kaj teatraĵoj kaj aŭtoraj duonhoroj kaj Belartaj Konkursoj kaj tiel plu kaj tiel plu, ni efektive agas kiel la heredantoj de Zamenhof. Kaj en tio ni fakte elstaras inter la sociaj movadoj, kiuj tro ofte lasas sin konvinki, ke la vojo al pli bona mondo iras nur tra raciaj analizoj kaj la diligenta plenumo de laborplanoj. Ni scias analizi, ni scias plani kaj plenumi – sed ni scias ankaŭ ĝoji kaj ĝui kaj krei.

El ĉio ĉi naskiĝas kulturo. Sed la Esperanto-kulturo estas io multe pli subtila kaj kompleksa, pli multflanka kaj plurtavola, ol oni povas facile difini. Mia antaŭulo kiel UEA-prezidanto, Probal Daŝgupta, iam sugestis, ke ni pensu pri tiu kulturo kiel ŝipo, kiu navigas inter la havenoj de la naciaj kulturoj. La homoj sur la ŝipo – tio estas ni ĉiuj en ĉi tiu salono, kaj dekmiloj da niaj samideanoj tra la mondo – ĝenerale naskiĝas kaj kreskas en la havenurboj. Sed pli aŭ malpli frue ni sentas la altiran forton de la maro. Jen, ni pakas kelkajn vestaĵojn kaj enŝipiĝas. Kaj sur la ŝipo ni renkontas sortimenton de homoj el nia urbo kaj aliaj urboj, ĉiuj kun la propraj kutimoj, la propraj konoj kaj mondrigardo. Kelkaj velas jam de jardekoj, aliaj estas novuloj; kelkaj faras nur mallongan vojaĝon de unu-du tagoj, aliaj rondiras la mondon; sed por ni ĉiuj la ŝipo fariĝas dua hejmo, almenaŭ portempe.

Kia do estas la kulturo de tiu ŝipo? Evidente ĝi malsimilas al tiu de la havenurboj, kie oni havas aliajn bezonojn kaj aliajn zorgojn. Eble estas eĉ pardoninde, se iuj homoj en tiuj urboj rigardas nian ŝipon kaj dubeme skuas la kapon. Se oni ne sentas velemon – se la maro kaj la horizonto lasas vin indiferenta – aŭ se rondiras skandalaj rakontoj pri la konduto de tiuj maristoj, kun ties fremdaj moroj kaj vagabondaj spiritoj – oni povas facile kroĉi sin al la supozo, ke tie vera kulturo simple ne povas ekzisti. Estas komforte kovi tiajn iluziojn.

Sed por ni, la ŝipanoj, estas tute alie. Por ni tiu kulturo ne estas teoria afero, sed ĉiutaga sperto. La kulturo de Esperanto naskiĝas el la densa teksaĵo de rilatoj inter ni – ne nur ni ĉi tie, la nuntempuloj, sed ankaŭ kun niaj antaŭuloj, kun la tekstoj kiujn ili postlasis al ni, kun la tradicioj, kiuj donas strukturon kaj ritmon al la surŝipa vivo, kaj kun la rakontoj, per kiuj ni distras nin dum la longaj noktoj.

Per diri la saman aferon per aliaj vortoj: en certa mezuro, ĉiu esperantisto sentas sin ankaŭ bulonjano.

*En nia kunveno ne ekzistas nacioj fortaj kaj malfortaj, privilegiitaj kaj senprivilegiaj; neniu humiliĝas, neniu sin ĝenas. Ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio, kaj la unuan fojon en la homa historio ni membroj de la plej malsamaj popoloj staras unu apud alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj, kiuj ne altrudante unu la alia sian lingvon, komprenas sin reciproke, ne suspektas unu la alian pro mallumo ilin dividanta, amas sin reciproke kaj premas al si reciproke la manojn ne hipokrite, kiel alinaciano al alinaciano, sed sincere, kiel homo al homo. Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maro kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.*

Kial la lingvo tiom gravas, en la esperantista kompreno de la dialogo inter kulturoj? Ĉar la lingvo provizas la lignon, per kiu nia ŝipo estas farita. Sen tiu ligno, ni povus ja renkontiĝi, kiel homoj renkontiĝas en flughaveno aŭ sur krozŝipo, provizore sam-

loke, sed sen granda persona investo aŭ intenco resti. Multo el tio, kion la hodiaŭa mondo nomas kultura dialogo, konsistas en renkontiĝoj de tiu speco. Sed sur la Esperanta ŝipo estas alie. Ni konstante refaras kaj renovigas ĝin; ĝi estas nia komuna kreaĵo, kaj ĉiu el ni, eĉ la plej nova komencanto, alportas sian tabuleton al la tuto.

Se oni ne mem spertis ĝin, estas malfacile imagi, kiel tio funkcias. Tial ni frontas tiel malfacilan defion en nia informado al la mondo. Jam de la dudekaj jaroj ni klopodas komprenigi nian vidpunkton al la grandaj internaciaj organizaĵoj, kiuj principe okupiĝas ĝuste pri tiu dialogo inter kulturoj. Kelkaj el niaj plej grandaj oratoroj kaj organizantoj dediĉis sin al tiu laboro. En la dudekaj, temis pri Edmond Privat kaj la Ligo de Nacioj; en la kvindekaj, temis pri Ivo Lapenna kaj Unesko; en la sepdekaj kaj okdekaj, Humphrey Tonkin kaj Unuiĝintaj Nacioj. Tiu laboro ja alportis valorajn atingojn; ĝuste ĉi-jare ni festas la 60an datrevenon de la fama rezolucio perlaborita de Lapenna, el decembro 1954, per kiu Unesko agnoskis la valoron de Esperanto por ĝia agado. Sed oni ne povas diri, ke ni sukcesis esence ŝanĝi la pensadon de la tiel nomata “internacia komunumo” pri la rolo de lingvo arta, kiel dirus Zamenhof, en la konstruado de pli bona mondo.

Kial entute provi plibonigi la mondon? Ni ja povas ĉiukaze ĝui la surŝipan vivon, kiel ni faros ĉi-semajne, inter la gastamaj muroj de Lillo kaj Bulonjo. Ni havas nian propran dialogon inter kulturoj, kie kunludas lingvoj kaj artoj, homoj kun homoj. Ĉu tio ne sufiĉas? Ĉu ne estas tempo rezigni pri tiu malnova revo, kiun Zamenhof tiel elokvente resumis por la kongresanoj en 1905? Ĉu ne estus pli simple akcepti, ke la mondo iris alian vojon?

Mi povas nur klarigi al vi mian respondon – ĉar verŝajne ĉiu esperantisto devas respondi tiun demandon en sia propra maniero. En mia vivo, Esperanto malfermis fenestron al la mondo. Tra tiu fenestro, mi pli klare vidas la suferojn, kiujn kaŭzas la nuna lingva reĝimo de la mondo, kaj la gigantajn perdojn, al kiuj ĝi kondukas. Lingva kaj kultura maljusteco troviĝas ĉie; lingva kaj

kultura diverseco estas minacata ĉie; kaj ĉie homoj kovas suspektojn kaj timojn al siaj najbaroj, kiuj jen kaj jen eksplodas en la formo de persekutoj, atencoj kaj militoj. La samaj malbonoj, kontraŭ kiuj batalis Zamenhof dum sia tuta vivo, hantas nian hodiaŭan mondon; kaj aldoniĝis, kompreneble, kreskanta ekologia detruo, kiu ne estas fenomeno aparta de la perdado de lingva kaj kultura diverseco, sed samkaŭza kaj samdirekta evoluo.

Por mi, estas afero de valoroj. La valoroj de Zamenhof estas ankaŭ miaj; ili estas parto de tiu kultura heredaĵo, kiun mi renkontis sur nia ŝipo, kaj kiu fariĝis ankaŭ mia kultura heredaĵo. Por mi, almenaŭ, ne ekzistas elekto. Se eblas alispeca kultura dialogo, pli homskala, pli arta, pli proksima al la koroj kaj spiritoj, kaj se nia mondo tiel klare bezonas tian dialogon, tiam estas mia devo, kiel esperantisto, provi konvinki la mondon pri ĝia graveco kaj pri la kontribuo, kiun ĝi povas fari al la kreo de vere daŭripova monda socio.

Mi firme supozas, ke tiuj valoroj estas komunaj por ĉiuj esperantistoj, en pli aŭ malpli alta grado. Ĝuste tion mi volis komprenigi, dirante, ke ni ĉiuj estas bulonjanoj. Ĉi tie en nia centa kongreso, ankaŭ ni sentas flugi “tra la aero de nia salono” tiujn misterajn sonojn, pri kiuj parolis Zamenhof: “sonoj tre mallaŭtaj, ne aŭdeblaj por la orelo, sed senteblaj por ĉiu animo sentema.” Kiel ajn vi pasigos la semajnon, ĉu en kunsidoj kaj diskutoj, ĉu en koncertoj kaj prelegoj, ĉu en agrablaj promenadoj kaj amika konversaciado, lasu tiujn sonojn paroli al via animo. Ja por tio ni venas.

*Post multaj miljaroj da reciproka surda-muteco kaj batalado, nun en Bulonjo-sur-Maro fakte komenciĝas en pli granda mezuro la reciproka kompreniĝado kaj fratiĝado de la diverspopolaj membroj de la homaro; kaj unu fojon komenciĝinte, ĝi jam ne haltos, sed iradas antaŭen ĉiam pli kaj pli potence, ĝis la lastaj ombroj de la eterna mallumo malaperas por ĉiam. Gravegaj estas la nunaj tagoj en Bulonjo-sur-Maro, kaj ili estu benataj!*

Kaj benataj estu niaj tagoj ĉi tie en Lillo!

*Novjara mesaĝo 2016*

# Labori por paco en malpaca mondo

La pasintan jaron ombris militoj kaj atencoj. Sirio, Irako, Jemeno; Sud-Sudano, Niĝerio, Centrafrika Respubliko; Mjanmao, Pakistano, Afganio; Ukrainio, Meksiko, Kolombio… en ĉiuj kontinentoj, miloj da homoj mortis perforte, per bomboj kaj pafiloj, en daŭrantaj konfliktoj diversspecaj. Teror-atakoj amase mortigis civitanojn en Ankaro, Garisso, Bejruto, Parizo, Tunizo, San-Bernadino. Pri kelkaj el tiuj tragedioj oni vaste raportis; pri aliaj nur malmulte. Sed pri rapidaj kaj facilaj solvoj oni ne povas paroli, ĉar temas pri fruktoj de longa malpaca historio.

Tiu malpaca historio estas la fono, sur kiu aperis kaj disvolviĝis nia movado por "lingvo neŭtrale homa." Ni ĉiuj konas la alvokojn de Zamenhof, ke ni, "pacaj batalantoj," laboru por starigi "unu grandan rondon familian" en kiu ĉiuj homoj kaj popoloj povus senti sin sekuraj kaj juste traktataj. Sed ni ne forgesu, ke li faris tiujn alvokojn fronte al kruelaĵoj, kiuj hante similas tiujn de la nuna mondo. Jam en la dua Universala Kongreso en Ĝenevo, 1906, li elvokis la eventojn en sia ruslanda patrujo:

*Terura estas la stato de aferoj en la multelingva Kaŭkazo, terura estas la stato en la Okcidenta Rusujo. Malbenita, milfoje malbenita estu la intergenta malamo! Kiam mi estis ankoraŭ infano, mi, en la urbo Bielostok, rigardadis kun doloro la reciprokan fremdecon, kiu dividas inter si la naturajn filojn de sama lando kaj sama urbo. Kaj mi revis tiam, ke pasos certa nombro da jaroj, kaj ĉio ŝanĝiĝos kaj boniĝos. Kaj pasis efektive certa nombro da jaroj, kaj anstataŭ miaj belaj sonĝoj mi ekvidis teruran efektivaĵon: en la stratoj de mia malfeliĉa urbo de naskiĝo sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin ĵetis kiel plej kru-*

*elaj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion, ol tiuj ĉi sovaĝuloj. Pro tio oni frakasis la kraniojn, kaj elpikis la okulojn al viroj kaj virinoj, kadukaj maljunuloj kaj senhelpaj infanoj! Mi ne volas rakonti al vi la terurajn detalojn de la bestega Bielostoka buĉado; al vi kiel al Esperantistoj mi volas nur diri, ke terure altaj kaj dikaj estas ankoraŭ la interpopolaj muroj, kontraŭ kiuj ni batalas.*

Kompreneble Zamenhof ne povis antaŭvidi, kiom pli teruraj kaj amasaj estos la suferoj de viktimoj en la unua kaj dua mondmilitoj, kiam pereos i.a. liaj propraj familianoj. Sed li jam komprenis, kiel li diris la postan jaron en la londona Gildhalo, ke "longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero," antaŭ ol "la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj."

Kiel ni esperantistoj kondutu, fronte al tiuj realaĵoj? Evidente ni ne estas imunaj kontraŭ antaŭjuĝoj kaj misperceptoj pri niaj kunhomoj; ĉiu el ni dividas, certagrade, la valorojn kaj vidpunktojn de nia etno, socia klaso, amaskomunikila medio kaj simile. Iĝante esperantisto, oni ne demetas siajn aliajn identecojn. Tiel eblas, ke esperantistoj tiriĝas al malsamaj flankoj en diversaj konfliktoj, aŭ pli spontane sentas solidarecon kun iuj viktimoj ol kun aliaj. Tiel eblas, ke ankaŭ en Esperanto foje aperas esprimoj de maltoleremo, malrespekto, eĉ malamo.

Lerni Esperanton estas efektive nur unu paŝo sur longa, preskaŭ senfina vojo al homaraneco. La lingvo donas al ni multon: esprimilon, komunikilon, kulturbazon, tradiciaron; unuvorte, komunumon. Sed, por citi Zamenhof denove: "Ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn." Nia komunumo estas lernejo, en kiu la lernantoj estas samtempe la instruistoj, en kiu la studfakoj kovras la tutan vivon de la homaro, en kiu la fina diplomo neniam estas atingita. Esperanto provizas fundamenton, konstrumaterialojn; ni faras la ceteron mem, laŭ niaj povoj.

Tiuj povoj ankoraŭ ne etendiĝas al la ĉesigo de militoj, kiel revis Zamenhof. Ni dividas la timojn kaj la sentojn de la ordina-

raj homoj, kiujn trafas la minaco de bomboj kaj kugloj. En niaj diversaj hejmlokoj, ni venas al diversaj starpunktoj pri la politikaj kaj sociaj demandoj, kiuj naskas teroron kaj militon. Sed kiel esperantistoj, ni povas strebi al solidareco, al reciproka kompreno, al kunlaboro kaj kunlernado nelimigitaj de haŭtkoloro, kredo, kulturo. Al la detruado ni povas kontraŭmeti konstruadon; al la klopodoj disigi kaj marĝenigi homojn ni povas respondi per malfermitaj brakoj kaj pordoj.

Kiel fari tion pli efike, pli konsekvence, pli bone – jen grava demando por la 101-a Universala Kongreso en Nitro. Sub la temo "Socia justeco – lingva justeco," ni havos okazon repripensi la laboron de la esperantistoj por pli paca mondo. Ni ja ne estas solaj en tiu laboro; amaso da movadoj, multe pli ol en la tempo de Zamenhof, dividas niajn valorojn kaj niajn celojn, se ne ankoraŭ nian lingvon. Malfermante nian modestan memlernejon al iliaj ideoj kaj atingoj, enplektante ilin en niajn diskutojn kaj planojn, ni samtempe plifirmigos nian pozicion en la tuthomara strebado por paco kaj justeco.

Mi deziras al ĉiuj esperantistoj pacan kaj solidarecan jaron 2016!

*Festparolado en la 101a Universala Kongreso de Esperanto (Nitro, Slovakio, la 24an de julio, 2016)*

# Por socia justeco kaj lingva justeco

Estimataj honoraj gastoj, karaj kongresanoj,

El la mond' eterne militanta, jen alvenis ni denove, pacaj batalantoj. Ne mankis pruvoj en la lasta jaro, ke nia strebado estas ankoraŭ aktuala. Multegaj homoj tra la mondo suferas pro militoj, pro persekutoj, pro manko de bazaj vivrimedoj. Eĉ pli vastaj aroj suferas pro socia ekskludo, maltoleremo, maljusteco. Ni en ĉi tiu salono estas bonŝancaj – mirinde bonŝancaj. Kaj – se mi rajtas iom adapti frazon el la mondo de bildstriaj herooj – kun granda bonŝanco venas granda respondeco.

Niaj kongresoj pruvas, ke homoj povas renkontiĝi kun homoj, sen rigardo al ties etna deveno, denaska lingvo, socia klaso, aŭ aliaj diferencoj. Niaj kongresoj pruvas la potencon de lingvo neŭtrale homa por transponti la barojn, kiuj dividas nin. Jes, ĉion ĉi ni spertas ĉiupaŝe kaj ĉiuminute dum la kongresa semajno. Sed Esperanto ne estis elpensita nur por doni ĝojon kaj ĝuon al tiuj kelkaj parolantoj, kiuj sukcesas trovi monon kaj tempon por vojaĝi al la kongreso. Ĝi estas rimedo por ŝanĝi la mondon.

Mi volas do iom paroli al vi pri tiu mondo, kaj pri nia kontribuo al ĝi. Kaj kie pli bone komenci, ol ĉi tie en Nitro, la ĉarma kaj alloga urbo kiu ĉi-jare gastigas nin? Antikva lulilo de la kristanismo, sidejo de potencaj reĝoj, longtempa centro de agrikulturo, pli laste nukleo de kreskanta elektronika kaj aŭto-industrio, urbo kulture riĉa kaj turisme inspira – Nitro bone montras, kiel moderna urbo povas establiĝi sur la fundamento de kompleksa pasinteco.

Ĉar vi verŝajne jam rimarkis: el kiu ajn direkto vi venis al Nitro – ĉu de nordo aŭ sudo, de oriento aŭ okcidento – vi transiris landlimojn, kulturajn limojn, lingvolimojn. Tiu ĉi bela kaj fekunda ebenaĵo, ĉe la piedo de Okcidentaj Karpatoj, estas ankaŭ historia vojkruciĝo de civilizacioj kaj popoloj. Iam en ĉi tiu regiono la romia mondo konfrontis la ĝermanajn tribojn; la alvenintaj slavoj renkontis la frankojn de Karlo la Granda; la batalemaj hungaroj gajnis, poste perdis reĝlandon; la islamaj otomanoj luktis kontraŭ la kristanaj princoj; protestantaj armeoj ondis tien, katolikaj reen; la habsburga imperio ŝvelis kaj disfalis; la unuan demokratian ŝtaton de ĉeĥoj kaj slovakoj forronĝis la faŝismo; kaj dum kvardeko da jaroj post la dua mondmilito, la Fera Kurteno dividis Orientan kaj Okcidentan Eŭropon.

Estas facile fokusiĝi al tiuj dividoj kaj konfliktoj. Ili estis realaj. Multe da sango fluis ĉi tie tra la jarcentoj. Sed la vera miraklo estas tio, ke ili ne daŭris eterne. Kiam ajn iu armita forto aŭ dogma kredo desegnis limon sur la tero, aliaj fortoj – la liberigaj fortoj de ideoj, de komerco, de amikeco kaj scivolo, de arto kaj spirito – sukcesis transiri ĝin, subfosi ĝin, transformi ĝin en ion alian.

Jen rakonto pri tio.

Antaŭ longe en ĉi tiu regiono ekestis la ŝtato Granda Moravio. Temas pri la unua slava reĝlando, pri kiu ni havas dokumentajn pruvojn. Ĝia unua reganto estis Princo Mojmir la Unua; ĝia centro estis Nitro. Laŭ invito de la posteulo de Mojmir, Rastislav, en la jaro 863 venis ĉi tien la grekaj misiistoj Kirilo kaj Metodo, portante ne nur la kristanan kredon, sed ankaŭ skribsistemon, kiun ili ellaboris por la slavaj lingvoj. Pro sia konvinko, ke religiaj valoroj estu komunikataj en la lingvo de la popolo, la du fratoj devis batali kontraŭ pastroj, reĝoj, episkopoj kaj papoj. Oni povus verki epopeon pri ilia lingvopolitika odiseado, kiu daŭris ĝis la fino de iliaj vivoj.

Laŭ la kutimaj mezuroj, Kirilo kaj Metodo fine malvenkis. Iliaj disĉiploj estis forpelitaj el Moravio, rifuĝante suden al la teritorio de la bulgaroj; la romia eklezio restis ankoraŭ longtempe kroĉita al la klasikaj liturgiaj lingvoj, la hebrea, greka kaj latina. Sed tiu ŝajna malvenko tamen plantis semojn, kiuj poste kreskos en la la vastan arbaron de la sub- kaj orientslavaj literaturoj, ankoraŭ hodiaŭ skribitaj en alfabetoj adaptitaj el tiu origina skribo de Kirilo kaj Metodo.

Kio laŭ mi estas rimarkinda en tiu rakonto, tio ne estas simple la disvastiĝa potenco de bone elpensita lingva inventaĵo. Malantaŭ ĝi troviĝas pli profunda ideo: ke la lingvo estas rimedo por kunigi kaj povigi ordinarajn homojn. Eĉ pli grave ol la kirila skribo mem, tiu *ideo* pluvivados poste en la eŭropa civilizacio. Oni retrovos ĝin ĉe la luteranoj, kiuj insistos pri la rajto de individuoj mem legi la sanktajn librojn en sia propra lingvo; oni retrovos ĝin ĉe la naciliberigaj movadoj, kiuj insistos pri la valoro de gazetoj, literaturo kaj historio verkitaj en la lingvo de la popolo; oni retrovos ĝin en la popolklerigaj movadoj de la 19a kaj 20a jarcentoj, kiuj rigardos vastan alfabetigon en la propra lingvo kiel bazon por demokratio. Efektive, ne eblas imagi modernan Eŭropon sen tiu ideo.

Jen, do, kion mi volas emfazi: ke en ĉi tiu sama regiono, kie okazis tra la jarcentoj batalo post sanga batalo pri la limoj de regpovo, kredo, nacieco, naskiĝis ankaŭ ideo kun potenca liberiga kaj unuiga forto. Oni ne devas akcepti la regantajn kutimojn pri lingvoj kaj komunikado; oni povas, per la homa genio, krei novajn rimedojn, novajn imagitajn komunumojn, novajn normojn de homa solidareco kaj homa libereco. Ĉar ni memoru, ke Kirilo kaj Metodo estis motivitaj de esence homfratiga ideo. Por ili, la kristanismo superis ĉiujn lokajn identecojn; sub ĝia tegmento, ĉiuj homoj estus egalaj kaj egalvaloraj.

Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, naskita nur okcenton da kilometroj norde de ĉi tie, heredis de sia kultura medio ne nur la kirilan skribon, sed ankaŭ tiun ĉi ideon. Ni vidas en lia verkaro

kreskantan emfazon, ke la pli profunda celo de Esperanto konsistas en ĝia kapablo levi la homojn super la limigita vidkapablo de ilia etna kaj socia identeco. Sed por li, vivanta mil jarojn post Kirilo kaj Metodo, la homfratiga rolo de unuopaj religioj estis jam pruvita nesufiĉa, same kiel la homfratiga rolo de unuopaj lingvoj. En la Deklaracio pri Homaranismo, kiu aperis en 1913, li skribis:

*Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion; la dividitecon de la homaro en diversajn reciproke malamikajn gentojn kaj gentreligiajn komunumojn mi rigardas kiel unu el la plej grandaj malfeliĉoj, kiu pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo.*

*Mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj. Ĉian ofendadon aŭ premadon de homo pro tio, ke li apartenas al alia gento, alia lingvo aŭ alia socia klaso ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.*

En la mondo de 1913, tiuj vortoj sonis radikale. Sed nun aŭskultu tiun ĉi alian tekston, aperintan 35 jarojn poste:

*Pro tio, ke agnosko de la esenca digno kaj de la egalaj kaj nefordoneblaj rajtoj de ĉiuj membroj de la homara familio estas la fundamento de libero, justo kaj paco en la mondo,*

*Pro tio, ke malagnosko kaj malestimo de la homaj rajtoj rezultigis barbarajn agojn, kiuj forte ofendis la konsciencon de la homaro, kaj ke la efektiviĝo de tia mondo, en kiu la homoj ĝuos liberecon de parolo kaj de kredo kaj liberiĝon el timo kaj bezono, estas proklamita kiel la plej alta aspiro de ordinaraj homoj…*

Ĉu tio ne sonas zamenhofe?

*Pro tio, ke nepre necesas, se la homoj ne estu devigitaj, sen alia elektebla vojo, ribeli kontraŭ tiranismo kaj subpremo, ke la homaj rajtoj estu protektataj de la leĝo,*

*Pro tio, ke nepre necesas evoluigi amikajn rilatojn inter la nacioj,*

*Pro tio, ke la popoloj de Unuiĝintaj Nacioj en la Ĉarto reasertis sian firman kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa personeco kaj je la egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj, kaj firme decidis antaŭenigi socian progreson kaj pli altnivelan vivon en pli granda libereco…*

Per la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, la mondo ricevis novan formulon por esprimi la valoron de ĉiu unuopa homo. Tion tamen eblis atingi, nur per la trairo de tiu longa sanga vojo, kies spuroj troviĝas ankaŭ ĉi tie, en Nitro. Kaj la radikoj de la universalaj homaj rajtoj estas la radikoj ankaŭ de Esperanto – de tiu lingvo neŭtrale homa, kiu hodiaŭ kunigas nin.

Por nia kongresa temo ĉi-jare, ni elektis eksplicite kunligi du ideojn: socia justeco kaj lingva justeco. La unua estas vaste konata. Ni ĉiuj komprenas, ke diversaj homoj spertas marĝenigon kaj ekskludon en niaj nuntempaj socioj; ke fundamentaj necesaĵoj kiel loĝado, manĝaĵoj, vestoj, pura akvo, sanprizorgo kaj edukado estas malegale distribuitaj; kaj ke tiajn situaciojn oni ne ŝanĝas nur per leĝaj kaj parlamentaj decidoj, sed foje necesas ŝanĝi la strukturojn de la socio mem. La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kaj aliaj parencaj deklaroj, kiel la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj kaj la Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj – ambaŭ kvindekjaraj ĉi-decembre – helpas konkretigi niajn ideojn pri tio, kiel aspektu socio vere justa. Eĉ se tia socio ne estas plene realigebla, la laboro por *provi* realigi ĝin estas en si mem valora kaj necesa. Tio estas kerna trajto de socia justeco.

Sed la dua parto de nia temo, lingva justeco – tio estas malpli ofta koncepto. Lingvo estas tiel fundamenta parto de la strukturo de socio, ke ĝi estas ofte nevidebla, kiel akvo por fiŝo. Ni ofte ne rimarkas, kiam aliaj homoj spertas marĝenigon aŭ ekskludon pro lingvo, same kiel ni ne perceptas, kiel lingvo estas parto de tiaj esencaj sociaj servoj kiel sanprizorgo aŭ edukado. Kaj tamen provu imagi, kiel vi sentus vin, se en kliniko aŭ hospitalo neniu komprenus la lingvon, kiun vi parolas, aŭ se en lernejo la instru-

isto alparolus vin per lingvo al vi nekonata. Lingvo estas profunda parto de nia homeco, kaj ni ne povas senti nin plene homaj, se nia lingvo ne renkontas rekonon, respekton, kaj respondon.

Tiu konstato troviĝas ĉe la bazo de la Esperanto-movado. Ni laboras por konstrui mondan socion, en kiu ĉiu homo povas plene homi, ankaŭ lingve. Eĉ se tia monda socio ne estas plene realigebla, la laboro por *provi* realigi ĝin estas en si mem valora kaj necesa. Ni konvinkiĝis, ke lingvo neŭtrale homa alportas esencan kontribuon al tiu laboro. Tio ne signifas, ke ni havas respondojn al ĉiuj demandoj. Ni solaj ne povas diri, kiel plej bone organizi niajn sociojn por realigi lingvan justecon en la sanprizorgo aŭ en lernejo, ekzemple. Sed ni insistas starigi tiujn demandojn. Ni insistas, ke lingva maljusteco ne fariĝas pli justa, se oni ignoras ĝin aŭ deklaras ĝin neatingebla. Ni insistas, ke oni povas, per la homa genio, krei novajn rimedojn por la protekto kaj povigo de la homoj, kaj ke tiuj rimedoj povas esti ankaŭ lingvaj. Ni insistas ke nia lingvo Esperanto estas tia rimedo.

Pri la potenco de tiu rimedo mi ne bezonas konvinki vin, karaj aŭskultantoj. Vi ja kunvenis ĉi tie por sperti la unikan etoson de mondkongreso, en kiu homo renkontiĝas kun homo. Ĝuu la semajnon! Sed mi instigas vin ankaŭ pensi pri la multegaj homoj, kiuj ĉiutage spertas la mankon de lingva justeco, kiuj ĉiutage spertas la mankon de socia justeco. Se tiuj pensoj tiros vin al unu el la kunsidoj pri la kongresa temo, aŭ al aliaj sesioj pri parencaj temoj, des pli bone! Niaj kongresoj devus esti ne nur distraj sed ankaŭ klerigaj; ne nur amikaj sed ankaŭ aktivigaj. Ni havas multon por fari. Mi esperas, ke la kongresa semajno donos al vi multajn ideojn, energion kaj inspiron por tiu granda laboro.

*Novjara mesaĝo 2017*

# En la Zamenhof-Jaro, ni semu kuraĝon kaj esperon

*L'espero, l'obstino, kaj la pacienco*
*Jen estas la signoj, per kies potenco*
*Ni paŝo post paŝo, post longa laboro*
*Atingos la celon en gloro.*

En la nun komenciĝanta jaro, la centa jaro post lia morto, oni multe parolos pri la idea kaj kultura heredaĵo de Zamenhof. Li ja estis homo, kiu profunde pensis pri la celoj de la vivo kaj la bezonoj de la homaro, kaj li postlasis al ni riĉan testamenton de leteroj, artikoloj, eseoj, kaj paroladoj, kiuj povas ankoraŭ klerigi kaj inspiri nin.

Sed Zamenhof ankaŭ postlasis al ni *sian vivon* kiel inspiron. Ĝi estis bedaŭrinde mallonga vivo (li mortis 57-jara), sed ĝi montras mirindan ekzemplon de tio, kion homo povas atingi, restante fidela al siaj idealoj. Kreskinta en provinca urbo en la periferio de la Rusa Imperio, devena el gento malfidata kaj persekutata, laboranta en unu el la plej malriĉaj kvartaloj de Varsovio, li vivis en malfacilaj cirkonstancoj eĉ post la penplena trovo de kariero. Sed li rifuzis cedi pri sia elektita vivovojo.

Ĉu, en la vortoj de liaj poemoj, ni ne aŭdas lin paroli kuraĝige al si mem?

*Kaj nin ne timigos la noktaj fantomoj,*
*La batoj de l' sorto, la mokoj de l' homoj,*
*Ĉar rekta kaj klara kaj tre difinita*
*Ĝi estas, la voj' elektita.*

Kompreneble, en nia bildo de tiu vojo, ni inkluzivu lian edzinon Klaran. Tiuj longaj vesperoj, kiujn Ludoviko dediĉis al korespondado, verkado kaj tradukado, jaron post jaro, ja devis postuli de ŝi multon, kun kreskanta familio kaj ĉiuj akompanaj zorgoj. Sed ŝi elportis ĉion pacience kaj senŝancele, almenaŭ laŭ ĉiuj indikoj, kiujn ni havas. Ili fidelis ne nur unu al la alia, sed ankaŭ al la ideo, ke ilia familia vivo povas samtempe servi pli vastan, se ne pli altan, celon.

Kiel oni jam ĝenerale konscias, tiu celo ne rilatis nur al lingvo, sed al homa solidareco en monda skalo. Zamenhof revis pri mondo de najbaroj – mondo de fratoj. Kun eksterordinaraj aŭdaco kaj kuraĝo, li rigardis preter la limojn de sia kvartalo, sia gento, sia lando por imagi la tutan homaron kiel familion. Kaj ne nur imagi, sed *kultivi.* Sciante, ke tio estas laboro de generacioj, eble de jarcentoj, li tamen kuraĝis planti la unuajn semojn de la estonta grandarbaro.

*Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,*
*pri l' tempoj estontaj pensante.*
*Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, –*
*ni semas kaj semas konstante.*

Cent jarojn post la morto de Zamenhof, ni travivas malfacilan tempon por tiuj, kiuj strebas por internaciaj kompreniĝo kaj kunlaboro. Politikaj evoluoj en la lasta jaro ofte favoris la konstruistojn de muroj, ne pontoj. Klimatŝanĝo akceliĝas pli rapide ol la klopodoj haltigi ĝin. Bomboj, malsato, malsano, malriĉeco daŭre forrabas multajn vivojn, kvankam neniam estis tiom da rimedoj por kontraŭbatali tiujn antikvajn malbonojn. Unuiĝintaj Nacioj kaj la aliaj internaciaj institucioj estas bremsataj kaj subfosataj de la samaj mallumaj fortoj, kiuj portis al ni jam du mondmilitojn, pogromojn, la sklavkomercon, kaj ekologian detruon tra la mondo.

En tia tempo, Zamenhof estu por ni modelo. "Ni laboru kaj esperu!" li admonis fine de la Dua Libro, frazo kiun Klara poste

fiksis ĉe lia skribmaŝino. Kune, ili efektive laboris kaj esperis; kaj naskis kaj vartis infanojn; kaj kontribuis al la bono de sia kvartalo kaj sia urbo; kaj akuŝis lingvo-komunumon, kiu bezonis ĝuste tiajn akuŝistojn: obstinajn, esperplenajn, paciencajn.

Laborante por Esperanto en la Zamenhof-Jaro, ĝuante la lingvon, kontribuante al ĝia kultura vivo, ni samtempe elmontras nian volon *ne cedi.* *S*e Zamenhof jam cedus siatempe al la premoj de la skeptikuloj kaj la realistoj, ĉu entute ekzistus nia lingvo kaj ĝia komunumo? Estas apenaŭ imageble. Same nun necesas daŭre insisti pri nia ekzisto kaj daŭremo, ne nur kiel movado por lingvo neŭtrale homa, sed kiel movado por mondo fratece kunligita. Ĉiu vorto, ĉiu konversacio, ĉiu renkontiĝo okazanta en la lingvo kaj laŭ la spirito de Zamenhof estas plia paŝo sur tiu vojo.

*"Ho, ĉesu!" mokante la homoj admonas, –*
*"Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas:*
*"Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,*
*se vi pacience eltenos".*

Mi deziras al ĉiuj esperantistoj obstinon, paciencon kaj esperon en la jaro 2017!

*Festparolado en la 102a Universala Kongreso de Esperanto (Seulo, Suda Koreio, la 23an de julio, 2017)*

# Movado de bonaj gastoj

Estimataj honoraj gastoj, karaj kongresanoj,

En ĉi tiu horo kaj loko ni spertas denove tiun miraklon, kiu nomiĝas Universala Kongreso de Esperanto. Kiel fenikso renaskiĝante el cindroj, ĉiujare dum unu semajno reaperas, ie en la mondo, la kultura ĉefurbo de la esperantistoj. Kial nomi ĝin miraklo? Pro tio ke ĝi estas ĉiam rekoneble *la sama urbo*, sendepende de tio, ĉu ĝi troviĝas en Havano aŭ Helsinko, en Vieno aŭ Vankuvero, en Tokio aŭ Telavivo. Alvenas la unuaj dekoj da homoj, tiam la unuaj centoj, kaj kun ili ekŝvelas la granda ondo de renkontiĝoj kaj babiladoj, de kunmanĝado kaj kunkantado, de prelegoj kaj kunsidoj kaj konversaciaj rondoj, de teatraĵoj kaj koncertoj kaj konkursoj, de ĉiuj manieroj uzi lingvon por kunligi homojn. Tia estas nia urbo. Bonvenon en ĝin!

Mi konfesu tuj, ke ni ne havas ĉiujn zorgojn, kiujn havas ordinara urbo. Se temas pri loĝejoj kaj transportiloj kaj akvo kaj elektro, se temas pri vendejoj kaj polico kaj hospitaloj, ni povas feliĉe lasi tiujn servojn en la manoj de niaj gastigantoj – ĉi tie la koreoj, kiuj pruvas sin je ĉiu paŝo ege bonaj gastejestroj. Ni estas aparte feliĉaj, ke ĉi-foje honoris nin per sia ĉeesto niaj efektivaj gastejestroj: unuavice la urbesto de Seulo mem, kaj duavice la prezidanto de Hankuk Universitato de Fremdlingvaj Studoj, nia kongresejo. Ni kore dankas ilin ambaŭ kaj ĉiujn iliajn kolegojn en la urbaj kaj universitataj servoj, kiuj zorgas pri ni dum ĉi tiu semajno!

Ni estas, do, iusence urbo de gastoj. Ni pensu pri tio dum momento. Ja ekzistas diversaj specoj de gastoj – eĉ de esperantistaj gastoj! Estas gastoj kiuj malplenigas la fridujon kaj la vinŝran-

kon, tretas koton tra la domo, piedbatas la hundon kaj insultas la najbarojn. Aliflanke, estas gastoj kiuj kunportas donacojn, komplimentas pro la manĝoj, helpas pri la purigado, kaj ludas kun la infanoj. Fari tion kapable kaj bele ne estas tiel simpla afero. Oni devas lerni esti tia gasto, kaj kredeble re- kaj relernadi, ĉar en ĉiu vojaĝo oni renkontas novajn homojn, novajn kulturojn, novajn situaciojn. Lerni bone gasti similas al la lernado de lingvoj; ĉiam restas pli por malkovri.

Mi pensas ke Ludoviko Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, estis ankaŭ nia unua granda teoriisto pri gastado. Jam en la Unua Libro li skribis pri sia vizio pri lingvo, kiu "ne entrudiĝante en la doman vivon de la popoloj, povus, almenaŭ en landoj kun diverslingva loĝantaro, esti lingvo regna kaj societa." Per tia priskribo ni povas bildigi al ni Esperanton ĝuste kiel bonan gaston, kiu apenaŭ ĝenas "la doman vivon" de siaj gastigantoj, dum ĝi alportas valorajn donacojn, interalie pli vastan komunikadon kaj pli profundan egalecon. Kaj dudek kvin jarojn poste, kiam Zamenhof turnis sin ĉiam pli energie al la ideo de homaranismo, ni povas vidi en tio daŭrigon de lia insistado pri la gasta etiko. Ĉar la homaranismo esence konsistas el principoj por harmonia kunvivado kun aliaj homoj, kaj la Deklaracio pri Homaranismo estas kvazaŭ konsilaro pri bona gastado en mondo de granda diverseco lingva, kultura kaj religia.

Ĉi-jare ni solenas la centan datrevenon de la morto de Zamenhof. Tra la mondo okazas ceremonioj, simpozioj, konferencoj dediĉitaj al lia vivoverko. Sed mi volas pledi por ankoraŭ pli vasta kompreno de ĝia signifo, kiel elemento en la daŭranta homara strebo vivi harmonie sur nia malgranda kaj unika planedo. Ŝajnas klare al mi, ke se Zamenhof vivus hodiaŭ, li senrezerve aliĝus al tiuj, kiuj alvokas por pli ekologi-konforma konduto de niaj nuntempaj socioj. Kiel ni ĉiuj povas atesti, nia industria civilizacio, inventaĵo de la lastaj jarcentoj, tendencas al troa, eĉ senbrida ekspluatado de la naturo, kondutante ĝuste kiel la plej malbona gasto imagebla, kiu ne nur malpurigas la domon

sed en la fino detruas ĝin. Tio estas precize la malo de la konduto, kiun rekomendus Zamenhof, ĉar se ni sekvas lian pensofluon, *homarano* ne povus esti alia ol bona *samterano*. Ambaŭkaze temas pri bona gastado, kun identa etika sinteno: paŝi leĝere, ami la aliulon, celi al daŭripovaj rilatoj de reciprokeco. Ĉu la aliulo estas jen besto, planto, rivero, dezerto, arbaro, aŭ kiu ajn alia parto de la naturo, tio ŝanĝas nenion esencan pri la dezirinda konduto.

Tiuj pensoj venis al mi kvazaŭ enkonduke al nia ĉi-jara kongresa temo: "Turismo kaj evoluo: vojoj al daŭripovo." Unuavide tiu temo ŝajnas malproksime de la pensaj kontribuoj de Zamenhof, ĉe kiu oni vane serĉus vortojn kiel "daŭripovo" kaj "ekologio," ĉar en lia epoko oni ankoraŭ ne elpensis ilin. Pli profunda rigardo tamen montras la grandan kongruon inter lia rezonado kaj tiuj nuntempaj konceptoj. Daŭripovo, ni povus diri, estas nia nuntempa maniero paroli pri ne-entrudiĝemo, tiu zamenhofa koncepto kiun ni retrovas jam en la Unua Libro. Daŭripova socia evoluo estas tia evoluo, kiu reduktas la trudiĝemon de la socio al la ekologiaj kaj kulturaj sistemoj kiuj vivtenas ĝin. Kaj daŭripova turismo estas tia turismo, kiu celas disvolviĝi konforme al la bezonoj kaj kapabloj de la gastiganta lando kaj popolo, kontribuante al ĝia ekonomia, ekologia kaj kultura bonfarto. Kiel bona gasto.

Bona gasto ankaŭ strebas lerni de siaj gastigantoj. Kaj do por kelkaj minutoj mi invitas vin akompani min tra la vivoverko de korea pensulo, homo kiu vivis pli ol mil jarojn antaŭ Zamenhof, sed kiu ŝajnas al mi lia spirita parenco. Lia nomo estis Choi Chiwon; poste en sia vivo li alprenis la kromnomon Go-un, "Soleca Nubo." Kiel Zamenhof, li naskiĝis en reĝlando ĉe la periferio de granda imperio, la ĉina Tang-dinastio. Zamenhof edukiĝis en la rusa, fine vojaĝante al Moskvo por siaj universitataj studoj; Choi edukiĝis en la ĉina, irante nur 11-jara al Xian por enskribiĝi en la klasika imperia studsistemo; li restos for el Koreio ĝis sia 27-a jaro . Kaj ambaŭ homoj revenis hejmen forte konvinkitaj pri la bezono de spirita-etika reorientiĝo en la socio ĉirkaŭ si, al kiu ili dediĉos la reston de sia vivo.

Kiel Zamenhof, Choi pensis tute neortodokse. Li malakceptis la tradiciajn dividojn inter popoloj, ŝtatoj kaj religioj, resumante sian sintenon per la vortoj:

*La vero ne malproksimas de la homo,*
*Por homo ne ekzistas lando fremda.*

Ĉerpante el profunda kono de la instruoj de Konfuceo, Laŭzio kaj Budho, li pledis por ilia kunigo en komuna harmonia tuto kiun li nomis *pung-nyu*, laŭvorte "vent-fluado," sed kiu esprimas specon de serena kaj malfermkora vivĝojo. Proksimeco al la naturo estas esenca dimensio de tiu spirita orientiĝo, kaj efektive Choi pasigis siajn lastajn jardekojn kiel soleca saĝulo ĉe la montoj, verkante multajn naturpoemojn kune kun traktaĵoj pri filozofio kaj historio.

Kaj tamen ni devas konfesi, ke ambaŭ homoj iusence malsukcesis, laŭ siaj propraj kriterioj. Zamenhof, kiel ni scias, mortis meze de la Unua Mondmilito, laca kaj malgaja pro tiu eksplodo de interpopola malamikeco, kontraŭ kiu li luktis la tutan vivon. Kaj Choi vivis sufiĉe longe por vidi la definitivan disfalon de ambaŭ dinastioj, la ĉina Tang kaj la korea Silla, kiujn li provis renovigi kaj redirekti per siaj instruoj.

Kion do ni povas lerni, rigardante kune al la hebrea-rusa pensulo kaj la korea-ĉina pensulo, disigitaj de vastaj spacoj de tero, tempo kaj tradicio? Unue, ke la strebo kompreni la mondon *kiel homo*, preter la limoj de sia propra eduko, estas strebo vere universala. Ĝi ankaŭ klare estas strebo malfacila, en kiu oni riskas, kiel diris Zamenhof, "la batojn de l' sorto, la mokojn de l' homoj." Eĉ Choi, kies verkaro dum longa tempo estis konsiderata esenca parto de la korea kultura heredaĵo, devis suferi en pli modernaj tempoj la kritikojn de la naciistoj, kiuj opiniis lian amon al la ĉina kulturo kvazaŭ perfido al la patrujo. La batalo kontraŭ ŝovinismo kaj fremdulmalamo estas batalo eterna, en kiu oni malverŝajne atingos definitivan venkon.

Due, ĉe ambaŭ pensuloj ni vidas ke amo al la homaro kunekzistas kun amo al la propra gento, la propra hejmlando, kaj

aparte ĉe Choi, la propra tero. Oni ne lernas esti bona gasto nur per vojaĝado; oni devas ankaŭ lerni kaj praktiki tion hejme. Zamenhof kompreneble estis sindediĉa filo, frato, edzo kaj patro; li estis ankaŭ klera hebreo, "hebreo el la getto" kiel li mem deklaris sin, kaj lia vivoverko portas multajn spurojn de tiuj ligitecoj. Choi, reveninte al Koreio unuavice por prizorgi siajn gepatrojn, malkovris kaj esprimis en siaj postaj jaroj profundan spiritan rilaton kun la korea naturo. Al mi tio ŝajnas grava kaj foje subtaskata aspekto de la esperantista tradicio – ke nia movado kultivas ne nur vojaĝemon kaj internacian amikecon, sed ankaŭ aprezon de la propraj radikoj, certe lingvaj, sed ankaŭ kulturaj kaj eĉ ekologiaj. Tio estas nepre parto de la vojoj al daŭripovo, pri kiu indas diskuti ĉi-kongrese.

Trie, tiu gasta etiko, kiun Choi kaj Zamenhof ambaŭ siamaniere primeditis kaj disvolvis, konsistas en sinteno kaj praktiko ne nur sciencaj sed ankaŭ artaj. Ne ŝajnas al mi hazarde, ke ambaŭ homoj estis ankaŭ poetoj, kies plej famaj ideoj ofte esprimiĝis verse kaj metafore. Por ni esperantistoj, la muroj de miljaroj, la monto granita, la stelo en nokta ĉielo, tiuj kaj multaj aliaj stilfiguroj de Zamenhof formas parton de nia memkompreno. Kaj Choi sukcesis kapti, per elegante simplaj naturbildoj, la animstaton de homo vojaĝanta inter hejmoj:

*La ŝipo laŭ la plano venas ĉiun duan jaron;*
*Hontas sentaŭgulo hejmeniri purpurrobe.*
*Abrupta adiaŭo en Ŭuŝengo folifale;*
*Nun al Ŝilla alrigardi, kie fonas foraj floroj.*

*Iktero en la valo fluegemas longe, alte;*
*Porkoj de Ljaŭdongo senhonte spikumadas.*
*Volfirmo nepras nun, por poste ne bedaŭri.*
*Mi tostas sorĉan belon de ĉi natur' Gŭanglinga.*

Se vi sentas iom da malgajo en tiuj linioj, vi certe pravas. Bona gasto, bona turisto, kunportas kun si hejmsopiron. Kaj mi celas ne nur sopiron al la fizika hejmo, sed al hejmeco, al sento

de aparteno. Ĉar ĉu ne ĝuste tion ni ĉiuj serĉas, ni kongresanoj, kiuj vojaĝis centojn kaj milojn da kilometroj por esti kune ĉi tie, por dum unu semajno senti nin samurbanoj? Ni trovas, aŭ esperas trovi, senton de aparteno kiu estas alia ol tiu kiun ni sentas en niaj loĝlokoj, alternativan hejmecon kiu kompletigas kaj pliriĉigas niajn aliajn hejmecojn.

Jen do nia paradoksa konkludo. Daŭripova turisto – en la zamenhofa lingvaĵo, homarano – estas homo, kiu sentas sin ĉiam kaj ĉie samtempe hejme *kaj* gaste. Ni paŝas zorge en la hejmoj de aliaj, ĉar ni komprenas, ke ili estas ankaŭ niaj hejmoj. Ni traktas delikate kaj ameme la propran hejmon, ĉar ni komprenas, ke ankaŭ tie ni finfine estas gastoj. Jes, ni ĉiuj estas gastoj sur ĉi tiu tero, kiun ni vizitas por tro mallonga tempo, apenaŭ sufiĉe por kompreni nin mem, por ne paroli pri la kompreno de niaj samteranoj. Tio estas nia sorto, kiel niaj grandaj antaŭuloj kiel Choi kaj Zamenhof klopodis klarigi al ni siamaniere, per siaj verkoj kaj siaj vivoj.

La kongresa semajno etendiĝas antaŭ ni. Mi esperas ke vi jam nun komencas senti vin hejme en nia urbo de gastoj. Mi esperas ke la multaj riĉaĵoj de la programo liveros abundajn okazojn por sperti apartenon, por kleriĝi pri nia kulturo, por disvolvi vian esperantistecon. Kaj mi esperas ke vi samtempe profitos la ŝancon ekkoni Koreion, se vi venis ĉi tien el alia lando, ekkoni ĝin kiel la hejmon de la koreoj sed ankaŭ de la korea naturo, sen kiu ĝi ne estus Koreio. La vojo al daŭripovo iras tra miloj kaj milionoj da tiaj spertoj, per kiuj ni lernas ami la diversecon de la mondo kaj labori por ĝia protektado kaj prizorgo. Kiel bonaj gastoj.

*Novjara mesaĝo 2018*

# Kultivi movadon indan je fiero

Unu el la plezuroj de nia movado estas la renkontiĝoj kun novuloj – kun homoj, kiuj nur en la lastaj monatoj malkovris la lingvon kaj ĝian komunumon. Tra iliaj okuloj oni povas dum momento revidi Esperanton freŝa, pura, netuŝita, kiel ĝardeno sub ĵus falinta neĝo.

Dum novembra vizito al la Centra Oficejo, mi parolis kun unu el la volontuloj de TEJO, junulino kiu antaŭ kelkaj monatoj tute ne konis la lingvon. Spontane ŝi komentis pri la vojaĝrakontoj, kiujn ŝi aŭdis de pli spertaj movadanoj: "Ĉiam ili parolas pri la specifaj homoj, kiujn ili renkontis. Tio por mi estas bela. Oni ne vidas unue la naciecon de la persono, sed ĉiam la homon."

Venante al la fino de la Zamenhof-Jaro, estas bele kaj esperige, retrovi en la buŝo de novvarbito tian konstaton. Ĉar kompreneble ĝuste tio estis la etika kerno de la zamenhofismo: lerni vidi la homecon de ĉiu persono, preter la vestoj de religio, nacieco kaj lingvo. Se ĵusveninto povas rekoni tiun valoron en la ĉiutaga vivo de la movado, senrigarde al teorio aŭ merkatiko, tio ja indas je fiero.

## Akuŝistoj de la moderna E-komunumo

Antaŭ preskaŭ 110 jaroj, UEA estas fondita ĝuste por doni organizan kadron al tiu etika kerno. La fondinto Hodler vidis, ke la naciaj societoj nur parte povas plenumi tiun rolon; oni bezonas asocion, en kiu ĉiu esperantisto povus senpere membriĝi. En lia vizio, UEA estu samtempe praktika rimedo *kaj* potenca simbolo de nia komuna homeco – organizo per kiu la movado iom post iom difinas sian propran vojon.

Se ni rerigardas al tiu pli-ol-centjara historio, ni vidas sukcesojn kaj malsukcesojn, brilajn kaj malbrilajn periodojn, kiel en la vivo de ĉiu homa institucio. Tamen, el la lastaj sepdek jaroj elstaras la rolo, kiun UEA ludis en la tutmondiĝo de Esperanto, subtenante aktivulojn kaj movadojn en ĉiuj kontinentoj kaj provizante kadrojn por transnacia kundiskutado, trejnado, kaj kunlaboro. Notindas ankaŭ ĝia daŭra flegado de nia kulturo en monda skalo, helpante al verkistoj, muzikistoj, aktoroj kaj aliaj trovi internacian publikon por siaj kreaĵoj. Kaj al tio necesas aldoni ĝian subtenon al la junulara movado, al TEJO, kiu per UEA ricevis la bazan financan kaj administran stabilecon por permesi disvolviĝon kaj elkreskon al memstara asocio.

UEA kaj TEJO estis do akuŝistoj de la moderna Esperanto-komunumo, kiu jam vivas kaj disfloras preter ĉiuj organizaj kadroj. Se ambaŭ malaperus morgaŭ, mi ne dubas, ke la movado sukcesus krei novajn instituciojn por plenumi la samajn aŭ similajn celojn. Sed samtempe necesas agnoski, ke niaj atingoj estas limigitaj. Ne venis la granda ondo de membriĝoj, kiujn oni povus esperi pro la disvastiĝo de Esperanto en interreto. Informado pri Esperanto restas plejparte en la manoj de lokaj amatoroj, foje talentaj, sed ofte neorientitaj pri modernaj metodoj de komunikado kaj varbado. Milionoj da homoj, kiuj trovus la lingvon interesa kaj alloga, neniam renkontas prezenton kiu motivus ilin eklerni. Kaj samtempe multaj tradiciaj asocioj kaj agadformoj velkas iom post iom, pro la aĝiĝo de la gvidantoj kaj sia nekapablo varbi novulojn.

## Daŭrige kaj renovige

Ni do trovas nin en tempo de gravaj defioj. Interalie, la financoj de UEA malpliboniĝis en la lastaj jaroj, pro evoluoj en la monda ekonomio kune kun la malrapida ŝrumpado de la membraro. UEA ankoraŭ posedas sufiĉe grandan kapitalon, sed ĝi riskas eroziiĝi per konstantaj jaraj deficitoj, se ni ne sukcesos trovi novajn fontojn de enspezoj aŭ draste tranĉi la elspezojn. Streboj en

tiu direkto multe okupos la Estraron, Oficejo kaj Komitaton dum la jaro 2018. Por nia nova Ĝenerala Direktoro Martin Schäffer, financa resanigo estos inter la ĉefaj prioritatoj.

Ankaŭ al aliaj defioj ni entreprenas respondi, daŭrige kaj renovige. En tiu ĉi jaro UEA lanĉos sian novan retejon, kun diversaj servoj alireblaj per poŝtelefono, kaj daŭrigos sian laboron por trejni aktivulojn kaj kunordigi la laboron pri informado kaj eksteraj rilatoj, agadkampoj kiuj plej rekte influas la disvastiĝon de Esperanto kaj la alfluon de novaj membroj. Samtempe ni subtenos diversajn iniciatojn por festi la Jaron de la Esperanto-Kulturo, inter kiuj sendube elstaros la 103-a UK en Lisbono. En Azio kaj Afriko ni planas novajn paŝojn por subteni kaj plifortigi lokajn kaj landajn movadojn, pri kiuj vi baldaŭ povos legi en ĉi tiu revuo. Malgraŭ ĉiu "malfacila vento," la agado antaŭeniras.

Kaj tio je ne estas agado nur por "la centra UEA"– tio estas agado por ĉiuj. En tiu ĉi renoviga jaro, gravas montri vian subtenon per (re)membriĝo, kaj eventuale krome donaci por apogi specifajn agadojn, aŭ simple por kontribui al nia financa plifortigo. Gravas partopreni en la Jaro de la Esperanto-Kulturo, eventuale per aĉetoj ĉe la Libroservo aŭ aliĝo al la Kongreso. Gravas priprofundigi vian konon de la lingvo kaj la movado, kaj sur tiu bazo ankaŭ iel kontribui al la informa agado, ĉu loke ĉu rete. Gravas diskonigi jamajn sukcesojn kaj kunlabori por atingi novajn. Sen via partopreno kaj kunagado, UEA ne povas progresi.

Plej grave: ni devas ne forgesi, kial Esperanto valoras la penon. Se nova volontulo povas tiel klare vidi la belon en nia movado, ni senhezite agnosku kaj kultivu tiun belon. Nia nuna dolorplena mondo ja bezonegas ĉiujn rimedojn, kiuj helpas la homojn kompreni kaj estimi unu la alian. Se nia agado kontribuas al tiu celo, eĉ se ankoraŭ en relative modesta skalo, ĝi sendube indas je fiero.

Feliĉan, fieran, kaj agadplenan novan jaron al ĉiuj!

*Festparolado en la 103a Universala Kongreso de Esperanto (Lisbono, Portugalio, la 29an de julio, 2018)*

# Partopreni en nia memkuira kulturo

Estimataj honoraj gastoj, karaj kongresanoj,

Bonvenon al Lisbono, unu el la plej belaj havenurboj de Eŭropo, urbo samtempe profunde portugala kaj malferme internacia, iama centro de kelkaj el la plej grandaj maraj esploroj en la homa historio!

Ni venis ĉi tien aŭte, buse, trajne, aviadile, eĉ el la plej foraj anguloj de la planedo; sed longe antaŭ ol la mondo venis al Lisbono, Lisbono iris al la mondo. Oni bezonas la voĉon de poeto por priskribi la kuraĝon, la aŭdacon, la volforton de tiuj maristoj kiel Vasco de Gama kaj Magelano, kiuj en siaj etaj ŝipoj ŝpinis la unuajn fadenojn de la vasta reto de kontaktoj, kiu nun interligas ĉiujn landojn kaj kulturojn. Al niaj gastigantoj la portugaloj, la luzidoj, ni esprimas ne nur nian dankemon sed ankaŭ nian admiron. Ili estis inter la unuaj, kiuj ne nur revis pri la unueco de la mondo, sed faris konkretajn paŝojn por atingi ĝin.

Ni troviĝas ĉi tie por festi kaj ĝui alian el tiuj konkretaj paŝoj – lingvon konceptitan por tiu sama kunliga laboro, al kiu kontribuis la ŝipoj de la Lisbona haveno. Esperanto fariĝis imagebla, fariĝis kreebla, nur post tri jarcentoj de tiu kunteksado. El la unuaj transmaraj esploroj venis transmara komerco; per la transmara komerco kreskis kaj riĉiĝis imperioj; el la kolizioj de imperioj aperis ne nur militoj kaj rivaladoj sed ankaŭ la ĝermoj de internacia ordo bazita sur komunaj reguloj kaj normoj. Kio povus esti pli natura, do, ol ke iu krea geniulo, ĉe la rando de unu el tiuj imperioj, ellaboru la bazon de komuna lingva normo? Zamenhof vivis en la tempo, kiam kreiĝis la internacia poŝta sistemo kaj la

internacia telegrafo, kiam internacia vojaĝado fariĝis imagebla ne nur por riĉuloj sed ankaŭ ordinaraj homoj. Internacia lingvo estis logika plia paŝo en tiu plifaciligado de homaj kontaktoj trans landlimoj.

Tio almenaŭ estas unu el la rakontoj. Estis certe kuraĝiga kaj inspira penso por la fruaj esperantistoj, ke la nova lingvo rajdas sur la tajdo de la historio. Montriĝis, tamen, ke ekzistas pli ol unu speco de historia logiko. Kune kun nova internacia ordo bazita sur paco, komerco kaj scienco, plu kreskis alia, ombra ordo, ordo bazita sur malnovaj hierarkioj kaj sistemoj de ekspluatado, kiuj konstante ŝanĝas sian eksteran aspekton dum ili konservas la malegalan dividon de potenco.

Ni vivas ankoraŭ en tiu mondo de ombro kaj lumo. La historio de Esperanto estas plena de ambaŭ. Ni havas niajn heroojn kaj niajn martirojn, niajn kantistojn de amo kaj belo, niajn poetojn de lukto kaj malĝojo. La strebado por homaj frateco kaj interkompreniĝo neniam estis facila, nek en la tempo de Zamenhof, nek tra la resto de la tumulta dudeka jarcento; nek en niaj tagoj nun ĝi estas facila. Ni vidas ĉiutage en la novaĵoj, kiom pretaj povas esti la homoj rigardi la aliulon kiel malamikon. Ni vidas ĉiutage, kiom da malkompreno, kaj eĉ malkomprenemo, plu ekzistas en mondo kie faktoj kaj informoj estas pli abundaj kaj alireblaj ol iam ajn en la historio. Ni vidas, efektive, ke multe da laboro restas por ni, se ni volas ke niaj nepoj vivu en mondo pli luma ol la nuna, pli paca, pli justa.

Mi volas hodiaŭ paroli al vi pri tiu laboro el eble nekutima angulo. Ni plej ofte pensas pri sociaj movadoj kiel portantoj de ideoj kaj argumentoj. Ili provas konvinki nin pensi alimaniere – pri la rajtoj de samseksamantoj, pri la protektado de la vivmedio, pri la forigo de la mortpuno, pri la transiro al karbonkonserva ekonomio. Ni esperantistoj havas ankaŭ niajn argumentojn, kompreneble. Ni jes volas konsciigi niajn kunhomojn pri la graveco de lingva diskriminacio, la danĝeroj en la superregado de kelkaj ekskoloniaj lingvoj, kaj la valoro de lingvo neŭtrale homa. Ni klare

vidas la ligitecon inter tiuj temoj kaj la aliaj streboj por daŭripova mondo. En la koridoroj de Unuiĝintaj Nacioj, en la konferencoj de neregistaraj organizoj, en la paĝoj de revuoj popularaj kaj sciencaj, ni elmetas niajn ideojn, ni strebas persvadi kaj konvinki. Tio estas necesa kaj valorega laboro. Ni salutu niajn aktivulojn, kiuj faras ĝin; ni klerigu nin mem per iliaj argumentoj; ni subtenu ilin mone kaj morale!

Sed nia movado por Esperanto havas alian flankon, same aŭ eĉ pli esencan. Nia ideo estas ankaŭ praktiko. Se neniu parolus kaj uzus Esperanton, la argumentoj por ĝi restus pure teoriaj, same kiel la argumentoj por multaj aliaj planlingvaj projektoj kiuj neniam sukcesis evolui ĝis parolkomunumo. Sed la ĉefa kaj plej konvinka argumento por Esperanto estas tio, ke ĝi funkcias, ke ĝi efektive kunligas mondvastan komunumon de tre diversaj homoj, kiuj uzas ĝin por esprimi kaj plenumi enorman gamon de homaj bezonoj kaj homaj kapabloj. Jes, vi, karaj aŭskultantoj, vi estas la plej konvinka argumento por nia lingvo, ne pro tio, kion vi diras pri ĝi, sed pro tio, kion vi faras per ĝi!

Mi pensas ke ni ofte subtaksas, kiom tiu trajto diferencigas nin de multaj aliaj sociaj movadoj. Pledi por socia ŝanĝo estas unu afero; praktiki socian ŝanĝon estas alia, precipe kiam tiu ŝanĝo estas ankoraŭ tre minoritata elekto. Esti vegetarano antaŭ tridek jaroj, ekzemple, estis en multaj landoj kaj cirkonstancoj malfacila defio! Kaj oni povas esti vegetarano sola, sed por esti aktiva esperantisto oni bezonas aliajn esperantistojn. Niaj pioniroj devis fari grandajn klopodojn por retrovi unu la alian, por krei komunajn tradiciojn, komunajn instituciojn. Kaj ankoraŭ nun, malgraŭ la ekzisto de Interreto, fariĝi kaj resti aktiva uzanto de Esperanto postulas konstantan elektemon, iuspecan rifuzadon simple cedi al la kutimoj de la socio ĉirkaŭ ni. Kiam vi elektas veni al kongreso anstataŭ iri al la plaĝo – aŭ kiam vi iras al la plaĝo, sed kunportas la plej lastan krimromanon en Esperanto – vi samtempe manifestas vian apartenon al tiu ĉi eksterordinara mikrokosmo de homa egaleco kaj homa interkompreniĝo.

Kulturo konsistas el tiaj faroj, el tiaj agoj, el tiaj elektoj. Ĝi estas procezo de konstanta kreado. Kiam ni pensas pri kulturo en niaj modernaj amassocioj, ni ofte imagas nin kiel konsumantoj de la kreaĵoj de aliaj. Sed la kulturo de Esperanto ne estas tia, aŭ ne nur tia. Mia amiko István Ertl iam nomis ĝin "memserva" kulturo; laŭ mi, ĝi estas eĉ "memkuira" kulturo. Zamenhof memkuiris la bazon de la lingvo; aliaj memkuiristoj uzis ĝin por ekkrei siajn proprajn pladojn; kaj la memkuira tradicio daŭras ĝis nun, en hejmoj kaj kafejoj kaj klubejoj kaj retejoj tra la mondo. Kompreneble, ni havas niajn ĉefkuiristojn, niajn homojn kun la tri steloj de Michelin – homojn kiel la karmemora Marjorie Boulton, nia poeto, instruisto kaj eseisto, biografianto de Zamenhof kaj Baghy, kies forpason ni memoras hodiaŭ kaj kies atingojn ni prifestos dum la kongresa semajno. Sed la atingoj de niaj korifeoj eblas nur sur la bazo de populara kuirkulturo konstruita de ni ĉiuj.

Kaj tio kondukas min al la aktuala defio, kiu frontas nin. Ni ĉiuj verŝajne konas la statistikojn, ke ĉiujare centoj da miloj da retaj lernantoj elektas ekstudi Esperanton. Ni ne multe scias pri la motivoj de tiu elekto, sed verŝajne temas pri similaj motivoj kiel por ni ĉiuj: scivolo, idealismo, lingvemo, lernemo. Kaj kiel en ĉiuj kursoj, nur parto de ili daŭrigas la lernadon, aŭ venas al la fino de la unua studplano. Tiun realon ni verŝajne ne povas ŝanĝi. Esperanto estas relative facila, sed ĝi ne estas absolute facila! Ne eblas atendi, ke pli ol kvin aŭ dek procentoj de la eklernantoj persistos ĝis iu baza nivelo de kompetento.

Tamen, kvin procentoj de unu miliono de homoj estas 50 000 novaj potencialaj esperantistoj. Tiajn nombrojn ni ne vidis de multaj jardekoj; eble neniam. Sed la 50 000 ne troviĝas ĉi tie inter ni; nek 5 000; nek eĉ 500 el tiuj novuloj. Mi kompreneble ne volas diri, ke oni devas partopreni Universalan Kongreson por fariĝi vera esperantisto! Sed ni rajtas atendi, ke iu parto de la homoj kiuj trovas sian vojon al Esperanto trovos sian vojon ĉi tien, al nia plej granda kultura festo, la plej okulfrapa pruvo pri la vivanteco de nia lingvo, ĝia popolo, kaj ĝiaj tradicioj.

Mi ne dubas, ke inter ni hodiaŭ troviĝas ĝuste tiaj homoj, kiuj eklernis Esperanton per la reto kaj iom post iom enmovadiĝis. Bonvenon al vi! Sentu vin hejme! Sed ni devas pensi pri la multaj aliaj, kiuj mankas. Tio laŭ mi estas speco de kultura problemo – nia kultura problemo. Mi diris pli frue, ke kulturo konsistas el faroj, el agoj, el elektoj. La elekton lerni Esperanton devas sekvi aliaj elektoj uzi ĝin. Kaj ni devas faciligi tiuj elektojn! Ni devas helpi la novajn retajn lernantojn de Esperanto eksperti ĝian kulturon laŭeble frue, laŭeble ofte, laŭeble ĝue. Ni devas helpi ilin fariĝi memkuiristoj.

Tio estas defio kiun nun alfrontas UEA, kunlabore kun nia junulara sekcio TEJO kaj nia instruista faka asocio ILEI. Antaŭ kelkaj semajnoj ni interkonsentis kun gvidantoj de Duolingo, la plej granda reta lingvolernejo kun ĉirkaŭ du milionoj da retaj lernantoj de Esperanto, kunlabori pri la organizado de lokaj eventoj por tiuj lernantoj. Loka evento povas esti io ajn – renkontiĝo en kafejo, ludvespero aŭ muzika vespero, libroklubo, naturpromenado, progresiga kurso, virtuala renkontiĝo kun grupo de lernantoj en alia lando – la ebloj estas senfinaj. Ni havas la ambicion evoluigi tiun kulturon de lokaj eventoj, varbi kaj trejni kaj subteni lokajn organizantojn, por multe plivastigi la trafikon inter Esperanto kiel lingvo, Esperanto kiel ideo, kaj Esperanto kiel praktiko.

Kaj kia estas tiu praktiko? Nu, vi ĉiuj mem konas partojn de ĝi, ĉar jen vi ĉi tie, aŭskultante min, sentante nian kunecon en ĉi tiu momento, sentante la mirindan forton de la lingvo kiu ebligas tiun kunecon. Sed honore al la Jaro de la Esperanta Kulturo, kies kulmino venas en ĉi tiu kongreso, mi menciu kelkajn aliajn manierojn partopreni en nia memkuira praktiko, ne nur dum unu semajno de la jaro, sed konstante, ne nur en specialaj okazoj sed ankaŭ kiel parto de sia taga aŭ semajna rutino.

Ni povas elekti *legi*. Ne nur librojn kaj revuojn, la tradiciajn kolonojn de nia kulturo; nuntempe eblas krome legi blogojn, novaĵretejojn, diskut-forumojn, Vikipedion. La Esperanta Viki-

pedio troviĝas inter la kvardek plej grandaj lingvoj de tiu vaste uzata memkuirita enciklopedio. Ĝi cetere helpos vin orientiĝi en nia literaturo, unu el la grandaj kulturaj atingoj de nia movado, kiun ni diversmaniere prifestas ĉi-semajne. Nepre trovu vian vojon al la Libroservo dum via kongresumado, kaj forportu kelkajn el ĝiaj trezoroj por legi hejme!

Ni povas elekti *spekti kaj aŭskulti.* De jardekoj ni havas niajn radiostaciojn, kiuj provizis tiom da izolitaj lernantoj per vojo al la parola lingvo, kaj krome donis fascinan fenestron al aliaj landoj kaj kulturoj. En la lastaj tri jardekoj disvolviĝis vigla kaj riĉa muzika kulturo, kiu pro la reto iĝis alirebla por iu ajn muzikŝatanto. La mirinda projekto Muzaiko, la unua 24-hora retradio en Esperanto, estas akompanata de pli kaj pli da podkastoj, videoblogoj, kaj ankaŭ vivaj elsendoj per Facebook kaj aliaj kanaloj el kongresoj kiel nia ĉi tie. Nepre esploru, kiel pli regule dum la tuta jaro vi povas ĝui la vidaĵojn kaj aŭdaĵojn de Esperantujo.

Ni povas elekti *partopreni.* Tradicie ni pensas pri klubvesperoj, semajnfinaj kursoj, lokaj renkontiĝoj, landaj kaj regionaj kongresoj, kaj kompreneble la UK mem. Sed plivastiĝas la elektoj. Jam antaŭ deko da jaroj, responde al la plimultiĝo de retaj lernantoj ĉe la retejo *lernu.net*, Petro Balázs kaj lia teamo en Slovakio komencis organizi la Somerajn Esperanto-Studadojn, kiuj sukcesis allogi grandan gamon de esperantistoj, de la novaj ĝis la spertaj, de la junaj ĝis la ne plu junaj. En Usono rekreskis la intensa somera kursaro NASK kaj plurfoje aldoniĝis Kino-Teatra Festivalo, en kiu eblas ne nur spekti sed ankaŭ krei artaĵojn filmajn kaj scenejajn. Ĉina Radio Internacia jam dufoje organizis internacian konkurson de mallongaj filmoj pri la temo Teo kaj Amo, en kiu partoprenis konkursantoj el dekoj da landoj. Tiuj laŭ mi estas unuaj ondetoj de granda tajdo de novspecaj aranĝoj, al kiu la kunlaboro inter UEA kaj Duolingo certe kontribuos. Ju pli ni evoluos al kulturo de aktiva, diversspeca kaj konstanta partopreno, des pli alloga ni fariĝos por tiu nova generacio de retaj lernantoj, kaj des pli ni ĉiuj ĝuos nian esperantistecon!

Laste, kaj egale grave por nia kulturo, ni povas elekti *aparteni.* Iam, fariĝi esperantisto pli-malpli aŭtomate signifis aliĝi al loka grupo, landa asocio, aŭ UEA – eble ĉiuj tri. Dum jardekoj tio estis la plej evidenta kaj facila maniero ricevi informojn pri la movado, malkovri novajn facetojn de la lingvo, senti sin ano de mondvasta komunumo. Kompreneble tio ne plu necesas en sama grado. Nuntempe iu ajn kun komputilo kaj retkonekto povas ekorientiĝi en Esperantujo kaj eventuale eĉ eksenti apartenon al ĝi. Sed mi estas konvinkita pri la daŭra graveco de membriĝo. Membriĝo estas konkreta ago. Per la pago de kotizo, per la dono de viaj datumoj, vi investas ankaŭ parton de vi mem en kolektiva entrepreno. Nia mondo kaj nia movado bezonas tiajn investojn, en asocioj kiuj transiras la limojn de nacieco, klaso, religio, en kolektivoj bazitaj sur nia komuna homeco. Se Esperanto fariĝas parto de nia identeco – kiel jam okazis por multaj el ni ĉi tie, eble por ni ĉiuj – tiam ni vole-nevole apartenas al tia kultura komunumo, komunumo konstate rekreata el niaj faroj kaj agoj kaj elektoj. Elekti membriĝi – ĉu en UEA, ĉu en landa aŭ faka asocio, ĉu en loka grupo aŭ Esperanto-centro – estas baza konkretigo de tiu aparteno.

Mi fieras pri tiu nia kulturo. Ĝia riĉeco kaj diverseco ŝajnas al mi eksterordinara atingo, kiu rekonfirmas al mi ĉiutage la gravecon kaj valoron de nia afero. En tiu kunligado de mondoŝanĝa ideo kaj mondokrea praktiko, Esperanto faras unikan kaj radikalan kontribuon al la monda kulturo. Kaj la portantoj kaj vivigantoj de tiu kulturo estas vi, karaj kongresanoj. Mi dankas kaj gratulas vin ĉiujn pro viaj kontribuoj al tiu ĉi granda entrepreno. Bonvenon al nia komuna kultura festo! Bonvenon al Lisbono!

*Novjara mesaĝo 2019*

# La bezono senti nin kune

Unu el miaj antaŭuloj kiel Prezidanto de UEA kutimis priskribi sin kiel “la prezidanto de ĉiuj esperantistoj.” La vortoj ŝajnas unuavide pretendemaj. Eĉ se oni enkalkulas ĉiujn aligitajn membrojn de UEA (la membrojn de la aliĝintaj landaj asocioj), sendube ili konsistigas nur iun onon de la monda esperantistaro: duonon, kvaronon, okonon, kiu scias? Preter difinaj defioj, pro la disvastiĝo de interreto la lingvo estas pli kaj pli facile lernebla kaj uzebla ekster ajna organiza kadro. Se multiĝas komencantoj kaj progresantoj, kiuj apenaŭ scias, kio estas UEA – en kiu senco mi estas *ilia* prezidanto?

Kaj tamen, tamen… mi komprenas mian antaŭulon.

En la regulaj retkunsidoj de la Estraro, ĉiun duan semajnon, ni traktas amason da temoj kiuj tuŝas la vivon de Esperantujo, ne nur en la riĉaj landoj de Eŭropo kaj Norda Ameriko, sed krome kaj eĉ precipe en la “plimulta mondo” – la landoj, kie loĝas la plej granda parto de la homaro. En tiuj kunsidoj, oni ekhavas pli ĝustan komprenon de la vasteco kaj diverseco de nia tutmonda komunumo. Kaj temas ne nur pri la nunaj esperantistoj. Nia Estraro devas krome pensi pri la *potencialaj* esperantistoj – pri tiuj milionoj da homoj, kiuj enkore estas niaj samideanoj, eĉ se ili ankoraŭ ne trovis sian vojon al la lingvo. Ili ekzistas ĉie, en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj de la mondo, kaj ne nur en tiuj lokoj, kiujn ni mem persone konas aŭ konsideras gravaj.

Tiu malfermiteco, tiu zorgo pri ĉiuj homoj, kies korojn tuŝis aŭ povus tuŝi la revo kaj realo de Esperanto – tio estas kerna vivneceso por asocio, kiu aŭdacas nomi sin universala. Mi estas fiera, ke UEA ekde sia fondo ludas tiun vojmontran rolon. Tiuj samaj valoroj respeguliĝas ekzemple en niaj fondaĵoj, nemalhavebla rimedo por konkrete esprimi solidarecon inter homoj pa-

gipovaj kaj nepagipovaj, inter Nordo kaj Sudo, inter Oriento kaj Okcidento. Miloj kaj miloj da tiaj agoj de reciproka, transkultura aprezo kaj subteno fluas tra niaj kontoj ĉiujare.

Ankaŭ la nova membrosistemo de UEA enkorpigas tiujn valorojn. Ĉiu membriĝo de homo el riĉa lando subvencias la malpli kostan aliĝon de homo el malpli riĉa lando. Ĉiu membriĝo estas, do, solidara ago. Kiel ajn evoluos la organizaj kaj kulturaj formoj de la Esperanto-movado, mi estas certa, ke restos bezono de tia komuna universala asocio, en kiu ni povas senti nin kune – asocio kiu ebligas al ĉiuj homoj, per la simpla pago de kotizo, esprimi sian kredon je la nuno kaj estonteco de Esperanto.

Tial, sojle de nova jaro, mi invitas ĉiujn legantojn de ĉi tiu mesaĝo aliĝi al UEA, montrante tiel fidon al nia komuna forto. Kaj samtempe mi sendas bondezirojn ne nur al niaj aktualaj membroj, sed al ĉiuj homoj, kies vivon lumigas la lingvo de Zamenhof. Viaj zorgoj estas niaj zorgoj; viaj aspiroj estas niaj aspiroj. Kiel via Prezidanto, mi laboras kun niaj estraranoj kaj komitatanoj, niaj ĉefdelegitoj kaj komisiitoj, niaj mecenatoj kaj honoraj membroj, por kunkonstrui tian mondan asocion, kiun ni ĉiuj meritas kaj bezonas.

Mi deziras entuziasman, amikecan, kaj solidarecan jaron 2019 al ĉiuj esperantistoj!

*Festparolado en la 104-a Universala Kongreso de Esperanto (Lahtio, Finnlando, la 21-an de julio, 2019)*

# Lingvo de tera hejmeco

Estimataj honoraj gastoj, karaj kongresanoj,

Bonvenon al verda Lahtio! Efektive, ĉiu el ni, kiu vojaĝis ĉi tien el aliaj urboj, aliaj landoj, aliaj kontinentoj, povis jam iomete sperti la belegan finnlandan naturon, kiu ĉirkaŭas nian ĉi-jaran kongresan urbon. Espereble multaj el vi kaptos la okazon, en la venontaj tagoj, pli intime konatiĝi kun la lagoj kaj arbaroj, la parkoj kaj pejzaĝoj, pri kiuj nia gastiganta lando tiel prave fieras.

Sed la verdeco de Lahtio ne konsistas nur el tio, kion oni povas vidi kaj sperti kiel portempa gasto. Ne, la verdeco de Lahtio estas ankaŭ socia, kultura, ekonomia, politika. Ĝuste pro tiuj trajtoj, ĝi estas nomumita antaŭ unu monato kiel la Verda Ĉefurbo de Eŭropo por la jaro 2021. Tiu titolo rekonas urbon, kiu estas pioniro en agadoj por protekti kaj resanigi la naturon, kaj kiu malkovras kaj aplikas novajn solvojn por la defioj de mediprotektado en sia mastrumado.

Gratulante la urbestron kaj loĝantojn de Lahtio, ni rajtas samtempe gratuli nin mem. Ĉar por ni, Lahtio estas jam verda ĉefurbo! Dum unu semajno, tiu ĉi urbo gastigos nian parlamenton, nian universitaton, niajn klubojn kaj teatrojn, niajn lernejojn kaj kunvenejojn. Eĉ se vi ne vidos ĉie flirti la verdan standardon, vi povos senti ĝian ĉeeston fone de niaj diskutoj kaj distriĝoj, niaj kleriĝoj kaj kunmanĝoj. Esperantujo ja ekzistas ĉie, kie troviĝas esperantistoj; ĝi estas universala respubliko de la homaj koroj. Sed ankaŭ respubliko bezonas sian ĉefurbon; kaj hodiaŭ, kaj ĝis la venonta sabato, tiu ĉefurbo estas Lahtio.

Ĉu ekzistas ligo inter tiuj du specoj de verdeco? Ĉu estas nur hazardo, ke ni esperantistoj, kiuj zorgas pri la rilatoj de homo kun

homo, kaj la medi-defendantoj, kiuj zorgas pri la rilatoj de homo kun naturo, tiel ofte trovas nian vojon al la samaj lokoj – oni povus preskaŭ diri, al la samaj konkludoj?

Nia ĉi-jara kongresa temo invitas la respondon. Ĝin proponis al ni la lokaj kongresaj organizantoj, kiuj jam konis Lahtion kaj komprenis, kiaj demandoj radikas ĉi tie, kion la tero mem postulas de siaj homaj gastoj. "Vivanta naturo, floranta kulturo" – tio povus bele funkcii kiel devizo por Lahtio mem, kiu fieras ne nur pri siaj arbaroj kaj lagoj, sed egale pri siaj koncertoj kaj vintraj sportoj. Ĉu skiado kaj Sibelius povas proksimigi nin al la naturo? Lahtio diros, ke jes: ke kulturo kaj naturo estas kvazaŭ dancpartneroj kiuj bezonas unu la alian por kunmoviĝi harmonie – aŭ por helpi la homon kunvivi harmonie.

Se estas tiel, ni devas demandi nin pri nia situacio kiel esperantistoj. Kio estas *nia* rilato kun la naturo; aŭ, pli trafe, kio estas la rilato inter la Esperanta kulturo kaj la homa rilato kun la naturo en monda skalo? Tio estas demando ne tiel facile respondebla. Unuflanke, kiel vi scias, Esperanto estis elpensita specife kiel rimedo por ebligi pacan kaj egalecan komunikadon inter la homoj de *malsamaj* loĝlokoj, *malsamaj* ligitecoj al tero kaj historio. Ĝi estas do lingvo, kiu rezistas troan ankradon en specifa geografio. Aliflanke, oni povus diri ke la naturo vivas precipe *en* tiuj lokaj kuntekstoj. La centoj da milionoj da specioj en la mondo indikas, kiom la naturo emas adaptiĝi al la plej etaj nuancoj de klimato, geologio, situo. Iom sloganece: Esperanto tendencas al unuiĝo; la naturo tendencas al dismultiĝo.

Sed tio estas nur la unua, iom supraĵa rigardo. Ni esploru iom pli.

En la sepdekaj jaroj de la lasta jarcento, la brita sciencisto James Lovelock sugestis, ke la tuta tero funkcias certagrade kiel unu granda organismo. Trans la diversaj vivkondiĉoj de montoj kaj marĉoj kaj maroj, de dezertoj kaj ĝangaloj kaj glaciejoj, retoj de ekologiaj rilatoj kreas supersistemojn kiuj zorgas ke la planedo restu vivamika. En la komenco, tiu propono ŝajnis hereza;

oni akuzis lin pri mistikismo, pri naiveco, pri la elpensado de nova religio. Tamen, jardekojn poste, la t.n. *Gaia*-hipotezo restas fruktodona maniero imagi la funkciadon de la naturo en la monda skalo. Ne estas precize tiel, ke ĝi *venkis*; pli ĝuste, ĝi trovis por si lokon inter la pensokadroj bezonataj en tempo de klimata kaj ekologia krizo. Kaj ni ŝuldas tiun atingon al sciencisto, kiu havis la fantazion kaj kuraĝon doni al ni novan manieron rigardi la naturon, kiu emfazas ĝian unuecon pli ol ĝian disecon.

La historio de Esperanto estas multe pli longa, ol tiu de la *Gaia*-hipotezo, kaj enplektiĝas kun ĝi ĉiuj komplikaĵoj de la homa socia vivo, la homa psikologio, la homa kulturo. Tamen, ne ŝajnas al mi tute maltrafe vidi en la pensado de Zamenhof similan fantazion kaj kuraĝon. En siaj eseoj kaj paroladoj, li trovis manieron valorigi *samtempe* la gravecon de la lingvo por loka identeco *kaj* ĝian kapablon kunligi homojn trans ĉiujn diferencojn. Kompreneble, li ne ĉiam trafis la precizan ekvilibron inter tiuj du polusoj. Mi pensas aparte pri lia aserto, en sia fama eseo "Esenco kaj estonteco," ke:

> Ni konfesas, ke kiom ajn ni rompis al ni la kapon, ni neniel povis kompreni, en kiu nome konsistus la malfeliĉo por la homaro, se en unu bela tago montriĝus, ke ne ekzistas jam plu nacioj kaj lingvoj naciaj, sed ekzistas nur unu ĉiuhoma familio kun unu ĉiuhoma lingvo.

En la eseo mem Zamenhof tuj akceptas, ke tio estas minoritata vidpunkto, kaj li disvolvas argumentojn, kial la disvastiĝo de Esperanto povas nur plifortigi la pozicion de ĉiu unuopa loka lingvo kaj kulturo, kiu "liberiĝinte de la premado de multaj najbaroj kaj konservinte plene por si sola ĉiuj fortojn de sia popolo, disvolviĝos baldaŭ plej potence kaj brile." En la posta idea evoluo de la Esperanto-movado, ni vidas tiun koncepton iom post iom konkeri terenon, forpuŝante rivalajn ideologiojn, kiel la koloniisma insisto pri Esperanto kiel lingvo pli perfekta, pli unuiga, pli racia. Nuntempe estas tute normale aserti, ke Esperanto estas rimedo por protekti lingvajn rajtojn kaj lingvan diversecon.

Sed se ni revenas al tiu komenca frazo de Zamenhof, ni eble pli klare vidos, kio ankoraŭ mankas en tiu maniero pensi pri la ekologia rolo de Esperanto.

Ĝenerale mi havas tre altan opinion pri la perceptemo de Zamenhof. Claude Piron ie skribis pri la eksterordinara ekvilibro kiun ni trovas ĉe li inter racio kaj intuicio – ekvilibro kiu montriĝis nemalhavebla en tiuj malfacilaj komencaj jaroj de la movado. La homo, kiu verkis la raciegan analizon en "Esenco kaj estonteco," estas la sama, kiu poste insistis deklami "Preĝo sub la verda standardo" en la inaŭguro de la unua kongreso. Sed kompreneble intuicio povas nur labori kun la rimedoj, kiujn liveras la kulturo. En sia insisto pri la unueco de la homaro – kiu ja restas problemega defio ankoraŭ nun, kiel ni vidas en la ĉiutagaj novaĵoj – Zamenhof ne sufiĉe atentis la fakton, ke *homoj ne vivas nur kun homoj*. La eŭropa civilizacio de tiu epoko pli kaj pli distanciĝis de intimaj kontaktoj kun la naturo, almenaŭ por la kreskanta urbanaro, kaj fariĝis normale pensi pri lingvoj nur en tiu homfarita kunteksto. Se la lingvoj estas homfaritaj bariloj en interkompreniĝo, kial ne revi pri plene homfarita solvo?

Sed kiel ni nun pene lernas, plene homfaritaj solvoj ne ekzistas sur tero, kie ni dependas de aliaj specioj por vivteni nin. Por bone vivi sur ĉi tiu tero, ni devas lerni bone vivi kun tiu parteto de ĝi, kie ni kreskas kaj loĝas kaj laboras kaj ludas kaj vartas infanojn kaj aĝiĝas kaj mortas, kaj do *partoprenas* en la vivo de la loko, la ciklado de akvo kaj karbono kaj nitrogeno kaj energio, la rilatoj inter bestoj kaj plantoj kaj fungoj kaj mikroboj, inter aero kaj tero kaj akvo. Lingvo estas ne nur homfarita afero, sed parto de ĉi tiu loka vivo, kaj la granda diverseco de la tero kaj de la homaj kulturoj sur la tero postulas ankaŭ grandan diversecon de lingvaj rimedoj por priskribi kaj esprimi tiujn lokajn vivojn.

Tio memorigas min pri eta anekdoto. La eŭropaj esploristoj ege miris, kiam ili malkovris iom post iom la diversecon de lingvoj en la mondo. Nuntempe oni kutimas paroli pri ses mil

aŭ sep mil lingvoj, inter kiuj multaj estas tre etaj, kun malpli ol 10.000 parolantoj. Por la eŭropanoj, tia abundo ŝajnas ekstravaganca, sensenca. Sed por la indiĝenoj, kiuj parolas tiujn lingvojn, la afero aspektas alie. Foje iu lingvisto rakontis al oldulo de la tribo, kie li loĝis kaj laboris, kiom nekredeble vasta estas la monda lingvaro. La oldulo aŭskultis, kaj konfesis sin surprizita. “Nur tiom? Mi imagus multe pli…”

En ĉi tiu Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, estas taŭge provi imagi la mondon el tiu vidpunkto. La senfina diverseco de lingvoj estas aspekto de la senfina diverseco de la naturo; homoj kreskas en lingvojn, same kiel ili kreskas en la mondon. Ne havas sencon pensi pri homoj kiel unulingvaj, dulingvaj, multlingvaj; la demando estas nur: ĉu ili hejmas lingve? Ĉu iliaj lingvaj konoj kaj kapabloj helpas ilin bone vivi, kun siaj kunhomoj kaj kun ĉiuj aliaj kunloĝantaj vivestaĵoj de sia hejmloko?

Zamenhof estis inter la unuaj pensuloj kiuj klare vidis, ke la homa civilizacio survojas al tempo, kiam oni devas senti sin hejme ne nur loke sed ankaŭ monde. Li estis certe la unua, kiu klare ligis tion al la hejmigaj povoj de la homa lingvo. Sed jam tuj li frontis problemojn en la komunikado. Kiel nomi lingvon, kiu celas esprimi apartenon al la homaro kaj la tero kiel tuto? “Lingvo internacia” estis lia unua provo. “Lingvo neŭtrale homa” estis lia fina prefero. Sed ni, liaj posteuloj, daŭre luktas kun la fakto, ke neniu konciza termino adekvate klarigas la realon de Esperanto al homoj, kiuj ne mem spertis ĝin.

Kio okazus, se ni komencus pensi pri Esperanto kiel “lingvo de tera hejmeco”? Kiel aspektus niaj kongresoj, se ni konceptus ilin kiel festojn de tera hejmeco? Ĉar tiel mi, almenaŭ, interpretas la landajn salutojn, kiuj tradice konsistigas la lastan parton de nia Inaŭguro: ĉiu saluto memorigas, ke ni hejmas ĉi tie, inter ni, en ĉi tiu portempa ĉefurbo de la Esperanta respubliko, kaj samtempe ni hejmas dise, en niaj diversaj loĝlokoj, kiujn ni amas kaj volas konservi kun ĉiuj iliaj buntaj apartaĵoj, iliaj trajtoj siaspecaj – la homaj kaj la pli-ol-homaj.

Se ni estas movado por tera hejmeco, ni estas movado interalie por la protektado de tiu tero. Se ni vidas nin batalantoj por lingvaj rajtoj, ni devas konsideri nin batalantoj ankaŭ por teraj rajtoj – interalie, por la rajtoj de indiĝenaj popoloj mem mastrumi siajn terojn kaj akvojn. Se ni estas portantoj de vizio pri la lingva unueco de la homaro, ni devas ankaŭ insisti pri la ekologia unueco de la homaro. La etika bazo de Esperanto, kiun Zamenhof nomis la interna ideo, kaj kiun li provis enkodigi kiel homaranismon, koncernas ne nur la rilatojn de homoj kun homoj. Ĝi koncernas la mastrumadon de nia komuna, tera hejmo.

Nuntempe oni arigas diversajn alirojn al tiu mastrumado sub la komuna etikedo "daŭripova evoluigo". Unuiĝintaj Nacioj, ekzemple, fiksis por si 17 strategiajn celojn por gvidi la agadon ĝis 2030, la Celojn por Daŭripova Evoluigo. Mi ne estas tute feliĉa pri tiu termino, kaj la celoj mem ne troviĝas preter kritiko, sed mi restas konvinkita, ke ni devas pli klare ligi Esperanton kun tiu ĝenerala konceptaro kaj strebado. Por tio mi argumentas jam de la komenco de mia prezidanteco de UEA, kiu post ses jaroj nun venas al sia fino. Bonŝance, sed ne hazarde, miaj posteuloj dividas tiun konvinkon. Restas multe da laboro antaŭ ni, por disvolvi nian memkomprenon de Esperanto kiel lingvo de tera hejmeco, kaj por komuniki tiun komprenon al pli kaj pli vasta monda publiko. Sed ni estas sur bona vojo.

Venontjare en Montrealo, ni festos la 75-jariĝon de Unuiĝintaj Nacioj. Tio laŭ mi estus taŭga momento por lanĉi niajn proprajn celojn por daŭripova evoluigo: la daŭripova evoluigo de nia kara asocio UEA kaj de la Esperanto-movado en monda skalo, kaj samtempe nia kontribuo kiel esperantistoj al la Celoj de Unuiĝintaj Nacioj por Daŭripova Evoluigo. Temas finfine pri unu komuna strebado, en kiu la homaro devas unuiĝi aŭ perei.

Mi instigas vin uzi ĉi tiun semajnon, en nia verda ĉefurbo Lahtio, por profunde sperti ambaŭ flankojn de nia kongresa temo. Ĝuante nian florantan kulturon – niaj kursojn kaj prelegojn, niajn koncertojn kaj kunsidojn – donu samtempe dankan penson al la

vivanta naturo, kiu ebligas ĉion ĉi. Promenante apud la lago aŭ sub la arboj sur la stratoj, enspirante la freŝan finnlandan aeron, pensu samtempe admire pri la floranta kulturo de nia gastiganta lando, kiu scias aprezi kaj flegi la homan rilaton kun la pli-ol-homa mondo. Ĉi tiu harmonia interplekto de naturo kaj kulturo estu modelo por ni mem, por nia propra, unika festo de tera hejmeco.

Mi deziras al vi ĉiuj ĝojoplenan, kulturplenan, naturplenan kongreson!



## Parto 3

# Ne nur lingvo

# Enkonduke al Parto 3

Krom la Universalaj Kongresoj, mi kelkfoje vizitis aliajn movadajn aranĝojn dum mia prezidanteco, kaj ofte faris iun paroladon aŭ prelegon en tiuj okazoj. Tra la sama periodo mi partoprenis en kelkaj fakaj renkontiĝoj pri lingvo-politiko, kie mi kaptis la okazon por diri ion pri Esperanto. Ĉi tie kuniĝas tri tekstoj el tiuj diversaj fontoj.

En la jaro 2017, mi ricevis inviton de Pola Esperanto-Asocio, partopreni en tritaga konferenco-solenaĵo por marki la 100an datrevenon de la morto de Zamenhof. Mi ne povis resti por la tuto, sed mi venis por la unua tago, al kiu mi kontribuis per parolado kiu celis elstarigi la multflankecon de lia movad-konstrua laboro. Estante nun en la aĝo, en kiu Zamenhof mortis, mi des pli aprezas lian gigantan sinoferan investon de tempo, energio kaj talento.

En posta parolado en 2019, ĉe la usona landa kongreso, mi reprenis la temon de tiu multflankeco. Jam proksimiĝis la fino de mia prezidanta periodo, kaj mi volis iel resumi por la publiko kaj por mi mem la kernan gravecon de UEA kiel daŭriganto kaj konkretiganto de zamenhofa kulturtradicio. Eble surprize, tiu pensofluo revenigis min fine al la ideoj pri daŭripovo, kiujn mi esprimis kvin jarojn pli frue, kaj kiujn oni retrovas en Parto 1 ĉi-libre.

Alikaraktera estas la tria teksto, prilaborita versio de mia kontribuo al faka konferenco en Nederlando en 2013, nelonge post mia prezidantiĝo. Ĝian nunan formon, por esperantlingva publiko, mi redaktis por festlibro honore al mia prezidanta antaŭulo Renato Corsetti. En ĉi tiu libro ĝi estas la sola vera studo, kun abundaj referencoj al la faka literaturo (precipe en la angla, mia denaska kaj labora lingvo). Ĝi fokusiĝas al demandoj, kiuj interesas min jam de multaj jaroj, pri la rolo de ideoj kaj idealoj en la socia vivo de Esperanto. Min speciale fascinas la evoluo de

moroj kaj etikaj konceptoj inter esperantistoj – temo inda je pli vastaj kaj empirie intensaj esploroj.

La titolo de ĉi tiu parto, “Ne nur lingvo,” cetere taŭgus por la tuta volumo, almenaŭ en tiu senco, ke mi ree kaj ree emfazas la socian signifon de Esperanto kaj la homajn valorojn kaj bezonojn de ĝia komunumo de uzantoj. Tio kompreneble ne estas originala konstato miaflanke; oni povus eĉ diri, ke UEA estas fondita sur tiu kompreno.

*Parolado en la Konferenco okaze de 100a mortodatreveno de Ludoviko Zamenhof*
*(Varsovio, la 28an de aprilo, 2017)*

# Ne nur lingvo! Kiel Zamenhof kreis popolon

Ludoviko Lazaro Zamenhof, kies vivon ni omaĝas hodiaŭ, estas tutmonde konata kiel la "aŭtoro" de la internacia lingvo Esperanto. Aŭtoro li ja estis, tute laŭvorte, kaj ankaŭ vortaristo, redaktoro, tradukisto kaj korespondanto. Se ekzistus muzeo de sanktaj objektoj el la historio de Esperanto, la skribotablo kaj la skribmaŝino de Zamenhof ricevus tie honoran lokon.

Per tiu skriba aktivado, Zamenhof lokiĝas en longega tradicio de eŭropaj intelektuloj, kiuj jam de antikvaj tempoj kultivis komunajn ideojn kaj tradiciojn tra vasta teritorio per la disvastigo de manuskriptoj, leteroj, libroj. La epoko de la Kleriĝo, kiu starigis la idean fundamenton por la laboro de Zamenhof, baziĝis unuavice sur la kapablo de verkistoj facile interŝanĝi ideojn kaj popularigi ilin inter la rapide kreskantaj tavoloj de la mezaj kaj laboristaj klasoj. Grandaj eŭropaj figuroj kiel Rousseau, Darwin kaj Goethe atingis sian influon per tia konstanta verka kaj koresponda agado.

Zamenhof tamen frontis baron, kiun ne frontis tiuj aliaj geniuloj: li celis ne nur disvastigi la *ideon* de internacia lingvo, sed ankaŭ konvinki homojn *lerni kaj uzi* ĝin. En la historio de planlingvoj, nur tre tre malmultaj aŭtoroj sukcesis trapasi tiun baron, kaj neniu en la sama skalo kiel Zamenhof. Schleyer kun Volapük, Peano kun Latine sine Flexione, Couturat kun Ido, Jespersen kun Novial, Gode kun Interlingua – ĉiuj tiuj brilaj matematikistoj, lingvistoj kaj filozofoj estis same idoj de la eŭropa Kleriĝo, ili ĉiuj disponis pri la samaj aŭ eĉ multe pli vastaj rimedoj kiel la

modesta varsovia kuracisto, kaj ili ĉiuj trovis sin antaŭ defio, kiu en la fino montriĝis por ili nesolvebla. Nome, ne sufiĉas aŭtori *lingvon;* oni devas ankaŭ kultivi *lingvo-komunumon kaj lingvan movadon.*

Do, por kompreni la genion de Zamenhof, oni devas rigardi ne nur al la lingvaj trajtoj de Esperanto, jam vaste konataj kaj analizitaj. Oni devas krome konsideri, kion li faris por doni formon kaj vivon al la popolo kiu portas la lingvon. Kaj jam per tia elekto de vortoj, ni eniras kampon plenan de minoj. Ĉar kio estas popolo? Ĉu vere havas sencon paroli tiel pri la parolantoj de Esperanto, kiuj vivas tiom dise, kiuj parolas tiom da aliaj lingvoj, kiuj estas anoj de tiom da diversaj nacioj kaj gentoj? Ĉu ne temas simple pri hazarda kolekto de homoj kun komuna intereso, simile kiel la kolektantoj de poŝtmarkoj aŭ la ludantoj de ŝako? Aŭ, en plej bona kazo, pri la uzantoj de oportuna teknikaĵo, kiel, ni diru, la nuntempaj utiligantoj de la komputila sistemo Linukso?

Zamenhof mem profunde pensis pri la demando, kio estas popolo. Kreskinte en judaj familio kaj medio en Bjalistoko, ekde siaj universitataj jaroj li aktive interesiĝis pri la diversaj movadoj, kiuj pledis por tiu aŭ alia solvo al la daŭra aparteco kiun la judoj spertis en la eŭropaj socioj. Oni fakte povus diri, ke en lia vivo la solvo de la juda demando profunde interplektiĝis kun lia pensado pri Esperanto kaj ĝia estonteco. Nome, ju pli li pensis pri la juda sperto, des pli li konvinkiĝis, ke oni ne povas atingi pacon kaj justecon por unu popolo, se oni ne atingas pacon kaj justecon por ĉiuj. Sed li vidis ankaŭ, ke la necesa sento de komuneco inter la popoloj kreskos nur per la kultivado de specifa idea kaj kultura tradicio – kiel dolorige instruis la juda sperto, ne sufiĉas la simpla premo de cirkonstancoj, eĉ tra jarcentoj da kunvivado. La popoloj restos dividitaj, ĝis ĉiuj povos senti sin samtempe anoj de plia tutmonda popolo neŭtrale homa.

Tiu koncepto de Zamenhof nun ŝajnas al ni natura, kvazaŭ li jam tenis ĝin dekomence. Sed fakte li devis iri sufiĉe longan vojon, antaŭ ol ĝi iĝis la bazo de lia aliro al Esperanto. En la Unua

Libro de 1887, ni vidas lin lukti inter sia intuicia konvinko, ke internacia lingvo estas afero de sentoj, afero de la koro:

*Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,*
*El mia brusto nun ne saltu for!*
*Jam teni min ne povas mi facile,*
*Ho, mia kor'!*

kaj lia intelektula emo ĉion bazi sur racia argumentado:

*La nun proponatan broŝuron la leganto kredeble prenos en la manojn kun malkonfido, kun antaŭe preta penso, ke al li estos proponata ia neefektivigebla utopio; mi devas tial antaŭ ĉio peti la leganton, ke li formetu tiun ĉi antaŭjuĝon kaj ke li pripensu serioze kaj kritike la proponatan aferon.*

En la sekvaj jaroj, Zamenhof plej ofte inklinis al la dua vojo. Estas ofte malfacile taksi, kiugrade Zamenhof mem kredis je la ebleco "formeti antaŭjuĝojn" kaj fariĝi esperantisto surbaze de racia konvinkiĝo. Tamen tio estis lia ĉefa aliro dum la unuaj jaroj de la movado. Temis ne nur pri parolado al eksteruloj, kiel en la fama eseo *Esenco kaj estonteco* el 1900, kie li tre logike kaj sisteme elmetis argumenton, ke Esperanto nepre devas venki. Temas ankaŭ pri lia aliro al la gvidado de la movado. Se ni ekzemple rigardas liajn sinsekvajn vanajn klopodojn fondi internacian ligon de esperantistoj – en 1889-1890, en 1893-94, kaj en 1897, kiam temis pri kunvoko de internacia kongreso—ni vidas, ke li aliras la taskon ne de la emocia kaj identeca flanko, sed kvazaŭ organizanto de societo de akciuloj.

Kiel aliaj grandaj mensoj, tamen, Zamenhof ne lasis sin bridi de troa konsekvenceco. Dum tiuj samaj jaroj, kiam li klopodis racie organizi la esperantistojn, li tute senhonte publikigis la emociplenajn, inspirajn poemojn kiuj poste, kun liaj kongresaj paroladoj, fariĝos liaj plej famaj verkoj. *La Espero* aperis jam en 1890:

*En la mondon venis nova sento,*
*Tra la mondo iras forta voko,*
*Per flugiloj de facila vento*
*Nun de loko flugu ĝi al loko…*
kaj *La Vojo* en 1896:
*Tra densa mallumo briletas la celo*
*Al kiu kuraĝe ni iras,*
*Simile al stelo en nokta ĉielo*
*Al ni la direkton ĝi diras…*

Estas ja memevidente, ke tiajn poemojn oni ne verkas por societo de akciuloj!

La jaro 1901 estis, laŭ mi, speco de turnopunkto. En januaro de tiu jaro, Zamenhof publikigis sian longan ruslingvan eseon pri Hilelismo, en kiu li unuafoje arigis siajn argumentojn por la "kreo de neŭtrala popolo" kiu povas superi la naciismojn kaj sektismojn kiuj kaŭzas tiom da doloroj en la mondo. En tiu momento ankoraŭ temis pri juda projekto, ne celata al la esperantistoj, kvankam Zamenhof ja antaŭvidis rolon por sia lingvo en la kreo de tia popolo. Sed metinte siajn ideojn sur paperon, li sendube komencis pensi pli konkrete pri ilia aplikado al la Esperanto-movado, kiu komencis rapide kreski en Francio kaj aliaj okcidenteŭropaj landoj. De tiu momento ni komencas vidi pli klare tiun Zamenhof, kiun ni hodiaŭ memoras, la Zamenhof de la kongresaj paroladoj, tiun kiu insistos deklami en Bulonjo la *Preĝon sub la Verda Standardo*, kiu komprenis, ke ne sufiĉas krei lingvon, ke necesas doni al ĝi spiritan kaj idean dimension kiu tuŝas la animon.

*Post multaj miljaroj da reciproka surda-muteco kaj batalado, nun en Bulonjo-sur-Maro fakte komenciĝas en pli granda mezuro la reciproka kompreniĝado kaj fratiĝado de la diverspopolaj membroj de la homaro; kaj unu fojon komenciĝinte, ĝi jam ne haltos, sed iradas antaŭen ĉiam pli kaj pli potence, ĝis la lastaj ombroj de la eterna mallumo malaperas por ĉiam. Gravegaj estas la nunaj tagoj en Bulonjo-sur-Maro, kaj ili estu benataj!*

Zamenhof ja neniam sukcesis fondi internacian ligon de la esperantistoj – tio estis la atingo de la juna sviso Hector Hodler, kiu troviĝis inter la aŭskultantoj de Zamenhof en la urba teatro de Bulonjo. Sed estis tamen Zamenhof, kiu sukcesis doni al la esperantistoj fortan ni-senton, senton de identeco, senton ke ili estas pli ol nur hazarda kolekto de lingvo-uzantoj. Kaj ni devas agnoski la kuraĝon, kiun tio bezonis, ĉar tiaj emociaj deklaroj kaj inspiraj metaforoj ne estis bonvenaj ĉe la francaj gvidantoj, eĉ ne ĉe tiuj, kiuj estis la plej proksimaj amikoj de Zamenhof, kiel Javal kaj Michaux. Ili trovis lin mistikisma, "kvazaŭ juda profeto," kaj timis ke li subfosos la seriozecon kaj neŭtralecon de la movado. Sed per sia propra ekzemplo Zamenhof montris, ke ne devas ekzisti kontraŭdiro inter la racio kaj la emocioj, inter praktika utileco kaj idea inspiriĝo. Lingvo, lingva komunumo, lingva movado, devas enteni ĉion, kaj tiel eblas ankaŭ por ĉiu unuopa esperantisto.

Unu el la ĉefaj rimedoj por esprimi tiun inkluzivecon estas la literaturo. Ĝuste tial, ŝajnas al mi, Zamenhof en la lasta jardeko de sia vivo ĵetis sin energie en la tradukan laboron. Liaj pli fruaj tradukoj, kiel *Hamleto*, celis riĉigi la fruan lingvon kaj elmontri ĝiajn kapablojn; nun, en la jaroj post Bulonjo, li produktis mirindan serion de verkoj, tradukante la Fabelojn de Andersen, la hebrean Biblion, verkojn de Schiller, Goethe, Heine, Orzeszko, Gogol, Molière, kaj eĉ la jidan verkiston Ŝalom-Alejĥum. Ne plu temis pri demonstro, temis pri kultivado de kultura bazo inda je popolo neŭtrale homa. Kaj tio ŝajnas al mi tre inda krono de la vivlaboro de Zamenhof, kiu ne nur kreis mirindan lingvon, ne nur spiris en ĝi la spiriton de alta idealo kaj donis al ĝi kvazaŭ popolan identecon, sed ankaŭ nutris ĝin per gravaj verkoj el la okcidenta kultura heredaĵo. Kiam li demetis ĉian oficialan rolon en la movado en Krakovo, 1912, li postlasis lingvon kaj komunumon kapablajn elteni la plej severajn ŝtormojn de la 20a jarcento, memfidajn, vivoplenajn, maturiĝantajn.

Zamenhof estis homo de sia epoko kaj sia loko. Esperanto ja portas la spurojn de tio, en sia vortaro kaj gramatiko, en siaj retorikaj formoj kaj kulturaj tradicioj. Ĝia universaleco estas samtempe tre specifa universaleco, se tiel diri, naskita sur pola tero, nutrita per judaj spertoj, akvumita per riveroj rusa, germana, franca kaj angla, por ne paroli pri la greka kaj latina. Tamen, same kiel Esperanto mem ekhavis vivon kaj valoron pli vastan ol tiuj radikoj, Zamenhof kreskis al mondrigardo preter tiu de siaj samtempuloj kaj samlokanoj. Lia kuracista diagnozo restas pli ol iam aktuala, en mondo disŝirita de reciprokaj miskomprenoj kaj malamoj; lia kuracilo, same efika, por tiuj kiuj pretas sekvi lian defian recepton.

Honoron al lia memoro!

*Parolado en la Landa Kongreso de Esperanto-USA (Bostono, Usono, la 15an de junio, 2019)*

# Esenco kaj estonteco: La signifoj de Esperanto kaj UEA por la nuntempa mondo

## Ĉu vi sciis, ke ni troviĝas en loko dediĉita al la oratora arto?

Mi ne aludas al la fakto, ke ĉi tiu konstruaĵo estas eksa banko. Bankistoj povas foje elokventi pri ciferoj, aŭ per ciferoj, sed ili malofte nomeblas oratoroj. Ne, mi pensas pri la unua celo de Emerson College, kiu je sia fondiĝo en 1880 nomiĝis "The Boston Conservatory of Elocution, Oratory, and Dramatic Art". La fondinto, Charles Wesley Emerson, studis la oratoradon ĉe Bostona Universitato, kaj kiam tiu ĉi malfondis sian oratoran fakon, li decidis mem zorgi pri daŭrigo de la tradicio. Al la nova lernejo li donis la devizon: "Esprimado necesa por evoluo."

Interese, ĉu ne, ke en tiu sama jaro en Germanio aperis la planlingva projekto Volapuko, la unua projekto de internacia lingvo kiu kaptis la atenton de iom vasta publiko. Evoluo de la esprimado, efektive! Kaj kiel ni scias, la evoluo ne haltos ĉe Volapuko. La novan lingvon lernos juna medicina studento en Moskvo, mem aŭtoro de lingvoprojekto similcela, kiun li jam elprovis ĉe siaj gimnaziaj amikoj. Volapuko ne kontentigos lin, kaj li redediĉos sin al la prilaboro kaj perfektigo de sia projekto, aperonta kelkajn jarojn poste kiel la Lingvo Internacia de D-ro Esperanto.

Ni pensu iom pri tiu ideo de evoluo. Kiam Charles Emerson metis ĝin en la centron de sia eduka koncepto, li celis du

aferojn: la personan disvolviĝon de la individuo, kaj la kulturan disvolviĝon de la socio. Ambaŭkaze, temas pri io vivanta, dinamika, malfermita al ŝanĝo kaj adaptiĝo. Laŭ Emerson, kerne en tiu procezo troviĝas la oratorado, la dramaj artoj, la lingvaj artoj ĝenerale. Homo, kiu lernas paroli bele, lernas pensi bele. Socio, kiu evoluas arte, evoluas ankaŭ en siaj moroj kaj vivkutimoj.

Zamenhof nomis sian lingvon "lingvo internacia" – tio estas unu maniero priskribi ĝin. Sed li nomis ĝin ankaŭ foje "lingvo arta," kaj tie ni vidas kunligon kun tiuj ideoj de Emerson. Nome, arto estas ligita al vivo. Lingvo, kiu vivas, estas lingvo, en kiu hejmas la arta esprimado. Lingvo vivanta estas lingvo multflanka, kies facetojn oni ekkonas per konversacioj, per renkontiĝoj, per leteroj kaj retmesaĝoj, per prozo kaj poezio, per kantoj. Lingvo vivanta estas lingvo, en kiu oni sonĝas. Lingvo vivanta estas lingvo, kiun oni amas.

Tion komprenis Zamenhof, profunde, intuicie. Evidente li povis fari raciajn argumentojn por Esperanto. La Unua Libro konsistas grandparte el tia eseo, kiu klopodas konvinki la leganton per logiko kaj rezonado. Sed enestas ankaŭ poemoj. Jen mi citas el unu el ili, ne "Ho mia kor'" sed alia, traduko el la germana romantika poeto Heine.

*En sonĝo princinon mi vidis*
*kun vangoj malsekaj de ploro, –*
*sub arbo, sub verda ni sidis,*
*tenante nin koro ĉe koro.*

Kial Zamenhof elektis ĝuste *tiun* poemon por ilustri la kapablojn de la nova lingvo? Nu, ni vidas tie reaperi la koron, tiun simbolon samtempe de la vivo kaj de la emocioj, kaj do mi supozas, ke pli aŭ malpli konscie li vidis en tiu poemo iun kontraŭpezon al la racieco de lia eseo, iun manieron signali, ke tiu ĉi lingvo estas malfermita al la "evoluo de la esprimado" kiu, kiel ni jam konstatis, estas aspekto de ĝia vivanteco.

Vidu, kiom da fekundaj semoj ni trovas tie:

- la kernan rolon de amo, sen kiu la bildo kaj la poemo ne ekzistus;
- la kunekziston de belo kaj malĝojo, la alta kaj la malalta;
- la parencecon de ĉio viva: la verda arbo, la amanta paro, kaj (kiel montriĝas en la postaj versoj) la neevitebleco de la morto;
- kaj la fakton, ke ĉio ĉi aperas *en sonĝo,* kie la homo estas partoprenanto sed ne reganto.

Tiuj, kiuj legis la diversajn biografiojn de Zamenhof – la unuan, de Privat; la klasikan, de Boulton; la senmitigajn, de Maimon kaj Ludovikito; aŭ la fascine fakan de Korĵenkov – rekonos, kiel tiuj ecoj trafadenas lian vivon kaj la vivon de Esperanto.

La poemo komprenigas al ni, ke tiu vivo – la vivo de vivanta lingvo – fontas el la vivo kaj morto de la homoj kiuj uzas ĝin, kaj ke tiu homa vivo estas mem integra parto de pli vasta vivanta kaj mortanta mondo. En tiu mondo oni plej profunde partoprenas per amo, aŭskultante per la koro. Kaj tiu, kiu imagas sin – aŭ la homaron – senlime scia kaj pova, kapabla elekti kaj regi la kondiĉojn de sia partopreno, nur revas.

Se ni amas, ni devas esti pretaj ankaŭ por la vangoj malsekaj de ploro. Tio estas esenca parto de la amo, same kiel la morto estas esenca parto de la vivo.

## Esperanto estas do pli, ol ni supozas.

Ĉiuj el ni havas niajn spertojn, niajn ideojn pri la lingvo.

Ni konas la bildojn pri Esperanto el la pasinteco. Lingvo de homa frateco. Genia inventaĵo simila al telefono. Nobla hobio. Solvo de la monda lingvoproblemo. Rimedo por protekti lingvan diversecon kaj lingvajn rajtojn. Bazo de transnacia mikrosocio. Ĉiu enhavas eron de vero.

Sed se ni estas honestaj kun ni mem, ni devas rekoni, ke ankaŭ la maloj enhavas eron de vero.

Lingvo de interpersonaj kvereloj. Inventaĵo kiu maltrafis la merkaton. Amata ĉevaleto de diversaj stranguloj. Politika tabuo. Plia elemento en la okcidenta kultura hegemonio. Sekteca klubo de singlorigantoj.

Mi mem preferas la unuan liston. Ĝi parolas per la lingvo de la sana, feliĉa koro. En la dua listo parolas la vundita koro. Sed la mondo, same kiel la poemo de Heine, entenas ambaŭ.

Necesas kompreni, ke Esperanto estas pli ol ĉio ĉi. Kiel vivanta lingvo, kiel ĉio viva, ĝi konstante eskapas niajn difinojn kaj pretendojn.

El tio sekvas, laŭ mi, ke ni devas ne tro strikte kroĉi nin al niaj ideoj pri la lingvo. Eĉ troa fokusiĝo al la *lingveco* de Esperanto povas malhelpi nian komprenon.

Ni povas vidi en tiu lumo la okupiĝon de Zamenhof pri homaranismo en la lasta jardeko de sia vivo. El la homarana vidpunkto, la grava kontribuo de Esperanto estas la kreo de nova bazo por etikaj homaj rilatoj – "alkutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton" (Zamenhof en Krakovo, 1912). Tio estas jam pli vasta kaj profunda celo, ol simple forigi lingvajn barojn.

Sed ni rigardu ankoraŭ pli vaste. Kion Zamenhof celis, tio estas la harmonia kunvivado de ĉiuj homoj sur la tero. Tio signifas, ke en la vera mondo de vivo kaj morto, lumo kaj mallumo, ĝojo kaj ploro – tio estas, meze de siaj suferoj kaj siaj duboj – homoj devas daŭri elekti ami unu la alian.

Esperanto ne staras ekster tiu problemaro. Kiel ĉio vivanta, ĝi partoprenas en ĝi. Esence, ĝi malfermas al la homaro *novajn ŝancojn kaj defiojn* sur la vojo al harmonia kunvivado – ĉar ĝi ebligas tiun pli vastan kaj profundan renkontiĝon de homoj kun homoj, pri kiu Zamenhof parolis en Bulonjo-ĉe-Maro.

La historio kaj heredaĵo de tiaj renkontiĝoj nomiĝas kulturo. Kiam oni staras en la Libroservo de UEA, aŭ en la Biblioteko Hodler, aŭ eĉ en la Centra Oficejo, oni ricevas ian impreson pri vasteco kaj komplekseco de tiu kulturo, sed tio estas nur pala ombro de la realo.

Ĉi-matene mi entajpis la serĉvorton "Esperanto" en Guglo, kaj trafis 719 milionojn da retpaĝoj. Tio estas alia indiko de la fakto, ke la vivo de Esperanto ege preteriras nian kapablon koni ĝin. Evidente multaj el tiu mencioj povas esti supraĵaj, bazitaj sur apenaŭa kono de ĝia historio kaj kuturo. Sed estas kontinueco inter eĉ plej komencaj palpoj kaj konetoj kaj la profunda, intima rilato al Esperanto de ĝiaj plej grandaj artistoj kaj aktivuloj. Tio estas, iusence, unu mondo – mondo de vivantaj homaj rilatoj, kiu *kolektive* konsistigas nian nuntempan respondon al la defio de Zamenhof: per Esperanto lerni pli bone ami siajn proksimulojn.

Evidente oni povas respondi pli aŭ malpli lerte al tiu defio. Oni povas miskoni la defion. Oni povas kredi, ke oni uzas Esperanton nur por distriĝo, aŭ por arto, aŭ por atingo de pli racia mondordo, aŭ por trovi edzon aŭ edzinon. Sed vole-nevole, uzante la lingvon oni partoprenas en historio, kiu komenciĝis per Zamenhof, per la demandoj kaj ideoj kiuj motivis lin. Kaj per sonĝo pri amata, larmanta princino sub verda arbo.

## UEA estas portanto kaj gardanto de tiu kulturo.

Ni ĉiuj scias, ke UEA estis fondita en 1908, "por faciligi ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter siaj membroj, kaj disvolvi ĉe ili komprenon kaj estimon por aliaj popoloj". Ĝia fokuso dekomence estis la vivo de la komunumo, kiu estu vigla, multflanka, etike orientita, mondvasta.

La vorto "universala," pli kutima en 1908, nun malofte uziĝas por priskribi tutmondan agadon, kvankam oni daŭre trovas ĝin en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Ĝi tamen bone kaptas kernan trajton de UEA: ke "nenio homa estas al ĝi fremda" – se citi la faman frazon de Terencio, kiu tiel plaĉis al Zamenhof.

UEA okupiĝas pri arto kaj literaturo, interalie kadre de la arta programo de la kongresoj kaj la Belartaj Konkursoj. UEA okupiĝas pri scienco kaj filozofio, interalie per la Internacia Kongresa Universitato kaj la Esperantologiaj Konferencoj. UEA okupiĝas pri socio kaj politiko, interalie kadre de siaj rilatoj kun UN kaj Unesko kaj sia agado por homaj rajtoj kaj lingva egaleco. UEA okupiĝas pri trejnado kaj klerigo, interalie per la AMO-seminarioj kaj la KER-ekzamenoj. UEA aŭspicias regionajn kongresojn kaj fakajn aranĝojn tra la mondo. Ĝi ekzistas principe ĉie, kie oni uzas Esperanton.

Tiu inkluzivemo de UEA ne estas senproblema. Ĝi ŝarĝas la Asocion per kompleksa, multflanka taskaro por kies plenumo neniam sufiĉas la disponeblaj rimedoj. Ĝi malfaciligas strategiajn elektojn. Ĝi kondukas al malklara publika bildo kiu komplikas la membrovarbadon. Ĝi invitas al tro grandiozaj vizioj kaj iluzioj.

Aliflanke, ĝuste *tia* asocio plej bone respondas al la defio de Zamenhof. Arto, scienco, politiko, klerigo – jen kiel, en la praktiko, oni lernas koni kaj ami la proksimulon. Tiu konstato memorigu nin pri la Preamblo de la Ĉarto de Unesko, kies komenca frazo tekstas:

*Ĉar militoj komenciĝas en la mensoj de la homoj, estas en la mensoj de la homoj kie oni devas konstrui la defendojn de la paco…*

kaj kiu iom poste esprimas la volon de la subskribantoj:

*disvolvi kaj plivastigi la rimedojn de komunikado inte siaj popoloj kaj utiligi tiujn rimedojn por la celoj de reciproka interkompreniĝo kaj pli vera kaj pli perfekta kono de la vivoj unu de la alia.*

La celdeklaro de UEA estas, laŭ mia opinio, pli konciza kaj eleganta, sed esence samenhava.

Ni do provizore rigardu la Asocion unuavice kiel organizon por la disvolvado de edukado, scienco kaj kulturo per Esperanto, subtene al la homaranaj celoj de Zamenhof. Mi ne celas tion

kiel *preskribon* – mi ne argumentas, ke *devus* esti tiel; mi volas diri, ke tio estas kvazaŭ ĝia denaska naturo, ĝia historia rolo, pli-malpli sendepende de la voloj kaj interpretoj de ĝiaj diversaj gvidantoj kaj aktivuloj.

Alivorte, same kiel Esperanto estas vivanta lingvo, preter niaj limigitaj konoj kaj komprenoj pri ĝi, tiel ankaŭ UEA estas vivanta asocio, rezista al niaj trosimpligoj. Plie, tiuj du vivoj, de la lingvo kaj de la asocio, estas interligitaj. La kompleksa kaj malfacile stirebla fenomeno UEA respondas al la kompleksa kaj malfacile stirebla fenomeno Esperanto.

Per tio mi ne volas diri, ke stirado kaj strategio estas plene maleblaj. Same kiel eblas certagrade influi la evoluon de Esperanto kiel lingvo, ekzemple per la eldono de bona vortaro aŭ la lanĉo de popularega retkurso, eblas ankaŭ influi la vivon de UEA kiel asocio. Sed oni devas esti konscia pri la limoj de tiu influo, kaj formuli sian strategion sur tiu bazo.

Ekzemple, mi povas imagi multe pli modernan informstrategion por UEA. Sed ĝi ne estas realigebla per la tradiciaj rimedoj de UEA – la Estraro, la Centra Oficejo, la landaj asocioj. Tiuj apartenas al alia kultura mondo, tiu kiun mi ĵus priskribis, orientita al kontinueco kaj inkluzivemo. Tiu kulturo estas nia bazo; ni ne povas esence ŝanĝi ĝin.

Sed imagu, ekzemple, se UEA starigus jure sendependan fondaĵon, kun la sola celo profesinivele informi pri Esperanto. La gvidantoj de tiu fondaĵo ne rigardus unuavice al la Esperanta mondo por sia inspiro kaj gvido, sed al mondvasta publiko, al ĝiaj interesoj kaj esperoj kaj kapabloj. La tradicia kulturo de UEA estas orientita al konservado kaj solidareco; efika informkulturo estus orientita al dinamika adaptiĝo kaj memdisvolvo. Tiuj du kulturoj ne devas esti malamikaj inter si, sed ili jes bezonas distancon por ne ĝeni unu la alian.

Oni povas imagi aliajn kampojn, kie validas similaj distingoj. Ekzemple, tra la jaroj ofte leviĝis la demando, kial UEA ne

povus enspezi pli per turisma agado? La bazo certe ekzistas por pli da turisma komercado en Esperanto. Sed denove temas pri kulturdiferenco: pensi kaj agi komerce kelkrilate kontraŭas la kulturon de konservado kaj solidareco. Eblus fari ambaŭ, sed nur en relativa sendependeco unu de la alia.

Iusence, oni ne sufiĉe respektas, laŭ mi, la kulturgardan rolon de UEA. Se oni pli klare rekonus kaj proklamus ĝin, oni eble pli facile trovus manierojn antaŭenigi aliajn celojn kiuj ne naskus konfliktojn kaj frustriĝojn.

## Sur tiu bazo, ni povas alimaniere kompreni nian rolon en la mondo.

El ĉio dirita sekvas, ke nia monda kontribuo estas ne nur lingva sed kultura. Ni portas lingvan rimedon, jes; sed la lingva rimedo funkcias esence kiel pordo al evoluanta, multfaceta kultura tradicio. Homoj eklernas Esperanton pro plej diversaj kialoj, sed ili fariĝas kaj restas esperantistoj, nur se ili trovas per ĝi kulturan hejmon.

La demando do estas, por kio la mondo bezonas tiun nian kulturon?

Unu respondo kompreneble povus esti, ke ĝi tute ne bezonas ĝin. La Esperanta kulturo estas speco de artverko: ĝi alportas ĝojon kaj plezuron al iuj homoj, kaj tio jam sufiĉas. "Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas." – La fama frazo el la Deklaracio de Bulonjo, kvankam malsamtendenca, povus facile adaptiĝi al tiu koncepto.

Dua respondo insistus pri la fakto, ke la problemoj, kontraŭ kiuj Zamenhof luktis, estas daŭre kun ni: malamo, malpaco, maltoleremo. Tiugrade, ke nia kulturo sukcesas kultivi "komprenon kaj estimon por aliaj popoloj," ĝi povas ankoraŭ ludi utilan rolon en la streboj por homaj rajtoj kaj paca kunvivado. Kaj

fakte oni renkontas tiun komprenon relative ofte inter edukistoj, politikistoj kaj intelektuloj tra la mondo.

Tria respondo, pli lingve orientita, atentigus pri la daŭre vasta malegaleco inter la lingvoj de la mondo kaj la konsterna neglekto de tiu malegaleco en la programoj kaj agadoj de naciaj registaroj kaj internaciaj organizaĵoj. La Esperanta kulturo sukcesas kultivi prilingvan konscion en vere neordinara grado. Eble la mondo ankoraŭ ne komprenas tiun bezonon, sed tio povus eĉ esti konsiderata plia argumento por ĝia graveco.

Kvara respondo, kiun mi mem provis iom disvolvi kaj popularigi, ligus nian kulturon al la streboj al daŭripova evoluigo – la aktuala kerna programa koncepto de Unuiĝintaj Nacioj. Daŭripovo havas sociajn, ekologiajn kaj politikajn dimensiojn, sed esence temas pri la restarigo de ekvilibro inter homo kaj naturo en kondiĉoj de paco kaj justeco. La kreskantaj efikoj de klimatŝanĝiĝo kaj la kolapso de naturaj sistemoj plifortigas mian opinion, ke nia kulturo, same kiel aliaj, devas urĝe alfronti tiun defion. Temas ja pri vivneceso.

Antaŭ kvin jaroj mi verkis serion de mallongaj artikoloj pri tiu temo por la revuo Esperanto. Fine de la tria artikolo, mi prezentis kelkajn ideojn pri la adaptado de nia kulturo al la postuloj de daŭripova evoluigo. Jen mi citas ilin por vi, ĉar laŭ mi ili restas kaj restos aktualaj.

*Unue, ni ne bone pretigas niajn anojn por la defioj de interkultura kompreno. Paroli saman lingvon ne sufiĉas por interkompreniĝo. Sed la lingvo ja malfermas spacon, kie povas okazi interkultura kleriĝado de vere alta grado. Do, iom post iom, niaj renkontiĝoj devus fariĝi okazoj ne nur por ĝui niajn komunaĵojn, sed ankaŭ por esplori niajn diferencojn, jen serioze kaj fake, jen gaje kaj lude.*

*Due, tiu kleriĝado devus inkluzivi niajn rilatojn kun la naturo, ne nur en planeda skalo, sed ankaŭ je loka kaj regiona niveloj. En niaj kongresoj, ekzemple, okazas kursoj kaj prelegoj pri*

*lingvoj kaj kulturoj de la gastiganta lando, sed malofte pri ties arbaroj kaj riveroj, ties birdoj kaj bestoj, aŭ pri la ekologiaj defioj, kiujn frontas la kongresa urbo kaj regiono. Ni devas vidi nin kiel ponto inter ĉiuj malsamecoj, ne nur la homaj.*

*Trie, ni devas serioze aliri la ekonomian malegalecon, kiu por multaj homoj malhelpas plenan partoprenon en la movado. Tio signifas interalie malfermi niajn kongresojn al pli intensa kaj kontentiga reta partopreno, kaj elserĉi malmultekostajn manierojn disvastigi niajn kulturajn produktojn, kiel libroj, muziko, filmoj ktp.*

*Kvare, ni devas plifaciligi la spontanan komunikadon kaj kunagadon de homoj el ĉiuj mondopartoj surbaze de komunaj interesoj kaj celoj. Antaŭ cent jaroj, la Jarlibro estis genia eltrovaĵo por tiu celo. Nun la reto proponas multe pli vastajn eblojn, kiujn ni apenaŭ ekspluatis ĝis nun.*

Dum mia periodo kiel Prezidanto de UEA, mi provis iom puŝi niajn agadojn kaj ideojn en tiu direkto. Kiel jam klarigite, nia kulturo estas rezistema al novigoj, kaj tiel fakte devas esti; sed ŝanĝoj ja eblas kaj necesas. Mi invitas vin ĉiujn partopreni en la streboj fari nian kulturon ankoraŭ pli riĉa, ankoraŭ pli vojmontra por mondo, kiu urĝe serĉas respondojn al la defioj de daŭripovo.

*Artikolo por la Festlibro honore al Renato Corsetti (2016)*

# Kosmopolitismo en praktiko: Streboj kaj streĉoj en la Esperanta socibildo

## Kosmopolitismo kaj lingva praktiko

Jam de kelka tempo, la koncepto de kosmopolitismo altiras la atenton de sociologoj kaj politikologoj, kiel interpreta kadro por diversaj aktualaj tendencoj en modernaj socioj kaj formoj de identeco. La kosmopolitismon oni difinas diversmaniere, foje kiel idealon normdonan, foje kun celoj pli priskribaj. En rilato al Esperanto, min precipe interesas la nocio de kosmopolitismo kiel "sistemo de memtransformado" (Nowicka & Rovisco, 2009, p. 6), t.e. kiel procezo en kiu la individuo re-imagas/re-konstruas siajn rilatojn kun transnaciaj kaj tutmondaj komunumoj de nekonataj aliuloj. Kosmopolitismo en tiu senco konsistas en la aktiva mobilizado de diversaj formoj de kultura kapitalo por la konstruado de "imagataj komunumoj" kiuj estas eksplicite *ne-naciaj,* kontraste kun la regantaj formoj de imagataj komunumoj en la epoko de la "unua moderneco" (Beck) aŭ "solida moderneco" (Bauman).

Preter la konkreta kazo de Esperanto, tiu ĉi koncepto havas ĝeneralan gravecon por nia pensado pri plurlingvismo. Jam fariĝis pli kaj pli evidente, ke socibildo bazita sur nacio-centra imagaro – la bazo de tio, kion Beck nomas "metodologia naciismo" en la sociaj sciencoj – simple ne sufiĉas por priskribi kaj analizi la tutan gamon de lingvaj kondutoj kiuj karakterizas la nuntempan epokon de "likva"aŭ "dua" moderneco. Ekzemple, ĝuste la metodologia naciismo troviĝas malantaŭ la tendenco pensi kaj

paroli pri lingvoj kiel reciproke ekskluzivaj normaj variaĵoj, kaj sekve modeli la interagon inter la lingvoj kiel nulo-suma ludo kiu tendencas nepre al unulingvismo aŭ, plej bone, dulingva sistemo kun altprestiĝaj kaj malaltprestiĝaj variaĵoj. Simile, naciisma socibildo muldas la sintenojn kaj kondutojn de homoj en manieroj kiuj bremsas la evoluon de pli malstreĉaj kaj fluidaj versioj de mult-aŭ plur-lingvismo.

Do, mi utiligas la kosmopolitismon ĉi tie kiel rimedon por esplori la demandon, kiuj tipoj de socibildo efektive povus stimuli kaj subteni alternativajn prilingvajn sintenojn kaj kondutojn. Miatakse, la plej fruktodona aliro al ĉi tiu demando konsistas en esplorado de konkretaj ekzemploj de kosmopolitaj (aŭ kosmopolitiĝantaj) kulturaj komunumoj. Kiel komentas Falzon, "Kiam kosmopolitismo ekpraktikiĝas kaj enpenetras en realajn sociajn formojn, ĝi ĉesas esti normiga kaj senproblema koncepto, kaj disvolvas tute novan dialektikan dinamikon" (2009, p. 48). Estas ĝuste tiu dialektiko inter la loka kaj la tutmonda, la specifa kaj la universala, la normiga kaj la pragmata, kiu ŝajnas plej adekvata al konsiderado de la demando, kiaj tipoj de plurlingvismo povas troviĝi preter la "mallibereja modelo," kiel Beck epitetas la idearon pri reciproke eksludaj unuoj de teritorio kaj identeco.

## La Esperanta praktiko

Ekzistas, kompreneble, multaj lingvaj esprimoj de kosmopolitismo. Oni povus citi la lingvopraktikojn de la UN-profesiuloj priskribitaj de Nowicka kaj Kaweh (2009), aŭ tiujn de etna diasporo kiel la sindoj (Falzon, 2009), aŭ la spertojn de enmigrintoj vivantaj kaj laborantaj en variemaj lingvaj medioj (Blommaert 2010); ĉiuj tiuj povas liveri valorajn perspektivojn al la demando, kiun ni esploras ĉi tie. Aparte valora, tamen, povus esti la ekzamenado de la konduto de kosmopolita komunumo kun eksplicita, eĉ foje obseda fokusiĝo al lingvoelekto kaj lingvaj normoj.

Do, jen ni, la esperantistoj. Indas enkonduke memori la pli vastan intelektan fonon, sur kiu naskiĝis la lingvo. Jam ekde la mezo de la 19-a jarcento disvastiĝis la konscio, ke la pligrandiĝanta internacia (pli freŝdire, *tutmonda*) sfero postulos novajn manierojn pensi kaj agi, bazitajn sur iuspeca etika aŭ politika kadro transnacia. Almenaŭ al iuj, estis evidenta korolario ke tio inkluzivos novajn lingvajn elektojn. Tiuj evoluoj kondukis al ŝvelanta tajdo da proponoj por "universala" lingvo, kiel oni diris en tiu tempo, inter kiuj Esperanto montriĝis la plej sukcesa kaj vivipova.

Ankoraŭ maloftas la studado de Esperanto kiel socia fenomeno. Tio estas bedaŭrinda, interalie el la vidpunkto de la lingvo-sociologio, ĉar ĝi historio prezentas tre interesan kazon de lingvo-evoluo en tre multkultura kaj multidea kunteksto. Ĝenerale la interlingvistoj nun konsentas, ke unu el la ŝlosiloj al la sukceso de Esperanto estis la kompreno de Zamenhof, ke lingvoj ekzistas ne tiom kiel abstraktaj sistemoj, kiom kiel komunikaj kaj kulturaj rimedoj por homaj komunumoj. En tiu rilato, li klare sampensis kun tiaj pioniraj lingvistoj kiel Jan Baudouin de Courtenay, kiu mem fariĝis aktiva esperantisto kaj argumentis por ĝi kontraŭ pli teoriaj projektoj kiel Ido. Ankoraŭ hodiaŭ, multe pli ol jarcenton post la lanĉo, Esperanto restas la sola planlingvo, kiu disvolvis aŭtentikan, multgeneracian parol-komunumon kun aŭtonomaj lingvaj kaj kulturaj normoj (Wood 1979, Schubert 2002, Gledhill 1998, Libert 2003, Fiedler 1999).

Estas ĉi tiu socia vivo de Esperanto kiu faras ĝin taŭga studobjekto en la kadro de "kosmopolitismo en praktiko." Same kiel aliaj kosmopolitaj komunumoj, la Esperanto-komunumo havas tutmondan distribuon, problemplenan rilaton al la sistemo de naciaj ŝtatoj, komunan aron da sintenoj kiuj samtempe proksimigas kaj malproksimigas la anojn de la lokaj kulturoj, kaj transnaciajn retojn de rilatoj kiuj reproduktas sin tra la generacioj (Falzon, 2009). Pli kerne por ĉi tiu studo, ĝi havas firme establitajn tradiciojn de memkompreno kaj memorganizado, kiuj ilustras la kon-

struadon kaj vivtenadon de kosmopolita lingva identeco, kune kun iuj el la obstakloj kaj la neplanitaj akompanaĵoj aŭ sekvoj de tiu procezo.

Tri temkampoj ŝajnas al mi aparte signifohavaj en ĉi tiu kunteksto. Mi traktos ilin laŭvice.

## Identeco kaj komunumo

Kion signifas tio, esti Esperanto-uzanto, esperantisto? Ĉu la E-kolektivo estas komunumo aŭ movado, *Gemeinschaft* aŭ *Gesellschaft*, kvazaŭ-etna lingva minoritato aŭ transnacia grupo de lingvaj hobiistoj? Tiuj demandoj estas ne nur akademiaj, respondendaj per sociologiaj aŭ psikologiaj studoj (ekz. Forster, 1982), sed temoj arde pridiskutataj en la Esperanto-komunumo mem (ekz. Jordan, 1987). Tamen, la signifo de tiuj debatoj pliampleksiĝas, se ni konsideras ilin kiel esplorojn pri *kosmopolita identeco* kadre de memkonscie transnacia lingva diasporo. Per tio mi celas, ke esperantistaj debatoj pri komunumo kaj identeco estas manifestaĵoj de profunda kultura kaj psika lukto por *reimagi* la rolojn de lingvo kaj lingvouzo kiel ŝlosilaj indikiloj de identeco (Goffman, 1959).

Zamenhof mem estis la unua, kiu alfrontis tiun problemon: "Kiel oni povus atingi, ke grupo de diversetnanoj ellaboru – kaj vivtenu – la komunajn interligojn de la popoleco?" (Schor, 2010). Por li, la respondo troviĝis ne nur en komuna lingvo, sed ankaŭ en komuna etika kadro – en principaro, kiun li komence nomis *hilelismo*, laŭ la fama farisea samtempulo de Jesuo, sed poste rebaptis *homaranismo*. Estus tute pravigeble, nomi tiun inicaton de Zamenhof, el la jaroj 1901-1913, frua kosmopolita manifesto. Tamen, ĝuste en ĉi tiu periodo, la gvidan rolon en la monda Esperanto-movado firme transprenis sekularismaj, raciismaj okcident-eŭropanoj. En la idearo de Zamenhof ili vidis la spurojn de juda kaj slava mistikismo, al kiuj ili kontraŭmetis *opozician* kosmopolitismon kun radikoj en la ekonomia kaj socia

moderniĝo de la okcidentaj industriaj socioj. Tiel, ekde siaj fruaj jaroj, la komunumo gastigas eternan lukton inter la *ilistoj*, por kiuj Esperanto estas speco de komunika teknologio, kaj la *etikistoj*, kiuj vidas ĝin kiel movadon por monda frateco.

Do ni havas ĉi tie la unuan ambiguecon, aŭ streĉon, en la Esperanta kosmopolita identeco – ambiguecon tre utilan, ĉar ĝi ebligas al novuloj enkomunumiĝi iom post iom, alprenante tiom el ties kulturaj trajtoj, kiom ili povas kunteni kun siaj aliaj identecoj. Sammaniere, kaj kunligitaj kun ĉio ĉi, troviĝas aliaj ambiguecoj. Kiel bone oni devas regi Esperanton por membri en la komunumo? Kio estas la rilato inter la Esperanta kulturo kaj la naciaj kulturoj kaj lingvoj? Kio estas la rilato inter esperantisteco kaj lokeco? Estas interese noti, ke pluraj kernaj momentoj en la historio de Esperanto estas proksime asociitaj al difinitaj lokoj: Varsovio kiel la naskiĝurbo de la lingvo, Bulonjo-ĉe-Maro kiel la loko de la unua Universala Kongreso, Ĝenevo kaj poste Roterdamo kiel lokoj por la sidejo de la plej grava monda organizo de esperantistoj, Budapeŝto kiel la centro de la unua signifa literatura movado en la lingvo. Do, malgraŭ la fakto, ke al ĝi mankas ŝtato aŭ difinita teritorio, Esperanto havas klaran kaj dinamikan geografion, kiu daŭre disvolviĝas en multaj diversaj tavoloj de lokeco (ekz. en la nivelo de pluraj centoj da E-monumentoj, stratnomoj ktp dissemitaj tra la mondo).

La ĉiujara Universala Kongreso de Esperanto liveras kelkajn el la plej klaraj atestaĵoj de tiu strebado de la esperantistaro al memkompreno kaj memdifino. Oni povas vidi tion, ekzemple, en la rita kantado de la Himno en la Inaŭguro kaj Fermo, tradicio kiu ligas la kongresan semajnon kun la plej praaj jaroj de nia komuna kulturo. Eble plej kortuŝa, kaj samtempe ambigua, estas la tradicia salutado de la Landaj Asocioj fine de la Inaŭguro. Dum duona horo, longa spaliro de kongresanoj, iuj vestitaj en naciaj kostumoj, serpentumas trans la scenejon; unu post la alia, laŭlande, ili elbuŝigas kelkajn bonvenigajn vortojn en Esperanto, nome de siaj hejmrestantaj samlandanoj. La evento simbolas la

triumfon de Esperanto – rigardu, ĉi tie ni staras, aŭtenta tutmonda komunumo, kunvenanta kiel fratoj! – kaj ankaŭ ĝian malvenkon: jen, ĉi tie ni staras, ankoraŭ katenitaj al la naciaj identecoj kaj strukturoj, kiuj dividas nin jam de jarcentoj.

## Lingva memkompreno

La strebo difini, ĝuste kia estas la Esperanta komunumo kaj kian identecon ĝi proponas, evidente ligiĝas al la demando, kian lingvon ĝi uzas. Tie, ankaŭ, troviĝas profundaj kaj plejparte fruktodonaj streĉoj.

*Simpla lingvo aŭ riĉa lingvo?* La kerna vortprovizo de Esperanto estas tre produktiva, precipe pro la abundaj ebloj de la afiksa sistemo; por iuj movadanoj, ekzistas kaj estetikaj kaj etikaj kialoj eluzi tiun trajton por teni la lernendan stokon de radikoj kiel ebla plej malgranda. Aliflanke, Esperanto estas ellaborita en maniero, kiu celas faciligi la prunteprenadon de vortoj el aliaj lingvoj, kun adaptoj al ĝiaj fonologio kaj morfologio; por aliaj movadanoj, tia importado de vortradikoj estas esenca por taŭgigi la lingvon al novaj teknikaj kaj literaturaj uzoj. Ni konas la pasiojn investitajn en tiu batalo inter skemismo kaj naturalismo; sed indas krome konscii, ke temas denove pri rivalaj kosmopolitaj vizioj. Ĉe unu flanko, ni trovas vizion pri maksimume demokratia, inkluziva lingvo, kiu metas kiel eblan plej malgrandan ŝarĝon sur la anojn de ne-eŭropaj lingvoj; ĉe la alia, vizion pri maksimume diferencigita, kulture tavoligita lingvo, muldita sur la modeloj de la grandaj literaturaj lingvoj kiel la angla, franca, germana kaj rusa. Daŭre estas tiel, ke ambaŭ vizioj – kiel ajn malsimilaj – havas konsiderindan influon al la memkompreno de la komunumo kiel tuto.

*Helplingvo aŭ aŭtonoma lingvo?* Esperanto estas uzata *nur* en plurlingvaj kuntekstoj, kaj tial la influo kaj interago de aliaj lingvoj estas ĉiea. Tonkin (2013) argumentis ke en certa senco Esperanto estas *tradukita* lingvo, kies la semantiko komence

pruntiĝis el la lingokonoj de Zamenhof, poste el negocado inter la semantikoj de la diverslingvanoj, kiuj portis al ĝi la instinktojn kaj komprenojn de siaj denaskaj lingvoj. La semantika intertraktado en ajna lingvo estas eterne nefinita kaj nekompleta, sed en Esperanto ĝi estas aparte intensa kaj aparte videbla, pro la diverseco de la lingvaj fonoj de ĝiaj parolantoj kaj la fakto ke ĝi estas la denaska lingvo de tre malmultaj (Lindstedt, 2006; Tonkin, 2010). Tamen, kvankam la normoj de parola kaj skriba Esperanto estas pli elastaj ol oni kutime vidas en aliaj lingvoj, ili klare ekzistas kaj evoluas, pruvante la evidentan volon de la komunumo renkontiĝi sur komuna tereno. Ĉi tiun lingvan aŭtonomecon respegulas certa grado de kultura aŭtonomeco en la formo de originalaj literaturo, muziko, penstradicioj kaj tiel plu, kies originoj troviĝas (denove) en la fruaj jaroj de la movado.

Do unuflanke ni havas kosmopolitismon kiu strebas resti maksimume malfermita al aliaj lingvaj kaj kulturaj influoj, kaj aliflanke kosmopolitismon kiu strebas fariĝi unike siaspeca – celante disponigi lingvan kaj kulturan spacon senekvivalentan. Se oni komparas ĉi tiun situacion al tiu de la angla kiel pontolingvo, oni povas vidi ke, ambaŭrilate, Esperanto ĝuas signifajn avantaĝojn: ĝin ne pezigas la normoj de denaska parolantaro, malfermante la vojon al pli vasta gamo de esprimmanieroj, en kiuj rolas kaj pruntado kaj inventado. Tamen estus iluzie vidi ĉi tiun procezon kiel senprobleman aŭ senkontestan. Ĉiu esperantisto venas al la lingvo kun kultura bagaĝo, enpakitaj kutimoj kaj perceptoj devenantaj el la pli vasta socia (lingva) medio, en kiu ĉieas drastaj diferencoj en potenco kaj agopovo. Tio signifas, ke Esperantaj parolspacoj devas gastigi kaj iel mastrumi tiajn diferencojn, kaj ke la rezultaj lingvaj kondutoj (kaj eĉ la difinado kaj regado de tiuj parolspacoj) estas la produkto de lukto kaj rezisto *ene de* la movado mem. Ĝuste ĉi tiu konflikta, kunteksta, provizora versio de kosmopolitismo trovas enkorpiĝon en la Esperanta lingva realo.

## Etiko kaj justeco

En tiaj lukto kaj rezisto neeviteble kunrolas normigaj vizioj de lingva justeco kaj egaleco. Ni jam vidis, kiel tiuj konceptoj ĉeestas en debatoj pri tio, kia lingvo estas Esperanto; tute simile, ili fundamentas la memprezenton de la movado en forumoj kiel Unuiĝintaj Nacioj, kie Universala Esperanto-Asocio tradicie kunligas sin kun la pli vasta tagordo pri homaj rajtoj. Preter la tradicia okupiĝo pri lingvaj demandoj, temoj de socia justeco kaj daŭrigebla disvolviĝo lastatempe leviĝas pli ofte en movadaj rondoj; tiun evoluon certe influas la iom-post-ioma disvastiĝo de Esperanto ekster la industriaj landoj, plej lastatempe en tiaj relative malriĉaj landoj kiel Nepalo, Mongolio, Indonezio, Benino kaj Nikaragvo. Okazis signifaj ŝanĝoj kaj adaptiĝoj en la ideologio kaj praktiko de la movado dum la lastaj jardekoj. Por esploristoj de la kosmopolitismo, estos tre interese vidi kiel pludisvolviĝos tiu procezo en epoko, kiam la esperantista demografio laŭgrade eksimilas al tiu de la tutmonda loĝantaro.

Esperanto distingiĝas de multaj aliaj mondaj sociaj movadoj interalie pro tio, ke ĝi kunigas pledadon por sociaj ŝanĝoj, unuflanke, kun etike inspirita konduto, aliflanke. Alivorte, la Esperanto-movadon koncernas ne nur tio, kion Beck nomas "la ideo de 'kosmopolita venonteco'" (2011), sed samtempe la strebado realigi tiun idealon *ĝuste nun,* en kiel eble plej vasta gamo de lingvaj kampoj kaj kuntekstoj. La kompleksecon de ĉi tiu entrepreno malfacilas elkompreni, aŭ resumi. De tempo al tempo, tamen, ĝi fruktas en signifaj etikaj deklaroj, ĉu esprimitaj literature (kiel ekzemple la rimarkinda scienc-fikcia epopeo *Poemo de Utnoa* de kataluno Abel Montagut, 1993) aŭ principare (kiel la *Manifesto de Prago* el 1996: Fettes, 1997). Por esploristoj pri la kosmopolita realismo, kiel Beck etikedas sian vizion de nove elformiĝanta socia scienco, tiaj kristaliĝoj de karakteriza "esperantista" perspektivo al la mondo devus esti apriore interesaj, kiel indikiloj pri la kompleksaj procezoj de kosmopolitiĝo en la nuna epoko.

Eĉ hodiaŭ, malmultaj kleruloj pri lingvaj rajtoj, prilingva juro, instituciaj lingvoreĝimoj k.s. pretas doni al Esperanto pli ol preterpasan mencion (ekz. Kraus, 2008; Parijs, 2011; sed notu Phillipson, 2003; Grin, 2005). Tio kompreneble respegulas la realan situacion en tiaj institucioj kiel Eŭropa Unio kaj Unuiĝintaj Nacioj, kaj ankaŭ en naciaj registaroj tra la mondo, kie Esperanto malofte, se entute, ricevas iun ajn seriozan atenton sur politika nivelo. Tamen mi tezas, ke la valoro de Esperanto por tiaj prinormaj debatoj troviĝas ne en abstrakta, senkunteksta vizio pri "dua lingvo por ĉiuj," sed en la rilato inter etikaj principoj kaj lingva praktiko – tio estas, kiel rimedo por la konstruado de plurlingvaj komunumoj kie regas kosmopolitaj valoroj kaj normoj de konduto. En tiu lumo, eblas rigardi Esperanton kiel specon de propedeŭtiko – kiel rimedon por kultivi kosmopolitan lingvokoncepton, kapablan subteni pli vastan etikan plurlingvismon.

El tio sekvas, eventuale, ke la pristudo de Esperanto kiel kosmopolita praktiko ne nur stimulos la ellaboradon de novaj esploriloj, taŭgaj por la ekzamenado de aliaj nuntempaj kosmopolitanismoj; ĝi ankaŭ defios niajn samtempulojn ekzameni la individuajn kaj edukajn implicojn de teorioj kaj juraj aliroj al lingva justeco, kaj esplori la funkciadon de lingva etiko en praktiko. Dume, kaj nelaste, ni povas esperi, ke ankaŭ la esperantistoj lernos pli klare vidi sian propran historian rolon en tiu lumo, kaj pli energie labori por la konkretigo kaj disvastigo ne nur de Esperanto mem, sed de la valoroj kaj perspektivoj kiuj fundamentas ĝin.

# Referencoj

Archibugi, Daniele. 2007. The language of democracy: Vernacular or Esperanto? A comparison of the multiculturalist and cosmopolitan perspectives. In Chris Rumford, red. *Cosmopolitanism and Europe.* Liverpool: Liverpool University Press.

Auld, W. (1976). *Facetoj de Esperanto.* London: Brita Esperanto-Asocio.

Beck, U. (2011). Multiculturalism or cosmopolitanism: How can we describe and understand the diversity of the world? *Social Sciences in China* 32:4, 52-58.

Blanke, D. (1985). *Internationale Plansprachen: Eine Einführung,* Berlin: Akademie-Verlag.

Blanke, Detlev. 2003. Interlinguistics and Esperanto studies: Paths to the scholarly literature. *LPLP* 27/2:155-192.

Blanke, D. (2009). Causes of the relative success of Esperanto. *Language Problems & Language Planning* 33/3:251-266.

Blommaert, J. and Rampton, B. (2011). Language and superdiversity. *Diversities*, vol. 13, num. 2, pp. 1-21.

Blommaert, J., Collins, J. & Slembrouck, S. (2005). Spaces of multilingualism. *Language & Communication* 25 (2005) 197–216.

Cagliero, R. & Jenkins, J. (2010). *Discourses, communities, and global Englishes.* Bern: Peter Lang.

Christiansen, P. V. 2006. Language policy in the European Union: European / English / Elite / Equal / Esperanto Union? *Language Problems & Language Planning* 30:21-44.

Collins, J.P., Slembrouck, S., & Baynham, M. (2009). *Globalization and language in contact: Scale, migration, and communicative practices.* New York: Continuum.

Cronin, Michael. (2006). *Translation and identity.* Taylor & Francis.

De Schutter, H. (2007). Language policy and political philosophy: On the emerging linguistic justice debate. *Language Problems and Language Planning*, vol. 31, num. 1, pĝ 1-23.

Eco, U. (1995). *The Search for the Perfect Language.* Trans. James Fentress. Oxford UK & Cambridge MA: Blackwell.

Edwards, Jane. 1986. Esperanto and an international research context. In Humphrey Tonkin & Karen Johnson-Weiner (eds.), *The Idea of a Universal Language.* New York: Center for Research and Documentation on World Language Problems.

Edwards, John. 2009. *Language and Identity.* Cambridge: Cambridge University Press.

Esselstrom, E. (2008). The life and memory of Hasegawa Teru: Contextualizing human rights, trans/nationalism, and the antiwar movement in modern Japan. *Radical History Review.* 101:145-159.

Fettes, M. (1997). Esperanto and language policy: Exploring the issues. *Language Problems and Language Planning* 21/1, 66-77.

Fiedler, S. (1999). *Plansprache und Phraseologie*. Frankfurt am Main: Peter Lang.

Fiedler, S. 2010a. Approaches to fair linguistic communication. *European Journal of Language Policy* 2/1:1-21.

Fiedler, Sabine. 2010b. The English-as-lingua-franca approach – A way to fair linguistic communication? *Language Problems and Language Planning* 34/3:201-221.

Gardner, S. & Martin-Jones, M. (2012). *Multilingualism, discourse, and ethnography.* New York: Routledge.

Gazzola, M. & Grin, F. (2007). Assessing efficiency and fairness in multilingual communication: Towards a general analytical framework. *AILA Review* 20 (2007), 87–105.

Gledhill, C. (1998) *The Grammar of Esperanto: A Corpus-based Description*. Languages of the World/Materials 190. München / Newcastle. LINCOM Europa.

Gobbo, F. (2009). *Fondamenti di interlinguistica ed esperantologia.* Milano: Libreria Cortina.

Goffman, E. (1959). *The presentation of self in everyday life.* Garden City, NY: Doubleday.

Grin, F. 2005. *L'enseignement des langues étrangères comme politique publique*. Rapport ... du Haut conseil de l'évaluation de l'école, 19. Paris: Haut conseil de l'évaluation de l'école.

Guérard, A. 1922. *A Short History of the International Language Movement.* New York: Boni and Liveright.

Hornberger, N. H. (2007). Biliteracy, transnationalism, multimodality, and identity: Trajectories across time and space. *Linguistics and Education* 18, 325–334.

Jameson, Frederic. 1972. *The Prison-House of Language: A Critical Account of Structuralism and Russian Formalism.* Princeton: Princeton University Press.

Jordan, D.K. (1987). Esperanto and Esperantism: Symbols and motivations in a movement for linguistic equality. *Language Problems and Language Planning* 11 (1): 104-125.

Joseph, John E. 2004. *Language and identity: National, ethnic, religious.* Basingstoke k New York: Palgrave Macmillan.

Kimura, Goro Christoph. 2003. The metacommunicative ideology of Esperanto: Evidence from Japan and Korea. *LPLP* 27:71-83.

Kimura, Goro Christoph. 2012. Esperanto and minority languages: A sociolinguistic comparison. *Language Problems and Language Planning* 36/2:167-181.

Konishi, Sho. 2013. Translingual world order: language without culture in Post-Russo-Japanese war Japan. *Journal of Asian Studies* 72(1):91-114.

Korĵenkov [Korzhenkov], A. 2009. *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof.* Kaliningrado: Sezonoj / Kaunas: Litova Esperanto-Asocio.

Korzhenkov, A. 2010. *Zamenhof: The Life, Works and Ideas of the Author of Esperanto,* trans. Ian Richmond. New York: Mondial.

Künzli, A. 2010. *L. L. Zamenhof 1859-1917): Esperanto, Hillelismus (Homaranismus) und die "jüdische Frage" in Ost- und Westeuropa.* Wiesbaden, Germany: Harrassowitz.

Koundoura, M. (2012*). Transnational culture, transnational identity: The politics and ethics of global culture exchange.* London: I.B. Tauris.

Kraus, P. A. (2008). *A union of diversity: Language, identity and polity-building in Europe.* New York: Cambridge University Press.

Lapenna, I, U. Lins & T. Carlevaro. 1974. *Esperanto en perspektivo: Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo.* London & Rotterdam: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo.

Large, A. (1985). *The Artificial Language Movement.* Oxford: Blackwell.

Libert, A. (2003). *Mixed Artificial Languages.* Munich: LINCOM-Europa.

Lins, U. 1988. *Die gefährliche Sprache.* Gerlingen: Bleicher.

Lins, U. (2007). Esperanto oder das Dilemma des Dr. Zamenhof. In Gisela Dachs (ed.), *Sprachen. Jüdischer Almanach des Leo Baeck Instituts* (Frankfurt am Main: Jüdischer Verlag im Suhrkamp Verlag, 2007), 127-140.

Lins, U. 2008a. *Utila estas aliĝo: Tra la unua jarcento de UEA.* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

Lins, U. 2008b. Esperanto as language and idea in China and Japan. *LPLP* 32/1:47-60.

Ludovikito [Itô Kanzi]. 1998. *Historieto de Esperanto.* Tokyo: Libroteko Tokio.

Maimon, N. Z. 1978. *La kaŝita vivo de Zamenhof.* Tokyo: Japana Esperanto-Instituto.

McNeill, W. H. (1986). *Polyethnicity and National Unity in World History.* Toronto: University of Toronto Press.

Montagut, A. (1993). *Poemo de Utnoa.* Vienna: Pro Esperanto.

Mowbray, J. (2011). Linguistic Justice in International Law: An Evaluation of the Discursive Framework. *International Journal for the Semiotics of Law – Revue internationale de Sémiotique juridique,* Volume 24, Issue 1 , pp 79-95. DOI 10.1007/s11196-010-9177-6.

Müller-Saini, Gotelind & Gregor Benton. 2006. Esperanto and Chinese anarchism 1907-1920: The translation from diaspora to homeland. *LPLP* 30:45-73.

Müller-Saini, Gotelind & Gregor Benton. 2006. Esperanto and Chinese anarchism in the 1920s and 1930s. *LPLP* 30:173-192.

Okrent, A. (2009). *In the Land of Invented Languages.* New York: Spiegel & Grau.

Parijs, P. v. (2010) Linguistic justice and the territorial imperative, *Critical Review of International Social and Political Philosophy,* 13:1, 181-202, DOI: 10.1080/13698230903326323

Parijs, P. v. (2011). *Linguistic justice for Europe and for the world.* Oxford: Oxford University Press.

Park, J. S.-Y. (2011). *Local Construction of a Global Language : Ideologies of English in South Korea.* Berlin: Mouton de Gruyter.

Parkvall, Mikael. 2010. How European Is Esperanto? *Language Problems and Language Planning* 34/1:63-79.

Phillipson, R. (2011). English: from British empire to corporate empire. *Sociolinguistic Studies*, Vol. 5(3), pp. 441-464.

Phillipson, R. (2003). *English-only Europe? Challenging language policy.* London: Routledge.

Pool, J. (1979). Language planning and identity planning. *International Journal of the Sociology of Language*, 20, 5-21.

Pool, J. & Fettes, M. (1998). The challenge of interlingualism: A research invitation. *Esperantic Studies* 10: 1-3.

Rapley, Ian. 2013. When global and local culture meet: Esperanto in 1920s rural Japan. *Language Problems and Language Planning* 37:2, 179-196.

Roberts, C., & Baynham, M. (Eds.). (2006). Where talk is work: The social contexts of Adult ESOL classrooms. *Linguistics and Education*, 17(1).

Rossi, P. (2000). *Logic and the Art of Memory: The Quest for a Universal Language.* Chicago: University of Chicago Press.

Spivak, G. C. (2004). *Death of a discipline.* New York: Columbia University Press.

Sutton, G. (2008). *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto.* New York: Mondial.

Suzuki, T. (2010) Learning to be transnational: Japanese language education for Bolivia's Okinawan diaspora. Critical Asian Studies, 42:1, 63-88, DOI: 10.1080/14672710903537480

Tauli, V. (1968). *Introduction to a Theory of Language Planning.* Acta Universitatis Upsaliensis. Uppsala.

Tonkin, H. (2013). Traduko kaj originalo en la Esperanto-literaturo. *Beletra Almanako* 7/17:75-84.

Tonkin, H. (2010). The semantics of invention: Translation into Esperanto. In H. Tonkin & M. E. Frank, eds. *The Translator as Mediator of Cultures.* Amsterdam: John Benjamins. 169-190.

Tonkin, Humphrey. 2003. The search for a global linguistic strategy. Jacques Maurais & Michael A. Morris, ed., *Languages in a globalising world.* Cambridge: Cambridge University Press. 319-333.

Tonkin, H. (1993). Esperanto Studies: An Overview. In I. M. Richmond, ed. *Aspects of Internationalism: Language and Culture*. 9–20. Papers of the Center for Research and Documentation on World Language Problems 3. Lanham, MD: University Press of America.

Tonkin, H., ed. (1997). *Esperanto, Interlinguistics, and Planned Language.* Lanham, MD: University Press of America, & Hartford CT: Center for Research and Documentation on World Language Problems, University of Hartford.

Valle, J. d. (2011). Transnational languages: beyond nation and empire? An introduction. *Sociolinguistic Studies*, Vol. 5(3), pp. 387–397.

Varennes, Fernand de. 2012. Language policy at the supranational level. In Bernard Spolsky, ed. *The Cambridge Handbook of Language Policy.* Cambridge: Cambridge University Press. 149-173.

Waringhien, Gaston. 1987. *Beletro sed ne el katedro.* Antwerp: Flandra Esperanto-Ligo.

Warriner, D. S. (2007). Transnational literacies: Immigration, language learning, and identity. *Linguistics and Education* 18, 201–214.

Wood, Richard E. (1979). A voluntary, non-ethnic, non-territorial speech community. In W. Mackey & J. Ornstein, eds. *Sociolinguistic Studies in Language Contact.* The Hague: Mouton.

Wüster, E. (1931). *Internationale Sprachnormung in der Technik.* Berlin: VDI-Verlag. [Third revised edition, Bonn: Bouvier, 1970]

# Parto 4

# Edukaj defioj

# Enkonduke al Parto 4

Kiel aludite en la Enkonduko, mia faka kariero post mia kvinjara deĵoro en la Centra Oficejo (1986–1992) ŝuldas multon al mia esperantisteco. Jam dum tiuj jaroj mi komencis legi en la faka literaturo pri lingvo-sociologio kaj lingvo-politiko, volante pli bone kompreni la malkongruojn inter miaj spertoj pri Esperanto kaj la asertoj pri ĝi de homoj, kiuj nomis sin lingvistoj. Poste, en Kanado, serĉante manierojn daŭrigi tiun vojon de malkovroj, mi konstatis iun bazan parencecon kun miaj valoroj kaj perspektivoj ĉe indiĝenaj kanadanoj. Laboro ĉe la Asembleo de Unuaj Nacioj, unu el la gvidaj asocioj por indiĝenaj rajtoj je tutlanda nivelo, kondukis min al esploroj pri edukado, kaj fine al doktoriĝo en la jaro 2000 ĉe la Universitato de Toronto. Ekde 2002 mi laboras kiel profesoro ĉe la Universitato Simon Fraser, unu el la du grandaj universitatoj en Vankuvero, ĉe la Pacifika marbordo.

La tri IKU-prelegoj kolektitaj ĉi tie spegulas tiun multjaran engaĝiĝon pri indiĝenaj temoj, kaj krome mian kreskantan okupiĝon pri la reintegrado de lernejoj en lokaj kulturoj kaj ekologioj. La ligoj inter tiuj interesoj estas verŝajne memevidentaj. Troviĝas kompreneble spuroj de tiu faka orientiĝo en multaj tekstoj ĉi-libre – mi ja estas la sama homo, ĉu mi instruas en klasĉambro, esploras ĉe lokaj lernejoj, redaktas strategiajn dokumentojn, aŭ festparolas en kongresoj. Ĝuste tiu subkuŝanta unueco persvadis min inkluzivi ĉi tiujn tekstojn en libro, kies ĉefaj temoj estas Esperanto kaj UEA.

En 2018, mi estis arestita (kaj poste monpunita) pro partopreno en indiĝena protesto sur la flanko de la monteto, kie staras la ĉefa kampuso de mia universitato. Temis pri opozicio al la konstruado de nova nafto-dukto, kiu portos bitumenan solvaĵon el la kanada provinco Alberto al la vankuvera ŝiphaveno por eksporto al Azio. La konstruado okazas sur tereno, kiu daŭre

laŭ la kanada juro apartenas al la lokaj indiĝenaj popoloj. Mi nun ne eniros la kompleksajn detalojn; mi simple volas registri mian konvinkon, ke la temoj priparolitaj en prelegoj kaj fakaj studoj havas ankaŭ konsekvencojn por tio, kiel ni elektas vivi.

Esperanto vivas: tion komprenas ĉiu leganto de ĉi tiu libro. Sed kion signifas tiu vivo por ni esperantistoj? Mi esperas, ke la ideoj dissemitaj tra ĉi tiuj paĝoj, inkluzive de ĉi tiu lasta sekcio, kontribuos al pli inspiraj, pli profundaj, kaj pli vivoriĉigaj respondoj al tiu demando.

*Prelego en la Internacia Kongresa Universitato 2012 (Hanojo, Vjetnamio)*

# Lernejo kaj naturo: Novaj ebloj en epoko de ekologia krizo

## Rolo de la naturo en la homa lernado

Estas malfacile por ni nuntempuloj pensi ekster la kadro de la tradicia lerneja sistemo. Memoru, ke preskaŭ ĉiu el ni pasigis pli ol dek mil horojn de la infanaĝo en lernejoj kaj klasĉambroj. Laŭ la populara ĵurnalisto de ideoj Malcolm Gladwell, aŭtoro de libroj kiel *Outliers* kaj *Blink*, dek mil horoj reprezentas la tempon bezonatan por fariĝi eksperto sur iu kampo de la homa scio. Do, *ni ĉiuj estas ekspertaj lernejanoj*. Niaj imagoj pri lernado kaj instruado estas profunde mulditaj de la sidado ĉe skribotabloj, la soleca plenumo de tedaj skribaj taskoj, la silenta aŭskultado de instruistaj klarigoj, kaj tiel plu.

Necesas do unue rekonscii, ke tiu modelo de homa lernado estas io tre nova, radikala, eĉ stranga, laŭ la ĝeneralaj fluoj de la homa historio. La modernan lernejan sistemon pioniris Prusujo fine de la 18a jarcento; tie oni unue eksperimentis pri ĝenerala deviga edukado, nacia studprogramo, naciaj ekzamenoj, kaj faka trejnado de instruistoj. La racieco kaj universaleco de tiu sistemo tre konvenis al la temperamento de la epoko post la usona kaj franca revolucioj, kaj iom post iom disvastiĝis tra la eŭropaj landoj kaj iliaj kolonioj. Kvankam oni ankaŭ multe kritikis tiun sistemon kaj provis modifi ĝin laŭ diversaj manieroj, ĝi restas la baza modelo de publika edukado pli-malpli ĉie en la mondo.

Apenaŭ necesas substreki por ĉi tiu publiko, ke tiu modelo ne estas kulture neŭtrala, sed fakte baziĝas sur sufiĉe specifa

mondrigardo de mezkleraj urbanoj el la regantaj klaso kaj etno. Tial, ekzemple, la lingvo de instruado estas plej ofte la nacia lingvo (aŭ unu el la naciaj lingvoj, en oficiale plurlingva lando). Aliaj lingvoj estas foje toleratаj, sed preskaŭ neniam ludas kernan strukturan rolon en la instruado. Ne gravas kiom multlingva kaj multdialekta estas la socia kunteksto, la lernejo havas sian propran logikon kiu tendencas al unuformeco ene de la limoj de ŝtato aŭ alia politika unuo.

Tiu tendenco de la lernejo distanciĝi de la ĉirkaŭa medio validas ankaŭ se temas pri la naturo. Se oni pensas pri la klasika klasĉambro, kun ĝiaj rangoj de tabloj kaj seĝoj, ĝiaj fermitaj fenestroj kaj artefarita lumo, ĝi estas evidente tre homfarita spaco. Eble tie kreskas iu planto en poto, eble oni foje vidas akvarion aŭ simile, sed ĝi estas tamen ĝenerale kaj emfaze *nenatura* loko. Kaj tio validas ankaŭ grandparte pri la eksteraj spacoj de la lernejo, kie plej ofte regas ludterenoj kaj asfaltitaj kortoj, kaj arboj kaj plantoj nemalofte forestas entute. Kiel minoritataj lingvoj kaj kulturoj, tradicie la naturo estas en plej bona kazo *tolerata*, kaj en la studprogramo ĝi okupas nur tre marĝenan lokon.

En ĉi tiu prelego, ni rigardos al kelkaj provoj ŝanĝi tiun situacion en la lasta jarcento. Plej interesos nin, kion ni povus nomi "edukaj movadoj," kiam multaj lernejoj kaj instruistoj diverslande organiziĝas sub komuna etikedo aŭ konceptaro. Tiuj movadoj alprenas tre diversajn formojn, baziĝas sur malsamaj filozofioj, kaj fakte havas malsamajn celojn. Mia intenco ne estas argumenti por unu aliro aŭ alia, sed montri al vi, kiel kompleksa kaj defia estas tiu rilato homo-naturo en la kunteksto de la formala edukado. En la dua parto de la prelego, mi priskribos por vi lernejan eksperimenton, en kiu mi mem partoprenas kiel esploristo. Tio donos okazon por rigardi de pli proksime, kiel evoluas tiuspecaj iniciatoj en la praktiko. Gravas lerni de tiaj kazoj, ĉar kredeble ni troviĝas nun ĉe la sojlo de amasa eksperimentado pri pli naturproksimaj eduksistemoj, responde al la akriĝanta ekologia krizo kaj al profundiĝanta konscio pri la rolo de lernejoj en ĝia disvolviĝo.

## “Plenaeraj lernejoj” – ekde 1904

La unua granda movado por malfermi la lernejojn al la naturo havis radikojn pli kuracajn ol edukajn. En 1904, germana kuracisto Bernhard Bendix kunlaboris kun instruisto Hermann Neufert por fondi la tiel nomatan Waldeschule, aŭ arbaran lernejon, en Charlottenburg apud Berlino. La celgrupo estis infanoj ĉe kiuj oni diagnozis la unuajn simptomojn de tuberkulozo; oni kredis, ke ili havos pli da ŝancoj resaniĝi, se ili pasigos la tutan tempon en la freŝa aero de la arbaro. La eksperimento disvastiĝis tre rapide: oni malfermis similajn lernejojn en Belgujo samjare, en Svislando, Anglujo, Italujo kaj Francujo en 1907, en Usono en 1908, en Hungario en 1910, kaj en Svedujo en 1914. Post la unua mondmilito, tiuj disaj iniciatoj kuniĝis en veran movadon kun propraj asocioj kaj kongresoj (la lasta okazis en 1956) kaj interesaj eksperimentoj pri arĥitekturo.

Tamen, la fokuso de tiuj plenaeraj lernejoj evidente restis ĉe la homoj, ne ĉe la naturo. Se oni rigardas la fotojn, oni vidas jen lernantojn arigitajn en duonrondo ĉirkaŭ la instruisto, jen infanojn kiuj vigle marŝas por ekzerci la korpon, jen kuracistojn kiuj kontrolas la fizikajn efikojn de tia reĝimo. Krome, kun la paso de la tempo, la koncepto evoluis al lernejoj kies klasĉambroj ja estas malfermitaj al la ekstero, sed tamen restas *ĉambroj*. Tiaj lernejoj ankoraŭ ekzistas en diversaj landoj, ekzemple en Fendalton, Novzelando, aŭ en Schoten, Belgujo. En aliaj kazoj, la lernejoj ankoraŭ portas la nomo “plenaera” sed tute perdis la originan koncepton, kvankam ili ĝenerale plu okupiĝas pri malsanemaj infanoj; tiaj estas ekzemple lernejoj en Roterdamo, Nederlando, kaj en Sudafriko.

Tiu ĉi evoluo ilustras ĝeneralan tendencon en la lerneja sistemo. Kiam lanĉiĝas iu nova iniciato, ofte komence ĝi estas tre klare distingita de la antaŭ praktiko. Kutime ekzistas unu fokusa ideo pri tio, kion oni volas ŝanĝi – ekzemple, ĉi-kaze, ke la infanoj pasigu la lernejan tempon ekstere en la plena aero. Okazas

multe da diskutoj kaj planado ĉirkaŭ tiu ĉefa celo. Sed multon oni *ne* repripensas. En la plenaeraj lernejoj oni daŭre instruis matematikon, sciencon, lingvojn ktp en pli-malpli la sama stilo, kiun oni uzis en tradiciaj lernejoj. Kaj ĉar tiu tradicia pedagogio ne *bezonas* plenaerecon, la daŭripovo de la reformo dependas esence de eksteraj faktoroj. Post kiam la tuberkulozo renkontis draste pli efikan kuracilon en la formo de streptomicino (1946), la plenaeraj lernejoj iom post iom transformiĝis en ordinarajn lernejojn, aŭ simple malaperis. Tiel estas pri edukreformoj ĝenerale: ŝanĝo eblas, kiam socia bezono koincidas kun proponata solvo, sed nur tiel longe, ke oni enmetas energion en la sistemon de ekstere. Kiam malaperas la energifonto, la sistemo pli aŭ malpli rapide drivas en sian antaŭan staton.

## Medikonscia edukado – ekde 1970

Tra la periodo de la plenaeraj lernejoj, ekzistis ankaŭ movado por t.n. "natur-studado" kiu emfazis la kvalitajn diferencojn inter lernado el libroj en klasĉambro kaj la lernado el propraj spertoj en la naturo. Ĝi estis tamen konsiderata nur kiel unu aspekto de la lernprogramo, ne kiel la bazo de tute lerneja filozofio. Nur fine de la sesdekaj jaroj, kadre de ĝenerala ondo de sociaj konsciiĝo pri mediaj problemoj, oni komencis paroli pri "medikonscia edukado" kiel pli vasta koncepto. En 1970 Unesko kunvokis t.n. "laborkunsidon" en Nevado, Usono, kiu difinis medikonscian edukadon por inkluzivi konceptojn, valorojn, decidkapablon, kaj regadon de la propra konduto en la rilato homo-naturo. Pere de la UN-sistemo kaj diversaj internaciaj neregistaraj organizoj, tiuj ideoj rapide disvastiĝis; fine de la 70aj jaroj, multaj landoj oficiale apogis medikonscian edukadon kadre de la ŝtata lerneja sistemo.

Kvankam "medikonscia edukado" estas sufiĉe ĝenerala termino kiu povas kovri grandan gamon de praktikaj agadoj, plej ofte tiuj agadoj ne esence ŝanĝas la formon kaj organizon de la lernejo. Mi donos du ekzemplojn el mia hejmlando Kanado. Ĉe

ni la edukado estas ĵaluze gardata provinca respondeco, kaj vi devas kompreni, ke "provinco" estas simple nia termino por unu el la dek aŭtonomaj gubernioj en la kanada federacio.

En Ontario, provinco kun dek milionoj da loĝantoj kaj areo pli granda ol la kombino de Francio kaj Hispanio, ekzistas ampleksa reto de t.n. "Eko-lernejoj" (komprenu: ekologiaj lernejoj). Sonas bele, ĉu ne? Kaj la celoj de la eko-lernejoj estas tute laŭdindaj: malpliigi energiuzadon, minimumigi la forĵetaĵojn, pliverdigi la lernejterenon, kaj plibonigi la ekologian komprenon de la instruistoj kaj lernantoj. La kunordigantoj de la reto asertas, ke per tiaj agadoj la lernantoj povas plenumi la ĉefan parton de la provinca medikonscia studprogramo.

Evidente, kompare kun la plenaeraj lernejoj, la fokuso ja moviĝis iom pli malproksime de la homo. Nun oni koncentriĝas al la efikoj de la homa konduto sur la medion, ĉefe kiam tiu konduto povas noci la naturon, ĉu tuj apude (se temas pri solidaj forĵetaĵoj), ĉu pli malproksime (se temas pri malpurigado de akvo), ĉu je tergloba nivelo (se temas pri klimatŝanĝo). Ankaŭ la naturo mem ricevas iom da rekono, ĉefe en la formo de arboj plantitaj por doni ombron kaj helpi pri energikonservado. Sed pri intima kompreno de la naturo oni ne povas paroli. La lernado daŭre okazas ĉefe en klasĉambroj, la studprogramo estas daŭre fokusita al tekstoj anstataŭ spertoj, kaj la lerneja modelo estas tute sama, ĉu temas pri urba lernejo en Toronto, rura lernejo en kampara urbeto, aŭ indiĝena lernejo en norda arbaro. La vizio estas tiu de industria homo, por kiu la naturo estas io "ekstera," resursa bazo por la homa vivado kaj ne multe pli.

En Brita Kolumbio, mia hejmprovinco, ni ne havas tian reton de eko-lernejoj, sed la Ministerio pri Edukado stiras diversajn iniciatojn kun simila tendenco. Ekzemple, oni havas programojn por "daŭripovaj lernejoj" (temas pri energikonservado), "verdaj olimpikoj" (konkurso pri kreaj solvoj al lokaj medi-problemoj), "arboj por morgaŭ" (verdigo de publikaj spacoj) kaj tiel plu. Denove, temas ne pri fundamenta reformo de la lerneja sistemo,

sed pri mildigo de ĝia naturfremdeco. Iomete pli radikala estas ministeria dokumento pri "medikonscia lernado kaj lernado per spertoj" kiu instigas la instruistojn ligi la tutan studprogramon al "kompreno, aprezo, respondeco kaj etiko" pri la naturo. Sed tiuj preskriboj estas sufiĉe svagaj, kaj kiam okazas pli radikala medikonscia edukado, plej ofte temas simple pri la agado de unuopaj instruistoj en lernejoj alirilate tradiciaj.

Per tiuj ekzemploj mi volas ilustri duan regulon pri eduksistema ŝanĝo: lernejo estas kultura realaĵo, ne nur teknika rimedo kiun oni povas senĝene adapti al siaj bezonoj. Pensu interalie pri la faktoj, ke la infanoj kutime pasigas ĉ. ses horojn tage en proksima kontakto unu kun la aliaj; ke la instruistoj devas organizi la konduton de la infanoj dum tiuj ses horoj; ke la infanoj venas el diversaj familiaj kaj kultura fonoj, kiujn la instruisto nur parte konas, se entute; ke lernado ne estas nur unuopula afero, okazanta interne de la kapo, sed ĝi estas ankaŭ profunde socia kaj kultura, fizika kaj emocia; kaj vi komprenos, ke la enhavo de lerneja tago estas kunkreaĵo de la lernantoj, la instruistoj, la gepatroj, la lernejo kiel institucio, la ĉirkaŭaj komunumoj, la registara politiko, la amaskomunikiloj ktp.

Ĉiuj ŝanĝoj en la eduksistemo devas trovi sian lokon en ĉi tiu kompleksa ekologio. Ju pli specifa kaj limigita la ŝanĝo, des pli bonaj estas la ŝancoj, ke la sistemo povos akcepti ĝin; sed por tio oni evidente pagas prezon, nome, ke nenio vere grava ŝanĝiĝos! Oni povus eĉ argumenti, ke nia nuna lerneja sistemo evoluis al stato maksimume rezista al profunda ŝanĝo, kiu kapablas aktori memkritikon kaj evoluemon sed fakte transformas ĉion en varianton de la sama baza modelo. Tiel, medikonscia edukado kutime alprenas formojn de "studunuoj," "projektoj," "esplor-ekskursoj" kaj simile, ĉar tiuj postulas tempe limigitan engaĝon de instruistoj kaj lernantoj kaj lasas la ceteran studprogramon netuŝita.

## Arbaraj lernejoj – ekde la 90aj jaroj

La medikonscia edukado havas radikojn esence politikajn kaj socikritikajn; tial ni ne miru, ke ĝia disvolviĝo kondukis en direktoj relative homcentraj. Por kompreni alternativan tendencon, kiu malrapide disvastiĝas en la lastaj dudek jaroj el la nordaj eŭropaj landoj, oni devas turni sian atenton al la *ontologiaj kaj hermeneŭtaj* dimensioj de la edukado. Tiuj estas neoftaj vortoj en ĉiutaga konversacio, sed eblas ilin klarigi sufiĉe koncize. Se ni parolas pri edukado el ontologia vidpunkto, ni demandas, *kia* estas la edukita homo – kiel li aŭ ŝi perceptas, sentas, agas, rilatas al si mem kaj al aliaj, kaj kompreneble, ĉi-kunteksto, ankaŭ al la naturo. Temas do pri aliro multe pli vasta kaj tuteca ol demandi nur, kion tiu homo scias aŭ kapablas praktike realigi. Kaj se ni parolas pri edukado el hermeneŭta vidpunkto, ni demandas, kiel la edukita homo venas en pli profundan komprenon pri la mondo – kiel la rilato homo-mondo povas fariĝi pli intima kaj reciproke riĉiga. El hermeneŭta perspektivo, ne havas sencon paroli pri sciado de nur unu flanko, kvazaŭ la homoj starus tute aparte de la naturo (ekzemple) kaj rigardus ĝin de ekstere. Male, oni devas esplori, kiel la homa kompreno de la naturo radikas en nia *partopreno* en ĝi.

Oni trovas spurojn de tiu filozofio en la tradicio de "naturstudado" menciita pli frue, kaj aliajn spurojn en diversaj eksterlernejaj programoj por eduki infanojn subĉiele (en arbaroj kaj montaroj, surmare, ĉe farmbienoj k.s.). Tamen nur en la lastaj dudek jaroj komencis kreski vera eduka movado bazita sur tiu vidpunkto. En Norvegujo kaj Danujo, kie aperis la plej fruaj studoj ĉi-temaj, oni nomas tiun aliron uteskole respektive udeskole, proksimume "ekstera lernejo;" en Britio, kie ĝi ekdisvastiĝis en la lastaj dek jaroj, oni nomas ĝin "arbara lernejo." Kvankam ne nepre temas pri arbaroj, ĉi tiu termino estas certe pli bildiga, kaj do mi adoptis ĝin por Esperanto.

Mi devus klarigi, ke la aktivuloj de tiu movado ĝenerale ne rekonus la vortojn "ontologia" kaj "hermeneŭta". Ili simple di-

vidas la konvinkon, ke infanoj lernas ion tre gravan per regula persona kontakto kun arbaroj kaj aliaj naturaj lokoj. Parte temas pri t.n. disvolviĝo de la personeco kaj akirado de socia kapableco; parte temas pri evoluigo de la lernkapablo per libera esplorado kaj malkovrado; sed tiuj estas nur limigitaj fenestroj al io pli kompleksa kaj tuteca, kiun la adeptoj de la arbaraj lernejoj mem malfacile priskribas aŭ difinas.

La skandinaviaj landoj kiel Norvegujo kaj Danujo tradicie lasas multe da libero al la instruistoj elekti siajn instrumetodojn kaj interpreti la studprogramon laŭ la propraj ideoj. Do, ia plioftigo aŭ pliintensigo de kontaktoj kun la naturo povas okazi sen granda bruo aŭ teoriado. Tiel efektive okazas; en lastatempa studo pri la danaj lernejoj, ekzemple, la esploristoj miris, ke 28% de la respondintaj lernejoj jam praktikas ian formon de "udeskole" sen aparta kuraĝigo aŭ kunordigado je nacia nivelo. La esploristoj ankaŭ malkovris, ke tiu praktiko disvastiĝas pli rapide ekde 2000 – neniu scias certe, kial. Tamen ankaŭ en 2000 lanĉiĝis la internacia kampanjo "Lernado en Arbaro" de la Fondaĵo por Medikonscia Edukado, kiu nun listigas 21 landojn kiel membrojn, do evidente ruliĝas iu pli vasta ondo de interesiĝo pri arbara edukado en vasta senco.

La plej bone dokumentita evoluo okazis en Britujo. La unua iniciato venis de la sudokcidenta altlernejo Bridgwater College, kies specialistoj pri fruaĝa edukado inspiriĝis per la dana modelo de *udeskole* dum studvizito en 1993. Bridgwater fondis la unuan britan arbaran lernejon, por infanoj de la antaŭlerneja aĝo, kaj kreis sian propran trejnprogramon pri arbaraj lernejoj, nun en tri niveloj. En la postaj jaroj la koncepto rapide disvastiĝis tra tuta Britujo. La unuaj akademiaj studoj kaj registaraj raportoj ekaperis ĉirkaŭ la jaro 2005, kiam ekzistis almenaŭ kvindeko da tiaj lernejoj; nuntempe ekzistas pluraj centoj. Tutlandan kunordigan rolon ludas la Arbar-Edukada Iniciato, kun apogo de naŭ naturkonservaj organizoj. Ne malpli ol dek tri diversaj instancoj proponas instruistan trejnadon por tia specialiĝo.

Kiel en ĉiuj movadoj de tiu speco, ekzistas verŝajne sufiĉe granda gamo de variantoj de arbara edukado. Tamen, la kerna koncepto estas tio, ke la infanoj pasigu plurajn horojn en la naturo tre regule (almenaŭ unu fojon semajne) kaj tra la daŭro de tuta jaro por sperti la pason de la sezonoj. La aperintaj studoj ĝenerale indikas, ke la infanoj tre ĝuas eksterajn ludojn, konstruadon de fortikaĵoj kaj kaŝejoj, faradon de fajroj kaj simile; ke ili fariĝas pli lertaj kaj memregaj fizike kaj emocie; kaj ke ilia konscio kaj aprezo pri la naturo kreskas. Tamen verdire mankas studoj, kiuj sukcesas penetri sub la plej evidentajn signojn de engaĝo, por esplori kiel ŝanĝiĝas la memkompreno kaj interrilatado de la infanoj en la naturo. En la plej lasta studo pri tiu temo, kiu aperis en februaro ĉi-jare, la esploristoj mem komentas, ke ili sentis "maltrankvilon kaj frustriĝon" pro la malfacileco prezenti "pli riĉan kaj detalan bildon" de la spertoj de la infanoj.

## Lerneja eksperimento en Brita Kolumbio – ekde 2011

Nun venis la tempo por priskribi lernejan eksperimenton pri kiu mi mem persone okupiĝas. Temas pri "lernejo sen muroj," kiun mi helpis plani kaj lanĉi kunlabore kun lerneja distrikto tridekon da kilometroj ekster Vankuvero, en la rapide kreskanta urbo Maple Ridge. Ĝi prezentas la kulminon de la arbarlerneja koncepto en tio, ke la tuta studplano de la jaro – la sama, kiun oni sekvas en tradiciaj klasĉambroj – disvolviĝas en arbaroj, ĉe riverbordoj, en publikaj ejoj de la komunumo, kaj diversaj aliaj lokoj neligitaj al la tradicia lerneja infrastrukturo.

La iniciato krei tian lernejon venis de du flankoj. En la distrikto, oni konsciis pri la fakto ke diversaj studentoj simple ne bone fartas en tradiciaj klasĉambroj, kaj oni kredis – simile kiel en la dana *udeskole* – ke pli da kontakto kun la naturo povus helpi ilin. En la universitato, ni interesiĝis pri la ideo kunligi la tutan studprogramon al la natura kaj homa historioj de la regiono, kaj ankaŭ al planado por la estonteco – t.n. daŭripova planado.

Dum niaj unuaj interparoloj, la koncepto plivastiĝis al lernokomunumo, en kiu kunrolus la gepatroj, diversaj partneraj organizoj el la regiono, reto de instruistoj tra la distrikto, kaj universitataj esploristoj kaj studentoj.

Niaj diskutoj kondukis al principaro, kiu restas gvida dokumento por la tuta projekto. Jen ĝi, tre resume:

Loko kaj Komunumo: lernado enloka, priloka, perloka – grandparte ekstere, kaj en dialogo kun plej diversaj lokanoj.

Naturo, Ekologio kaj Daŭripovo: aŭskultado de la pli-ol-homa mondo, tra sezonoj kaj jaroj, por lerni kiel vivi pli daŭripove en ci tiu specifa loko.

Esploroj kaj Eblecoj: evoluigo de multaj vojoj de lernado kaj instruado, multaj formoj de scio, kun partopreno de ĉiuj.

Interdependeco kaj Bonfarto: kultivado de rilatoj kaj sistemoj kiuj subtenas la bonfarton de ĉiuj, ne nur individue sed familie, komunume, loke.

Imagopovo kaj Integrado: enplekto de la imagopovo en la lernado, integrado de la lernado trans studobjektoj kaj fakoj.

El tiuj principoj vi vidos, ke ni ne ambicias ŝanĝi nur la studprogramon, nek la situon de la lernado, kiel la aliaj reformoj kiujn mi priskribis. Ni celas repripensi ĉion el loka perspektivo. Temas do pri plej radikala interpreto de la koncepto de arbara lernejo.

Kun universitata kolego mi verkis esplorproponon pri tiu projekto en aŭtuno 2008, kaj submetis ĝin al nacia programo por subteni kunlaborajn esplorojn inter universitatoj kaj komunumaj organizoj. Tiu procezo daŭris pli ol jaron, ĉar ni konkursis kontraŭ multaj aliaj projektoj en sinsekvaj etapoj, sed en la fino ni ricevis la monon – unu milionon da dolaroj por kovri kvin jarojn da esploroj. La akcepto venis komence de 2010. Dek monatojn poste, post multe da preparlaboro, la loka lerneja konsilio formale aprobis starigon de tia lernejo en la sekvonta lernojaro. Oni komencis registri lernantojn en februaro 2011, dungis la instru-

istojn en majo-junio, kaj en septembro la lernejo komencis sian ekziston en arbara parko rande de Maple Ridge, kun sesdeko da infanoj inter la aĝoj 4 kaj 12.

Spaco kaj tempo ne permesas eniri multajn detalojn de tiu unua jaro. Sed mi provos resumi por vi la ĉefajn atingojn, la ĉefajn malfacilaĵojn, kaj kelkajn finajn pensojn pri la signifo de ĉio ĉi por loke bazita edukado en aliaj regionoj kaj kontinentoj.

### Edukaj aspektoj

La lerneja distrikto mem nomis la projekton "environmental school," t.e. "medikonscia lernejo" aŭ simple "naturlernejo". En la praktiko, tamen, ĝi estis unuavice, kiel mi diris, *arbara* lernejo. La studprogramo baziĝis sur la fakto, ke ĉio okazis ekster klasĉambro, kaj plejparte subĉiele, en arbaro.

Rimarku, ke nenio en la gvidprincipoj de la lernejo postulas, ke ĉio okazu plenaere. Tio estis la decido de la lernejestro, kiu kompreneble ludas tre influan rolon ankaŭ en aliaj aspektoj de la lernejo. Ekzemple, li ankaŭ forte kontraŭas detalan antaŭplanadon de la studprogramo. Mi persone favoras iom da planado, ĉar tio helpas la instruistojn pli celkonscie gvidi la lernospertojn de la infanoj; sed mi ankaŭ bone komprenas la fontojn de lia opozicio, ĉar tro rigida sekvado de antaŭpreparita plano povas terure bremsi la engaĝiĝon kaj aŭtonoman pensadon de la infanoj. Ĉiukaze, tra la tuta jaro la studprogramon ĝenerale karakterizis minimuma antaŭplanado, kaj do la instruistoj multe improvizis, de semajno al semajno, tago al tago, kaj foje de horo al horo.

Improvizado povas esti sukcesa, se oni estas sufiĉe sperta aŭ havas apartan talenton por tio, kaj certe okazis sukcesoj per tiu metodo. Sed la sukcesoj estis limigitaj interalie pro tio, ke la instruistoj ne estis trejnitaj pri tiuspeca plenaera pedagogio. Du estis spertaj instruistoj en tradiciaj lernejoj; la alia estis juna novico, kiu ne gvidis propran klason antaŭe kaj do ankoraŭ ne havis tre vastan pedagogian repertuaron. La anoj de la universi-

tata esplorteamo fakte havis multe pli da spertoj pri tiuspeca alternativa pedagogio, sed estis praktike neeble transdoni multajn el tiuj spertoj en la kondiĉoj de la lerneja tago.

Jam antaŭ la malfermo de la lernejo ni parolis pri tio, ke necesus enplekti aliajn plenkreskulojn en la instruadon – homojn el la komunumo, kun specialaj scioj pri tiu aŭ alia loko, tiu aŭ alia faceto de la natura aŭ kultura historio de Maple Ridge, tiu aŭ alia instruebla praktiko, kaj tiel plu. Tio ja okazis iomete tra la jaro, ekzemple kiam la trejnisto de la kanada biciklo-akrobata teamo organizis tutsemajnan lernadon por la infanoj sur la loka trejntereno. Tamen la improvizateco de la programo esence subfosis tiun intencon, ĉar kiel inviti eksterulon, se oni ne havas planon kiel uzi lin aŭ ŝin? Tiel, neeviteble, la instruado restis plejparte en la manoj de la instruistoj mem, kaj en tio la lernejo pli similis al tradiciaj lernejoj, ol eksterulo povus supozi.

Por la plej junaj infanoj, la 5- kaj 6-jaruloj, la sperto estis mirinda. Ili interesiĝis pri ĉio, ili ĝuis la eblecon konstante aktivi korpe kaj mense, ili trovis sin kvazaŭ en familio kun pluraj zorgemaj gepatroj anstataŭ nur unu instruisto. Pli-malpli senescepte, la familioj de tiuj infanoj estis tre kontentaj pri la jaro. Por la pli aĝaj infanoj, la spertoj esti pli miksitaj. Kiel en la aliaj arbaraj lernejoj, ili ŝatis la ludojn, la konstruadon de fortikaĵoj, la kuiradon de komunaj manĝoj, la esploradon de la arbaro, la familiecan etoson. Aliflanke mankis al ili la kutimaj normoj de la lernejo, la senton de progreso, kaj eble ankaŭ la intelekta stimulo, kvankam tio ne estas ĉiama elemento en la lerneja sperto ĉiukaze!

Por la esplorteamo, la spertoj estis ankaŭ tre miksitaj. Ni ne antaŭvidis, ke la instruistoj kaj lernejestro metos tiel fortan enfazon sur la enarbarecon, kvazaŭ tio en si mem garantius edukan sperton. Ni ne antaŭvidis la konstantan improvizadon, nek la reziston al eksplicita pritaksado de la lernatingoj de la infanoj. Kiel iu en la teamo komentis, ne estis ĉiam klare, ĉu temas pri eko-lernejo aŭ anti-lernejo.

Sed jen, tio estas interesa malkovro. Kredeble ankaŭ aliaj projektoj por proksimigi lernejon kaj naturon alfrontos similajn

defiojn. La tradicia lernejo, kiel ni konstatis pli frue, estas kompleksa kultura realaĵo, en kiu multaj diversaj elementoj apogas unu la alian. Se oni volas radikale ŝanĝi tion, kiel scii, kiujn elementojn gardi, kiujn forĵeti? Neniu elekto estas facila, neniu vojo estas la sola kaj ĝusta vojo. Kvankam la detaloj estus malsamaj en ĉiu kazo, la konkurado inter disaj principoj kaj vizioj certe estos trovebla ĉie.

Kio kondukas nin al la sekva aspekto de la temo.

## Sociaj-kulturaj aspektoj

Kial gepatroj enskribas siajn infanojn por tia lernejo? Pro diversaj motivoj, kaj ne nepre pro tio, ke la lernado okazas en arbaro. Pluraj familioj elektis la lernejon simple pro la alternativeco. Ne malofte iliaj infanoj havis tre malbonajn spertojn en pli kutimaj lernejoj, kaj ili estis pretaj provi ion ajn, kiu ŝajnis promesi malsaman rezulton. Aliaj jam konis unu el la instruistoj aŭ la lernejestron kaj fidis ilian juĝon, aliaj pensis ke la lernejo traktos iliajn infanojn pli individuece, kaj tiel plu. Do, oni tute ne povas paroli pri komuna kredaro aŭ vizio, kiu karakterizus la familiaron komence de la lerneja jaro.

Zorgi pri bona komunikado kaj konuma decidado en tiaj cirkonstantoj estis malfacila defio por la lernejo. Jam dekomence oni indikis al la gepatroj, ke ilia aktiva partopreno, pli ol kutime eblas en publika lernejo, estus tre bonvena. Kelkaj familioj, proksimume deko, vere kaptis tiun okazon kaj fariĝis aktivaj kontribuantoj; ekzemple, familio kiu posedas restoracian entreprenon en la urbo organizis varman tagmanĝon unu fojon monate, kiun la lernejanoj mem pretigis, kuiris kaj disdonis (jes, meze de la arbaro!). Aliaj partoprenis en ardaj diskutoj pri la konceptoj de ekologia lernado, ekzemple, aŭ venis legi al la pli junaj infanoj dum la legohoro. Sed en tiu maniero iom post iom kreiĝis divido inter la plej engaĝitaj familioj, kiuj sentis sin kvazaŭ kavaliroj de la lernejo kaj volis defendi ĝin kontraŭ ĉiuj kritikoj, kaj aliaj familioj, kiuj havis foje tute pravajn kritikojn sed sentis

ke oni ne pretas aŭskulti ilin. Tiel multaj kritikoj ne venis rekte al la instruistoj, sed nur malrekte pere de la esplorteamo, dum la lernejestro, ĉiam konscia pri la reputacio de la lernejo, ĝenerale evitis ĉiujn malfacilajn demandojn kaj prezentis tre idealan bildon en siaj publikaj elpaŝoj.

Kiel vi povas imagi, la esplorteamo mem, konsistanta el tri profesoroj kaj ses studentoj kaj doktoriĝintoj, alfrontis tiklajn etikajn demandojn pri sia rolo. Neniu sentas sin plene objektiva observanto: ĉiuj kovas esperojn pri la evoluo de la lernejo, konvinkojn pri la lernprioritatoj, simpation al tiu aŭ alia familio, frustriĝon pri tiu aŭ alia maltrafita okazo. Sed kiugrade oni rajtas esprimi tiujn opiniojn, preni flankon en la diskutoj, kaj kiugrade oni devas stari flanke, lasante al la instruistoj kaj gepatroj elnegoci la evoluon? Ni ne trovis simplan respondon al tiu demando, kaj devis navigi malfacilan kurson inter la rifoj de diversaj veroj kaj valoroj.

Ĉio ĉi montras al dua konstato: ke la rilato lernejo-naturo estas ne nur teknika demando, solvebla per spertaj profesiaj instruistoj laborantaj en la ĝustaj kondiĉoj; ĝi estas profunde *politika* demando. Fakte la edukado estas ĉiam interalie politika afero, entrepreno kiu profunde radikas en la konvinkoj, valoroj kaj potencrilatoj de la socio. Se per la lernejo ni volas kuraci la fremdiĝon de nia civilizacio disde la naturo, ni devas esti pretaj por malfacilaj intertraktoj kaj por repripensado de niaj tradicioj de decidado kaj gvidado. En nia lernejo, tia repripensado apenaŭ okazis ĝis nun. Tamen, en nia jarfina konsultado kun la instruistoj kaj la lernejestro, ni interkonsentis pri kelkaj paŝoj al pli inkluziva decidprocezo, enplektanta la studentojn same kiel la gepatrojn. Ni vidos, kiel tio evoluos.

## Kelkaj perspektivaj evoluoj

En ĉi tiu enkonduka prelego, ne eblis eniri multajn interesajn detalojn de la studprogramo en la lernejo, kiujn ni esperas signife pluevoluigi en la venonta jaro. Mi mencios nur tri, ligitajn inter si:

- En la kondiĉoj de plenaera lernado, la parola lingvo estas multe pli grava ol la skriba. Tradiciaj lernejoj dediĉas malmultan atenton al evoluigo de la parola arto. En nia lernejo, profesia buŝa rakontisto helpos al la infanoj, instruistoj kaj gepatroj plibonigi sian kapablon paroli kuraĝe, klare, kaj zorge, kun atento al la vortprovizo kaj la disvolviĝo de rakonta fadeno.

- Pro tio, ke multaj lern-okazoj prezentas sin spontane, dum la fluo de la tago, ofte ne eblas havi antaŭfiksitajn mezurilojn por pritaksi la progreson de la lernantoj. Anstataŭe, ni eksperimentas per t.n. lern-rakontoj, en kiuj la instruistoj (aŭ alia atestanto) priskribas la disvolviĝon de difinita lernosperto, petas komentojn de la gepatroj kaj aliaj, aldonas sian takson kaj konsilojn por la lernanto, kaj el ĉio ĉi plibonigas sian kapablon reagi al estontaj okazoj. Tiu ĉi relative nova taksostrategio, kiun oni pioniris en Novzelando, povus trovi vastan aplikon en aliaj arbaraj lernejo kaj similaj projektoj.

- Tiujn du strategiojn ni intencas kunigi en parolajn diskutojn, fine de ĉiu tago, pri la lernospertoj de la antaŭaj horoj. En la tradicia lernejo, almenaŭ en Norda Ameriko, oni malmulte parolas pri la lernado aŭ la instruado kun la infanoj (aŭ eĉ, por diri la veron, inter la instruistoj). En nia lernejo, ni esperas ke eĉ la plej junaj infanoj komencos demandi sin: Kion mi lernas? Kiel mi povus lerni pli? Kaj kiel mi povus helpi la lernadon de aliaj?

Per tiuj ekzemploj, kiel per la antaŭaj konkludoj, mi esperas montri al vi, kiel kompleksa kaj interesa estas la rilato lernejo-naturo, kaj kiel profunda estas la defio, venki la naturfremdiĝon kiu kuŝas radike de la ekologia krizo. Mi ne dirus, ke tio estas neebla. Male, mi kuraĝigus vin ĉiujn esplori tiajn eblecojn en viaj hejmlokoj. Parolu kun instruistoj, parolu kun lernejestroj kaj eduk-politikistoj, legu librojn, klerigu vin! Sed se iu diros al vi, ke tiu havas la solvon – ke ekzistas klara recepto, ke sufiĉas fari tion aŭ jenon – ne kredu lin aŭ ŝin! Ni paŝas sur novan, malfacilan terenon.

Sed, kiel diris la Majstro: ni paŝo post paŝo, post longa laboro…

*Prelego en la Internacia Kongresa Universitato 2016 (Nitro, Slovakio)*

# Edukado al repaciĝo: Kanadaj lernejoj alfronte al la indiĝena realo

## Kanado kaj la indiĝena realo

Neniu scias kun certeco, kiam la unuaj homoj venis al Norda kaj Suda Ameriko. Arkeologiaj malkovroj indikas, ke tio okazis antaŭ minimume 15.000 jaroj, kiam grandan parton de la norda kontinento ankoraŭ kovris vastaj glacitavoloj. Estas ĉiukaze tute klare, ke la plej fruaj eŭropanoj – vikingoj antaŭ jarmilo, okcidentanoj antaŭ duonjarmilo – trovis "novan mondon," kie homoj hejmis jam plurmil jarojn. Dum tiuj jarmiloj, formiĝis en Ameriko multegaj diversaj kulturoj kaj lingvoj, kiujn la alvenantaj eŭropanoj baptis "indiĝenaj" kaj (plej ofte) "sovaĝaj," "primitivaj" kaj "paganaj". Helpate de "pafiloj, mikroboj kaj ŝtalo," laŭ la formulo de antropologo Jared Diamond, la okcidenteŭropaj ŝtatoj iom post iom konkeris kaj setlis tiun enorman teritorion. La indiĝenaj popoloj, unu post la alia, suferis amasmortadon, unuavice pro novaj eŭropaj malsanoj, duavice pro perforta ekspluatado kaj senterigo, kaj laste pro la sekvoj de la ekonomia kaj kultura mizero, kiun trudis al ili la invadantoj. Fine de la 19a jarcento estis preskaŭ universala la kredo, ke indiĝena Ameriko estas kondamnita al plena pereo, aŭ en plej bona kazo al iu folklora pluekzisto sen signifo por la pli vasta socio.

Multaj amerikanoj ankoraŭ dividas tiun kredon. Tamen la lastaj kvindek jaroj atestis specon de indiĝena renesanco, kiu ankoraŭ ne penetris ĉien, sed en diversaj amerikaj ŝtatoj gajnis kulturan kaj politikan influon kiu fariĝas pli kaj pli vaste sentebla en

la tieaj socioj. Kanado, kie mi pasigis duonon de mia vivo, estas unu el tiuj ŝtatoj, kaj Brita Kolumbio, la okcidenta provinco kie mi nun loĝas, prezentas aparte interesan kazon de tia evoluo. Mi do fokusiĝos en ĉi tiu prelego al tiuj du kuntekstoj, la tutkanada kaj la britakolumbia; sed ni ne forgesu, ke paralelaj tendencoj troveblas en diversaj aliaj lokoj.

Kanado okupas duonon de Norda Ameriko – la dua plej granda ŝtata teritorio en la mondo, post Rusio. Ĝia indiĝena historio estas interesa kaj kompleksa, sed mi povas nur tre koncize resumi ĝin ĉi tie. Tra la vasta norda arbaro, kiu kovras grandan parton de la lando, loĝas la krijoj kaj aliaj algonkinaj popoloj, kiuj tradicie vivtenis sin unuavice per la ĉasado de alkoj, boacoj, cervoj kaj pli malgrandaj bestoj. Apud la riverego Mackenzie, kiu kolektas akvon el la centra ebenaĵo kaj portas ĝin norden al la Arkta Oceano, loĝas deneoj, diverslingvaj parencoj de la granda navaha popolo en sudokcidenta Usono. Sude sur la ebenaĵo loĝas siuoj, eble la plej konataj "holivudaj indianoj" kun siaj tipioj, ĉevaloj, kaj plumaraj kapvestoj. Kaj okcidente, trans la Rokmontaro, loĝas vera ĉielarko de popoloj, parolantaj tridekon da lingvoj en sepo da lingvofamilioj. Aldone al tiu vasta gentaro, komune konata nuntempe en Kanado kiel la Unuaj Nacioj, troviĝas la inukoj, spertaj maraj ĉasistoj loĝantaj ĉe la arkta marbordo, parencoj de apudaj popoloj en Alasko kaj Groenlando; kaj la mestizoj, popolo formiĝinta tra la du jarcentoj de la peltkomerco, kun kreola lingvo evoluinta el miksiĝado de la krija kaj la franca. Laste, nepras emfazi ke la pli multaj kanadaj indiĝenoj nun loĝas en diversgrandaj urboj tra la lando, kun diversaj gradoj de ligiteco al siaj tradiciaj teritorioj, kaj kun tre diverseca familia historio. Ĉio ĉi kunkreas la aktualan indiĝenan realon de Kanado.

La brita ŝtato ĝenerale evitis militajn konfliktojn kun la indiĝenaj popoloj, preferante krei aliancojn kaj fine ankaŭ formalajn traktatojn kun ili. Tiuj traktatoj kovras grandan parton de la teritorio de Kanado, kun la okulfrapa escepto de Brita Kolumbio kaj la nordaj teritorioj. En la traktatoj oni ĝenerale promesis

rezervi terojn por la indiĝenoj, provizi monon, vestojn, farmbestojn kaj ekipaĵojn, pulvon kaj kuglojn, kaj garantii rajtojn pri ĉasado kaj fiŝkaptado; ofte oni ankaŭ promesis provizi senpagan edukadon por infanoj. Kompense la indiĝenoj cedis posedrajtojn pri la nerezervita tero, malfermante la vojon al ties setlado kaj ekspluatado. En regionoj, kie ne ekzistis traktato, la ŝtato kondutis pli-malpli laŭ sia bontrovo; tamen, la finaj rezultoj estis tre similaj. La fondo de Kanado kiel sendependa ŝtato sub la brita reĝino, en 1867, inaŭguris longan periodon de sistema neglektado de la traktatoj, marĝenigado de la indiĝenaj komunumoj, subpremado de iliaj tradicioj kaj lingvoj, kaj perforta asimilado (ekzemple, ĝis la jaro 1960, kanada indiĝeno rajtis voĉdoni, nur se tiu pretis formale rezigni pri sia oficiala statuso kiel indiĝeno).

Grava elemento en tiu asimila politiko estis la internulejoj – la specialaj lernejoj por indiĝenaj infanoj, plej ofte prizorgataj de tiu aŭ alia eklezio. Ekde la jaroj 1880, tiaj lernejoj rapide disvastiĝis tra Kanado, kaj ŝtataj funkciuloj estis taskitaj pri la transportado de la indiĝenaj infanoj de la hejma komunumo al la elektita internulejo, ofte centojn aŭ eĉ milon da kilometroj for. Oni taksas, ke pli ol 150.000 infanoj trapasis tiujn lernejojn. Ĉie ili spertis malestimon kaj subpremadon de la denaska lingvo kaj kulturo; ĉie ili ricevis instruadon pri la supereco de la kristana religio, la brita identeco, la angla lingvo. Ofte, kvankam ne ĉie kaj ĉiam, ili spertis fizikan mistraktadon; foje, ja multe tro ofte, ili submetiĝis al seksperforto. Signifa procento mortis – inter 4.000 kaj 6.000 entute. La sekvoj, por ili kiel individuoj, por iliaj familioj kaj komunumoj, kaj por iliaj propraj infanoj, estis nekalkuleble katastrofaj. Kaj ĉio ĉi okazis, kiel dirite, sub la egido de la kanada ŝtato, dum pli ol jarcento, nerimarkite de la publiko, preter la rigardo de la amaskomunikiloj, sen jura kontrolo, en lando kiu laŭ siaj propraj deklaroj aspiris al justeco, al demokratio, al toleremo kaj paco.

La longa vojo al revalorigo de indiĝena Kanado havas siajn radikojn en indiĝenaj rezistmovadoj de la 19a kaj frua 20a

jarcentoj, sed ĝi komencis alpreni sian modernan formon en la fino de la sesdekaj jaroj. Tiam kreiĝis la unua tutlanda indiĝena organizo, la Nacia Indiana Frataro, poste renomita la Asembleo de Unuaj Nacioj. La politika procezo ĉirkaŭ la repatriigo de la kanada konstitucio, komence de la okdekaj jaroj, donis ŝancon reaserti la juran validecon de indiĝenaj rajtoj, surbaze de la iamaj leĝoj kaj traktatoj de Brita Nord-Ameriko. En 1990, disputo pri tereno apud la ganjenka vilaĝo Kanesatake en Kebekio pliakriĝis ĝis la engaĝo de la kanada armeo; tio kondukis al la kreo de Reĝa Komisiono pri Indiĝenaj Popoloj, taskita skizi novan bazon por la rilatoj inter indiĝenaj komunumoj kaj la kanada ŝtato. Ĉi tiuj okazaĵoj, kune kun kreskanta vico de juraj verdiktoj favore al la indiĝena flanko, helpis plivastigi la publikan kaj politikan konscion pri maljustaj estinteco kaj estanteco. Malgraŭ tio, la vivo por la plejmulto de indiĝenaj kanadanoj apenaŭ pliboniĝis. Statistikoj pri sano, senlaboreco, lerneja malsukceso, enkarceriĝo, murdo kaj malapero, ktp, klare montras ke ili restas la plej malavantaĝa subgrupo de la kanada socio.

Sed nun la tajdo eble turniĝis. Antaŭ deko da jaroj okazis komuna proceso de la tiel nomataj travivintoj de la internulejoj kontraŭ la koncernaj eklezioj kaj la kanada ŝtato. La akuzitoj agnoskis sian kulpon kaj konsentis pagi 1,9 miliardojn da kanadaj dolaroj al plurdekmil travivintoj, kaj krome efektivigi kelkajn aliajn rekompencojn. Inter tiuj estis la starigo de Komisiono por Vero kaj Repaciĝo, inspirita de la samnoma komisiono gvidita post la fino de apartismo en Sud-Afriko de Ĉefepiskopo Desmond Tutu. Siatempe, kiam la komisiono ekaboris en 2008, plimalpli samtempe kun formala pardonpeto al la indiĝenaj popoloj de la kanada registaro, ĝi ne ricevis grandan publikan atenton. Tamen pasintjare, kiam aperis ĝiaj konkludoj kaj fina raporto, okazis io tute surpriza. Tra la tuta lando, provincaj registaroj, universitatoj, politikaj partioj, kaj granda gamo de civilsociaj organizoj deklaris sian volon labori por la realigo de la rekomendoj. En oktobro, la novelektita kanada registaro rekonfirmis, ke tio estas ankaŭ ĝia celo.

Do, kiuj estas tiuj rekomendoj, kaj kiel ili rilatas al edukado? Al tio ni nun turnu nian atenton.

## Edukado por repaciĝo

“Repaciĝo,” laŭ la Komisiono, “estas procezo celanta la kreon kaj vivtenadon de rilatoj de reciproka respekto inter indiĝenaj kaj neindiĝenaj popoloj.” Sed la vojo al tio estas komplika kaj malfacila. Kiam ĉiuj ĉefaj sociaj institucioj – la leĝoj, la politika sistemo, la ekonomio, la scienco, la sistemoj de sano kaj edukado, la eklezioj – estas bazitaj sur mondbildo, en kiu indiĝenaj tradicioj kaj perspektivoj aspektas nur marĝene utilaj, aŭ eĉ senvaloraj, la paroloj pri “reciproka respekto” ofte montriĝas nur simbolaj. La Komisiono do agnoskas en sia raporto, ke necesos pluraj generacioj da laboro, “kapoj, manoj kaj koroj laborantaj kune”, por krei socion kie indiĝenaj kanadanoj povas vere senti sin hejme.

Analizante la bezonojn kaj prioritatojn, la Komisiono bazis sin unuavice sur la atestaĵoj de pli ol ses mil “travivintoj” de la internulejoj. Tiuj ofte korŝiraj rakontoj montris detale, kiel la malrespekta traktado de infanoj kreis psikan bazon por postaj vivmalsanoj, kaj kiel la kanadaj ŝtato kaj socio sisteme marĝenigis kaj ekskludis la samajn homojn kiel plenkreskuloj. La unua parto de la rekomendoj, 42 entute, rilatas al la plej seriozaj formoj de ekskludo: kvin al la ŝtata vartado de infanoj; sep al la eduksistemo; kvin al lingvo kaj kulturo; sep al sano; kaj dek ok al justico. Kune ili konsistigas recepton por forigo de la ĉefaj formoj de sistema diskriminacio, kaj por la valorigo de indiĝenaj perspektivoj kaj kontribuoj sur tiuj kampoj. Mi revenos poste al la demando, kiel tio povus aspekti sur la kampo de edukado.

La dua parto de la rekomendoj – 52 el ili – traktas la evoluon de la kanada socio kiel tuto. La emfazo tie estas pri vere inkluzivaj aliroj, bazitaj sur la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj. Ekzemple, la Komisiono proponas

redakti la ĵuron de civitaneco, kiun ĉiu nova kanadano devas subskribi, por inkluzivi la devon respekti la rajtojn de indiĝenaj popoloj en la kanada socio. Inter la diversaj ideoj tie, nin plej rekte koncernas la kvar rekomendoj, kiuj rilatas al edukado por repaciĝo. El ili, la plej ampleksa kaj grava – almenaŭ por niaj nunaj celoj – estas n-ro 62, kiu tekstas jene:

Ni alvokas la federacian, provincajn kaj teritoriajn registarojn entrepreni jenajn paŝojn, konsulte kaj kunlabore kun Travivintoj, indiĝenaj popoloj, kaj edukistoj:

(i) Enkonduki, en maniero taŭga por la koncerna aĝo, devigajn studobjektojn pri la internulejoj, la Traktatoj, kaj la historiaj kaj nuntempaj kontribuoj de indiĝenaj popoloj al Kanado, en ĉiuj studniveloj ekde la infanĝardeno ĝis la fino de la mezlernejo;

(ii) Provizi altlernejojn per la bezonata financado por eduki instruistojn pri la integrado de indiĝenaj scioj kaj instrumetodoj en lernejaj klasoj;

(iii) Provizi indiĝenajn lernejojn per la bezonata financado por utiligi indiĝenajn sciojn kaj instrumetodojn en lernejaj klasoj;

(iv) Krei altnivelajn registarajn postenojn por prizorgi la evoluigon de studprogramoj kaj – materialoj pri indiĝenaj temoj.

En la kunteksto de la tuta Fina Raporto de la Komisiono, la graveco de ĉi tiu alvoko fariĝas eĉ pli evidenta. Kiel diris la komisionestro, juĝisto Murray Sinclair [mari sinkler], unu el la ĉefaj kulpuloj en la mistraktado de indiĝenaj popoloj estis la eduksistemo, kaj nun la eduksistemo devos ludi gvidan rolon en la repaciĝa procezo. La sistema ekskludado de indiĝenaj perspektivoj kaj historioj el lernejaj studprogramoj kondukis al situacio, kie malmultaj kanadanoj havas eĉ bazajn konojn pri la pasinteco aŭ la aktuala situacio de indiĝenoj en sia propra lando. Eĉ pri la internulejoj, mi mem konstatis, ke apenaŭ duono de la studentoj en miaj klasoj konscias pri ilia ekzisto, aŭ pri la sekvoj, kiujn tio havis por indiĝenaj komunumoj kaj kulturoj. Informiĝinte, ili ofte esprimas indignon, eĉ koleron – sentante, ne malprave, ke

oni mensogis al ili dum la 13 jaroj, kiujn ili pasigis en la baz- kaj mezlernejo. Evidente tio donas malfortan bazon por la konstruado de pli inkluziva kaj justa socio.

Repaciĝo do postulas ŝanĝojn en la celoj, temoj kaj metodoj de la deviga lerneja edukado. La Komisiono konstatas tiun bezonon kaj alvokas al ĝia realigo, sed ĝi havas nek la taskon nek la kapablon priskribi, kiel tio okazu. En Kanado, la lerneja sistemo estas la respondeco sole de la provincaj registaroj – la federacia registaro havas neniun rolon tiurilate. Tiel por kompreni, kion la tasko de repaciĝo povus signifi en la eduka praktiko, ni mallarĝigu nian fokuson al la provinco Brita Kolumbio, la plej okcidenta, kaj tiu kun la plej granda diverseco de indiĝenaj popoloj.

## La defioj de eduka ŝanĝo

Brita Kolumbio kovras vastan teritorion, proksimume unu milionon da kvadrataj kilometroj, sed kun nur iom pli ol kvar milionoj da loĝantoj. La eŭropanoj atingis tiun parton de Kanado malfrue, pro la longa ŝipvojaĝo ĉirkaŭ Suda Ameriko. Ĝis la eksplodo de orfebro en la 50aj kaj 60aj jaroj de la 19a jarcento – do antaŭ nur 150-160 jaroj – indiĝenoj estis la klara plimulto de la loĝantoj, kaj multaj indiĝenoj ankoraŭ neniam renkontis blankulon. Serio de epidemioj tamen draste reduktis la indiĝenan loĝantaron, kaj la posta procezo de koloniigo estis rapida kaj, almenaŭ ŝajne, kompleta.

Hodiaŭ, indiĝenoj konsistigas ĉ. 4 procentojn de la loĝantaro, sed indiĝenaj infanoj jam ĉirkaŭ 10 procentojn, kaj en diversaj lernejaj distriktoj de la nordo, la plimulto de la studentoj estas indiĝenaj. Nombre, tamen, la plej granda indiĝena urbo de la provinco estas Vankuvero, kie loĝas ĉirkaŭ 17.000 indiĝenoj. Malgraŭ la granda diverseco de indiĝenaj historioj, kulturoj, ekonomioj kaj simile, tra la provinco la situacio en la publikaj lernejoj estas sufiĉe simila. Granda proporcio de la indiĝenaj studentoj, ĉirkaŭ 40%, ne atingas la finon de la mezlernejo. Tiuj,

kiuj abiturientiĝas, ofte ne atingas la kvalifikojn necesajn por universitataj studoj, precipe en fakoj kiel matematiko aŭ scienco. Ili ankaŭ havas malmultajn okazojn lerni pri sia propra kulturo aŭ historio, kaj malofte havas indiĝenan instruiston.

Antaŭ dudeko da jaroj, la Ministerio pri Edukado komencis kolekti statistikojn pri la indiĝena lernantaro, kaj kiam la situacio fariĝis klara, ĝi postulis ke ĉiu lerneja distrikto en Brita Kolumbio ellaboru planon, kunlabore kun la lokaj indiĝenaj komunumoj, por plibonigi la rezultojn. Tio almenaŭ helpis plivastigi konscion pri la problemo, kvankam la planoj ne ŝanĝis multon en la ĝenerala funkciado de la lernejoj. Samtempe la Ministerio anoncis "celitan subvencion" por ĉiu indiĝena lernanto, do aldonan monon en la buĝeto, kiun la distriktoj nepre elspezu por iniciatoj celitaj al tiuj lernantoj. Malfacilas taksi, kio rezultis el tio, sed en kelkaj distriktoj ĝi certe helpis nutri novajn projektojn kaj alirojn.

Multaj esploroj tamen montras, ke la plej grava faktoro en la lernejaj spertoj de minoritataj infanoj, inkluzive de indiĝenaj, estas la instruisto. Dum la horoj pasigitaj en klasĉambroj, instruisto devas fari multajn decidojn pri komunikado, gvidado, klarigado, pritaksado, starigo kaj kontrolo de normoj, kaj diversaj aliaj facetoj de sia rilato kun la lernantoj. La esploroj ankaŭ klare montras, ke instruistoj tendencas disvolvi pedagogian stilon similan al tiu, kiun ili mem spertis siatempe kiel lernantoj. Tio signifas, ke instrupraktikoj kiuj malsukcesis ĉe indiĝenaj lernantoj antaŭ kvardek jaroj restas daŭre aktualaj en la lerneja sistemo, kvankam intertempe komplete ŝanĝiĝis la instruistaro. Kaj tiuj pli novaj instruistoj averaĝe scias tre malmulte pri indiĝenaj temoj, kiel mi jam klarigis pri la kanada socio ĝenerale.

Aldone al tio, la studprogramo estas daŭre difinita laŭ fakoj kiuj apenaŭ referencas al indiĝenaj realaĵoj, aŭ entute al la apartaĵoj de difinita loko aŭ komunumo. En la lernejo, fakoj kiel scienco aŭ matematiko aŭ lingvo estas konsiderataj universalaj. Proponi al instruisto, gvidi klasojn pri tiuj fakoj en kiuj indiĝe-

naj scioj kaj perspektivoj alportas ion valoran, estas kvazaŭ oni petus ĉevalon kanti kiel birdo. Efektive ĝuste tia reformo estas nun survoje en Brita Kolumbio – nome postulo integri indiĝenajn principojn de lernado tra ĉiuj studkampoj, kadre de ĝenerala renovigo de la studprogramo. Sed simple ne estas klare al la instruistoj, kion tio signifu en la praktiko, nek kiel ĝi povus helpi ilin komprenigi la esencajn konceptojn de ĉiu fako al siaj diverskapablaj kaj diverse motivitaj lernantoj.

Dume, lernejoj daŭre neglektas aliajn aspektojn de la homa eduko, kiujn indiĝenaj komunumoj tradicie taksas vivgravaj. La reciprokaj rilatoj kun la naturo, la disvolvo de oratora kaj buŝrakonta kapabloj, la zorgo pri etika konduto, la integrado de arto, sonĝado kaj fantazio, la profunda respekto al olduloj – ĉio ĉi estas esence fremda al la publika eduksistemo, kvankam troviĝas esceptoj pri tiu aŭ alia aspekto.

En tiu lumo, la alvoko de la Komisiono al edukado por repaciĝo povus ŝajni trosimpliga, eĉ naiva. Se lernejoj estis kreitaj siatempe por esence koloniisma celo – transformi dise diversecan popolon en unuecan nacion – kiel oni atendu, ke ili ekplenumu mision tute kontraŭan?

## La senkoloniigo de la lernejo

La temo senkoloniigo ampleksas multajn kampojn de la homa vivo, pri kiuj mi ne parolos ĉi tie – interalie, kernajn demandojn pri terposedo kaj termastrumado. Eĉ limigite al la lernejo, ĝi restas sufiĉe kompleksa. Mi devus eble klare diri, ke publikaj lernejoj, kiaj ni konas ilin, troviĝas inter la plej efikaj armiloj de la koloniismo – ne nur pro tio, *kion* ili instruas, sed ankaŭ pro tio, *kiel* ili instruas. Forpreni infanojn el iliaj familioj por multaj horoj tage, arigi ilin laŭ aĝo (kaj ofte sekso) en grandaj grupoj kun po unu instruisto, postuli longan senmovan sidadon kaj aŭskultadon, resumi ilian valoron per unusola cifera aŭ litera noto – jen kelkaj el la teknikoj, per kiuj lernejoj edukas

junajn homojn al pasiveco kaj dependeco, du kernaj trajtoj de la koloniigitoj. Por mia nuna publiko mi apenaŭ bezonas aldoni, ke lernejoj krome privilegias la lingvon kaj kulturon de la reganta etno kaj specife de ties urba meza klaso. Eĉ kiam la publike proklamitaj celoj de la lernejo ne estas atingitaj (ekzemple, kiam granda parto de la lernantoj malsukcesas akiri la finan diplomon), tiuj *implicitaj* celoj povas bonege plenumiĝi.

El tio eblas kompreni, ke la senkoloniigo de lernejoj estas praktike neebla en la plena senco; por tio oni devus tute repripensi kaj refari ilin, kaj neniu socio havas la rimedojn aŭ la volon por tion entrepreni. Tamen, ene de la tradiciaj strukturoj, diversaj ŝanĝoj ja eblas, eĉ sufiĉe fundamentaj. En Brita Kolumbio lastatempe okazis la menciita vasta reformo de la lerneja studprogramo, kies efikoj ne povas esti adekvate taksataj ankoraŭ, sed kiu almenaŭ montras kelkajn interesajn evoludirektojn. Ekzemple, oni trovas nun, inter la bazaj gvidlinioj por ĉiuj instruistoj, la instigon "en ĉiuj studkampoj… instrui en manieroj, kiuj respektas la lokon, kie troviĝas la studentoj – instruado orientita al la lernejo mem kaj al la ĉirkaŭaj komunumoj." Alivorte, oni forlasas la malnovan idealon, ke ĉiuj lernejoj similu unu al la alia, aŭ ke ĉiu klaso pri matematiko, ekzemple, similu ĉiujn aliajn klasojn, favore al adaptado de instrumetodoj kaj materialoj al lokaj cirkonstancoj. Kaj tiu nova emfazo estas eksplicite ligita al la integrado de indiĝenaj perspektivoj.

Sed kiaj, do, estas tiuj perspektivoj? La plej bona ĝenerala respondo, kiun mi konas, troviĝas en

gvidilo aperinta pasintjare ĉe la Ministerio pri Edukado de Brita Kolumbio, sub la titolo *Indiĝenaj Mondrigardoj kaj Perspektivoj en la Klasĉambro*. La libreto ekestis el konsulta procezo, kiu ampleksis kvin diversajn regionojn de la provinco kaj grandan varion de partoprenantoj, indiĝenaj kaj neindiĝenaj. Oni starigis al ili tri grupojn de demandoj, esence: (1) En kio konsistas indiĝenaj mondrigardoj kaj perspektivoj?, (2) Kiel oni povas integri ilin en la klasĉambro, (3) Kiel antaŭeniri al tia integrado

kaj pritaksi la progreson? Poste oni analizis la respondojn kaj ordigis ilin por prezenti relative koheran bildon pri la plej necesaj ŝanĝoj.

La kerna koncepto, kiu kuntenas ĉion alian, estas emfazo pri "interligiteco kaj interrilatado". Temas pri la fundamenta etika bazo de la indiĝenaj kulturoj de Norda Ameriko: la ideo, ke ni homoj estas parencoj de ĉio viva, ke ĉio dependas en la fina analizo de la gastamo kaj malavaro de la tero, kaj ke oni devas regi sian konduton konforme al tiu kompreno. Tio estas samtempe koncepto tute kontraŭa al la tendenco, en la lerneja sistemo, disigi la studobjektojn en apartajn fakojn nomitajn "scienco," "socio," "lingvo", ktp, aŭ – eĉ pli okulfrape – disigi la lernejon de la socia kaj natura vivo ĉirkaŭ ĝi. Elstarigi tian principon estas maniero instigi instruistojn repripensi siajn antaŭsupozojn pri la difino de studobjektoj kaj la indeco instrui sen rilato al lokaj realaĵoj, la ĉiutaga vivo de la studentoj, kaj la historia, geografia kaj ekologia kunteksto.

La ceteraj principoj dividiĝas en du grupojn. Unu grupo celas la specifajn valorojn kaj perspektivojn de la indiĝenaj kulturoj. Tiu grupo inkluzivas (1) konscion pri la historio, (2) lokan fokuson, (3) rilatojn kun la naturo, (4) firman identecon, (5) respektoplenan engaĝiĝon kun la komunumo, (6) la potencon de rakontado, (7) tradician instruadon, (8) lingvon kaj kulturon, kaj (9) lernadon per spertoj. La ĝenerala ideo estas tio, ke iu ajn instruisto, eĉ sen apartaj konoj pri la loka indiĝena kulturo, povas ekpaŝi al pli inkluziva instruado, pli bone adaptita al indiĝenaj valoroj, per atento al tiuj diversaj principoj.

La dua grupo de principoj celas la lernejon mem. Temas pri diversaj faktoroj, kiuj ludas ŝlosilan rolon en la kapablo de la lernejo zorgi pri la sukceso de indiĝenaj lernantoj. Tiu grupo inkluzivas (1) la rolon de la instruisto, (2) la rilaton inter la lernejo kaj la komunumo, (3) la preparadon de instruistoj, (4) pozitivan fokuson al la kapabloj de la lernanto, (5) saĝan gvidadon kaj administradon, (6) flekseblecon, kaj (7) taŭgajn lernejajn medion

kaj materialojn. Ĉi tiuj faktoroj troviĝas preter la decidpovo de unuopaj instruistoj; ili estas instituciaj, ŝanĝeblaj je la nivelo de unuopaj lernejoj, lernejaj distriktoj, kaj la Ministerio.

La vojo al senkoloniigo, do, devas pasi tra tiuj diversaj pordegoj. La esperiga aspekto de la tuta analizo estas la vastaj ebloj por ĉiu instruisto, komenci adapti sian instruadon laŭ la unua grupo de principoj. Ne necesas atendi iun vastan institucian reformon, kiu eble neniam venos. Ne necesas longaj fakaj studoj por ekspertiĝi pri indiĝeneco. Oni povas lerni dum, kaj per, la instruado. Tio estas fakte la sola ebla vojo por tiel profunda reorientiĝo en la celoj kaj metodoj de la lernejo.

Samtempe, la analizo substrekas, kia vasta engaĝiĝo estas fakte bezonata. Temas efektive pri kultura reformo, specife en lernejoj, sed kompreneble samtempe en la socio de Brita Kolumbio, en kiu partoprenas la studentoj kaj gepatroj kaj instruistoj kaj lernejestroj. Rasisma socio produktas rasismajn lernejojn; senkoloniigitaj lernejoj bezonas senkoloniigitan socion. Kaj se ni rigardas detale la trajtojn de tiu postulata repaciĝo inter la indiĝenaj kaj neindiĝenaj kanadanoj, ni vidas ke ĝi neeviteble ligiĝas al repaciĝo inter la *homaj kaj nehomaj* kanadanoj, do inter la homo kaj naturo en la konkretaj lokoj kaj cirkonstancoj de nuntempa Kanado. Repaciĝo kaj daŭripovo do montriĝas en la fino *la sama celo.*

*Prelego en la Internacia Kongresa Universitato 2019 (Lahtio, Finnlando)*

# Indiĝenaj lingvoj kaj la streboj al daŭripovo

## Kio estas indiĝena lingvo?

Tio ŝajnas simpla demando, ĉu ne? Se la nuna jaro, 2019, estas la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, klare ni devus scii, pri kiuj lingvoj temas. Same kiel ne ĉiuj popoloj estas indiĝenaj popoloj, ne ĉiuj lingvoj estas indiĝenaj lingvoj.

Laŭ la Deklaracio de UN pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, temas pri popoloj, kiuj "suferis historiajn maljustaĵojn kiel rezulto de, interalie, ilia koloniigo kaj senposedigo de iliaj teroj, teritorioj kaj resursoj, kio malhelpis ilin plenumigi, speciale, sian rajton disvolviĝi konforme al siaj propraj bezonoj kaj interesoj."

Indiĝenaj popoloj estas do minoritatoj, en la politika senco de la vorto: homgrupoj loĝantaj en landoj regataj grandparte de homoj el alia popolo aŭ aliaj popoloj. Krome, indiĝenaj popoloj konservas la memoron de tempo antaŭ la koloniigo, kiam ili mem estis suverenaj en tiu teritorio kie ili ankoraŭ loĝas. Ili estas do malsamaj al minoritatoj enmigrintaj, kiuj gardas eble memorojn pri aliaj hejmlandoj. La hejmlando de indiĝena popolo estas ankoraŭ tie, kie ĝi loĝas, sed la regantaj leĝoj kaj institucioj kaj lingvoj kaj kutimoj kaj moroj estas fremdaj, la fruktoj de koloniiga procezo kiu daŭris jardekojn aŭ jarcentojn.

Tiu versio de la koncepto "indiĝeno" venas el la granda koloniiga projekto de Eŭropo, kaj precipe en la t.n. Nova Mondo, la landoj de Ameriko kaj Pacifiko, la koncepto hejmiĝis kaj fariĝis parto de la memdifino de multaj popoloj. Kompreneble tiuj popoloj estas tre diversaj inter si, kaj nur la historio de koloniigo

pravigas la uzadon de unu komuna vorto. En aliaj mondopartoj kiel Afriko kaj Azio, pli oftas aliaj konceptoj kiel “tribaj popoloj” aŭ “nomadoj”, kaj ofte ne estas tre klare, kie troviĝas la limo inter “indiĝenaj” popoloj kaj aliaj popolminoritatoj. En multaj regionoj okazis koloniigo fare de aliaj grandaj popoloj neeŭropaj, kiel la bantuaj popoloj en suda Afriko aŭ la hanaj popoloj en orienta Azio, kaj la etikedo “indiĝena” povas funkcii kiel politika rimedo por emfazi la apartecon de la etnaj minoritatoj kiuj trovas sin jam delonge sub tia regado.

El tiu priskribo vi jam komprenos, ke ĝenerale ĉio, kion oni diras pri minoritataj rajtoj, aplikiĝas interalie al indiĝenaj popoloj. Same kiel aliaj minoritatoj, ili ofte suferas diskriminacion kaj antaŭjuĝojn, ekonomie kaj sane kaj eduke ili fartas multe malpli bone ol la socia averaĝo, ktp. Movadoj por homaj rajtoj kaj socia egaleco inkluzivas indiĝenojn inter siaj celgrupoj, kaj okazas, ke indiĝenoj estas eĉ la gvidantoj de tiaj movadoj. Tiel do, se temas pri indiĝenaj lingvoj, oni facile venus al la ideo, ke taŭgas la samaj konceptoj kaj metodoj por flegi ilin, kiel por minoritataj lingvoj ĝenerale.

Tiel estis, en tutmonda skalo, ĝis la sesdekaj jaroj. En la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, en la Paktoj pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj kaj pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, oni ne trovas apartajn menciojn pri indiĝenaj popoloj. Tamen, tra la sepdekaj jaroj, diversaj movadoj por indiĝenaj politikaj rajtoj komencis aperi kaj plifortiĝi, kaj en 1982 la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN fondis laborgrupon por pristudi la specialajn situaciojn kaj bezonojn de indiĝenaj popoloj. En 1989 la Internacia Labor-Oficejo, ILO, fariĝis la unua branĉo de UN kiu aprobis formalan traktaton kun novaj normoj sur tiu kampo, la t.n. Konvencio 169, kiu formulis interalie jenan principon: ke indiĝenaj popoloj “rajtas decidi pri siaj propraj prioritatoj por la procezo de disvolviĝo, tiel kiel ĝi tuŝas iliajn vivojn, kredojn, instituciojn kaj spiritan bonfarton kaj la terojn, kiujn ili okupas aŭ alimaniere utiligas, kaj regi la plenumigon, tiom kiom eble, de sia propra ekonomia, socia kaj kultura disvolviĝo.”

Troviĝas tie du gravaj konceptoj. Unu estas la ideo, ke por indiĝenaj popoloj la vojo por "disvolviĝo," t.e. por socia evoluo kaj progreso, povas esti malsama al tiu de la ĝenerala socio – kaj ke nur tiuj popoloj mem povas trafe difini kaj direkti ĝin. La alia estas la emfazo pri la rilato al "la teroj, kiujn ili okupas aŭ alimaniere utiligas". Se oni devus elekti unu trajton, kiu universale karakterizas indiĝenajn popolojn, estus tiu ĉi tre forta kaj multtavola rilato kun iu parto de la tero en ĝia tuteco, kun ĉiuj aliaj bestoj kaj plantoj kaj insektoj kiuj loĝas tie, kune kun la akvoj kaj rokoj kaj ventoj kaj tiel plu. "Okupi" kaj "utiligi" estas fakte tro limigitaj konceptoj, aŭ tro homcentraj. Laŭ tipa indiĝena pensmaniero, estas la tero kiu bonvole gastigas la homojn, ne la homoj kiuj okupas ĝin. Tiu gastigado estas ne nur fizika, sed spirita kaj morala; la tero instruas, kiel vivi, kiel fariĝi plenkreska persono, kiel konduti kun aliaj. Kaj ĉar ĉiu parto de la tero estas unika, same unika estas la kulturo, kiu evoluas en intima rilato kun ĝi. La diferencoj inter indiĝenaj popoloj ne estas arbitraj, sed konformaj al la diverseco de la tero mem.

## La rilato inter lingvo kaj tero

Konstatinte tion, ni povas eble pli klare vidi, kio ofte mankas en pensado pri minoritataj rajtoj, laŭ indiĝena vidpunkto. Tiuj rajtoj ĝenerale rilatas nur al homaj aferoj. Se temas ekzemple pri lingvo: Lingvo estas konsiderata kiel integra parto de nia identeco, rimedo por disvolvi niajn rilatojn kun aliaj, esprimilo de niaj sentoj kaj kredoj, kaj kanalo por nia partopreno en kulturo kaj socio. Sed ĉiam temas pri la homa flanko: homa identeco, homaj rilatoj, homaj sentoj, homa socio. Tute mankas tie iu eksplicita konsidero pri la rilato inter la homo kaj la tero, aŭ kiel oni foje diras, la homo kaj la pli-ol-homa mondo. Kaj por indiĝena kulturo tiu rilato estas la baza, la fundamento de ĉio alia.

Iusence estas tre evidente, ke lingvo rilatas al nehomaj aferoj, ĉar ni konstante parolas pri la mondo ĉirkaŭ ni, kaj nian lingvon tratrempas metaforoj bazitaj sur niaj konkretaj fizikaj spertoj en

tiu mondo. Sed en la okcidenta penstradicio ni alkutimiĝis al la ideo, precipe en la lastaj cent jaroj, ke la rilato inter lingvo kaj mondo estas pure arbitra, kaj ke ĉefe gravas la internaj rilatoj inter la arbitraj lingvosignoj. Alivorte, ni lokas la signifojn de la vortoj en la homa kulturo, kiu uzas la lingvon, kaj ne precipe en la mondo kiu gastigas tiun kulturon. Verŝajne tia koncepto pri lingvo eblas nur en la kunteksto de urba kulturo, ke oni estas ĉirkaŭita de homaj simboloj, homaj imagoj; se tia estas la ĉiutaga vivo, estas tute kompreneble, ke tiuj spertoj influas la pensadon ankaŭ pri temoj pli abstraktaj.

Sed eblas pensi pri la rilato mondo-lingvo en tute alia maniero. Jen mi citas por vi parton de dialogo inter du kanadanoj, unu indiĝena, unu neindiĝena. Ili parolas pri la inuita teritorio Nunavut, en la nordorienta, arkta parto de Kanado, okcidente de Groenlando.

Unue parolas Derek Rasmussen, neindiĝeno, kiu tamen pasigis jarojn en Nunavut kaj estas engaĝita en la streboj por krei aŭtente inuitan lernejan sistemon. Mi diru parenteze, ke kvankam mi ĵus uzis la Akademian terminon "inuita," tio efektive estas formita el la pluralo, *inuit*, de la vorto *inuk*, homo. Same kiel ni formas la vortojn por aliaj lingvoj el la singularo – la francan parolas franco, la germanan germano, la finnan finno – mi preferas paroli pri la inuka lingvo.

"En Nunavut," diras Derek, "la tero parolas inuke."

> Mi celas, ke la tero (kaj la maro) evoluigis lingvon por komuniki kun (kaj per) la homoj, nome indiĝenan lingvon kiu nature "kreskis" en tiu regiono tra miloj da jaroj da interagoj inter la klimato kaj la estaĵoj homaj, plantaj, bestaj. Por la inukoj, tio povas aspekti kiel evidentaĵo, sed ĝi ne estas evidenta por la plejparto de la homoj kiel mi kiuj pasigis sian infanaĝon en la Sudo sen iu intima aŭ nepra interrilato kun la nehoma medio. Anstataŭe, ni sudanoj kutime akceptas kiel fakton ke la lingvo estas ellokigita fenomeno kiu disvolviĝas izolite en la cerboj de la homoj sed iu ajn necesa influo de ties ĉirkaŭaĵo.

> Kiaj primediaj leksiko kaj gramatiko elvenis el la indiĝena interrilato kun la tero? Mi memoras ke, kiam mi unue eklaboris kun NTI [la inuka organizo kiu administras la formalan interkonsenton pri termastrumado en Nunavut], la tiama ĉefdirektoro, Hagar Idlout-Sudlovenick, rakontis al mi pri inuklingva programo kun la pliaĝuloj de ŝia hejmvilaĝo, Pond Inlet. La unikaĵo en tiu programo estis tio, ke la pliaĝuloj konsentis instrui la inukan ekstere sur la tereno – ne en klasĉambro. La pliaĝuloj el Pond diris ke tro multe el la inukaj terminoj estis malaperantaj, kaj ke la sola maniero revivigi la koncernan vortostokon estis per lernado sur la tero, kie troviĝis la nomitaj aferoj. (Rasmussen kaj Akulukjuk 279-280)

Al Derek respondas lia amiko Tommy Akulukjuk, juna inuko el Pangnirtung:

> Mi kredas ke unu el la grandaj diferencoj inter pli junaj kaj pli maljunaj inukoj nuntempe estas tio ke oni instruis al ni, la pli juna generacio, ke a inuka bezonas striktajn gvidliniojn aŭ regulojn por sekvi. Ni fariĝis pli dependaj de libroj, kaj, kiel diri, kiam oni enlibrigas la inukan, oni forprenas la veran esencon de la lingvo. Imagu: mia patro ĉion lernis aŭskultante sian lingvon, spertante ĝin; neniam oni diris al li, ke la lingvo devus esti tia aŭ tia. Kaj jen mi, nur unu generacion poste, intense instruita per libroj kaj didaktiko pri la funkciado de mia lingvo. En la rigardo de sudanoj, mi supozeble estas pli bone edukita kaj scias pli ĉar mi ricevis instruon kiun ili konsideras solida, sed se inuko komparas mian lingvon kun tiu de mia patro, mi havas la nivelon de infano. La lerneja sistemo, ŝajne, per tio ke ĝi forprenas la infanojn de la gepatroj dum granda parto de la tago por instrui la inukan, pli kontribuis al la diserigo de la lingvo en fiksajn frazojn kaj babiladon anstataŭ fari ĝin la instruanto de sensoj kaj spertoj kiel ĉe la vera lingvo. (Jen kion konstatis la pliaĝuloj de Pond Inlet: ke perdiĝas la vera esenco de la lingvo.) La inuka, por mi, estas maniero senti la funkciadon de la naturo; per la inuka mi sentas la veteron, la varman sunon, kaj tiel priskribas ĝin. (Rasmussen and Akulukjuk 282)

"Instruanto de sensoj kaj spertoj" – ĉu ne bela priskribo de lingvo, kiun oni rigardas kvazaŭ spiro aŭ kanto de la tero, ne-

disigebla de nia rilato kun tiu tero. Ĉar fakte estas la tero, kiu estas la ĉefa instruanto, kaj la lingvo estas kiel helpinstruanto, kiu rediras ĝiajn instruojn. Infanoj, kaj ankaŭ homoj jam kreskintaj, lernas per la aŭskultado de ambaŭ, per la dialogo inter ili. Spertoj iĝas pli veraj kaj signifoplenaj, kiam ili ricevas priskribon per lingvaj rimedoj, kaj vortoj iĝas pli veraj kaj signifoplenaj, kiam ili estas ligitaj al konkretaj spertoj. Kaj tiel estas ne nur je la nivelo de vortoj, sed ankaŭ je la nivelo de konceptoj, de kernaj kulturaj komprenoj, de la komuna rakontaro de la komunumo; ĉio ekzistas en dialogo kun la tero, kiun ebligas kaj peras la lingvo.

## La kultura sciosistemo

Necesas klarigi unu plian gravan diferencon inter la funkciado de indiĝena lingvo kaj la funkciado de la tiel nomataj modernaj lingvoj, kiujn ni ĉiuj parolas kaj kiuj reprezentas por ni kvazaŭ la paradigmon de lingva funkciado. (Mi diru parenteze, ke ekzistas aliaj tre gravaj diferencoj, sed mi ne traktos ilin ĉi-okaze.) En la modernaj lingvoj, almenaŭ se temas pri la norma skriba lingvo, kiel oni uzas ĝin en la amaskomunikiloj kaj lernejoj, ni alkutimiĝis al tre eksplicita maniero paroli – tio, kion socilingvistoj nomas "malmult-kunteksta" komunikado. Tio necesas ĉar ni ofte komunikas kun homoj kun kiuj ni ne kunhavas personajn spertojn, kaj pri kies vivoj ni eventuale havas malmultan aŭ nenian komprenon. Sed tio ne estas la kutima situacio en indiĝena lingvo. Historie, almenaŭ, oni parolis la lingvon precipe kun parencoj kaj kunloĝantoj, kun kiuj oni havis vastan komunan spertaron; kaj eĉ se tiu situacio ne plu estas tiel universala, pro la diversaj premoj de koloniigo kaj modernigo, ni povas daŭre preni ĝin kiel bazan modelon. Tio signifas, unuflanke, ke multaj vortoj kaj frazoj kaj rakontoj en la lingvo elvokas tre specifajn okazaĵojn, konatajn al la kunparolantoj, kaj tial oni ofte aŭdas multe da ridoj; mi plurfoje aŭdis indiĝenojn komenti, ke ili simple ne kapablas ridi tiel multe en la angla. Aliflanke, tio signifas ankaŭ, ke en multaj situacioj oni uzas la lingvon nur tre ŝpareme,

ĉar la kunteksto komunikas pli trafe kaj komplete. Jen tio, kion la socilingvistoj nomas "mult-kunteksta" komunikado.

Tiu rilato inter la lingvo kaj la kunteksto estas grava por tio, kion ni povus nomi la kultura sciosistemo. En la moderna okcidento, ni ofte pensas pri "scio" kiel io teksta, faka priskribo laŭ la normoj de iu scienco. Kompreneble la scienco mem dependas de la laboro de homoj ne nur kun tekstoj sed kun instrumentoj kaj metodoj por observi la mondon kaj registri kaj analizi tiujn observojn. Sed ĉar la publikigo de malkovroj estas tiel esenca aspekto de la scienco, kaj ĉar tio sekvas la normojn de malmult-kunteksta komunikado, la publikaĵoj iusence donas adekvatan resumon de la sciosistemo.

En indiĝenaj lingvoj oni same registras multajn observojn pri la mondo, tra generacioj kaj eĉ tra jarcentoj kaj jarmiloj. Sed la sciosistemo ne funkcias same kiel la okcidenta scienco, kun eksplicitaj priskriboj de ĉio laŭ iu normigita metodologio. La registroj en la lingvo funkcias kunlige kun, kaj dialoge kun, la ĉiutaga fizika interrilatado kun la mondo. Tio estas, kion vidis la pliaĝuloj de Pond Inlet, kiam ili insistis instrui la lingvon ekstere, sur la tereno. La lingvo helpas gvidi la atenton kaj interpretadon de la homoj, sed ĝi ne anstataŭas la teron mem kiel instruisto. Lingvoj, homoj, kaj la pli-ol-homa mondo kune konsistigas la sciosistemon. Kaj fakte la ĉefa inteligento, inter tiuj tri kunrolantoj, estas la lasta, konsistanta el sennombraj interdependaj inteligentoj – kion antropologo Eduardo Kohn, kadre de siaj esploroj en la amazonia regiono de Ekvadoro, nomas "la reto de vivantaj pensoj". Jen ekzemple alia kanada indiĝena pensulo, la niŝnaba verkistino Leanne Simpson:

> La Cervo-klano, aŭ nacio… havas povon, influon, agkapablon. Ili havas scion kiu estas nun kunhavata kaj kodigita en la etikoj kaj praktikoj de cervoĉasado por la niŝnaboj. La niŝnaboj antaŭsupozas, ke la cervoj havas lingvon, penson, kaj spiriton-intelekton, kaj tiu intelekto estas malsama al la intelekto de la niŝnaboj pro tio ke ili vivas en la mondo en maniero malsama al tiu de la niŝnaboj, kaj tial ili signifas malsame.

Rimarku, kiel la niŝnaba scio pri cervoj estas integrita kun la ĉasado de cervoj. Tio ne estas simple scio, kiel kapti cervon. Tio estas scio pri tio, kiel cervoj kondutas, kion ili manĝas, kion ili ŝatas kaj timas, kiel ili prizorgas siajn idojn, kiel ili reagas al diversaj veteroj kaj sezonoj, ktp ktp. Temas fakte pri proksima, intima kunvivado kun cervoj, kiuj saĝe kaj lerte moviĝas en la sama teritorio kiel la niŝnaboj kaj konas ĝin siamaniere. La scioj de la sistemo homoj-plus-lingvo-plus-cervoj estas pli ampleksaj, pli inteligentaj, ol la scioj nur de la sistemoj homoj aŭ homoj-plus-lingvo. Kaj tio estas nur unu ekzemplo el senfina nombro.

Indiĝenaj lingvoj estas do perantoj de sciorilatoj inter homoj kaj la naturaj sistemoj, kun kiuj ili vivas. Kaj tiuj sciorilatoj, aŭ sciosistemoj, ekkaptis la intereson de sciencistoj sur diversaj kampoj jam antaŭlonge. La koncepto de "tradicia ekologia scio," divastiĝinta esprimo por indiĝena scio pri la naturo, komencis gajni politikan terenon en la 80-aj jaroj, tiel ke la fama Raporto Brundtland de la Monda Komisiono pri Naturo kaj Evoluigo jam emfazas ĝian potencialan kontribuon al la daŭripova mastrumado de arbaroj, montaj regionoj kaj dezertoj. Intertempe ĝi fariĝis tre konata koncepto sur multaj subkampoj de ekologia mastrumado. Kiel multaj aliaj temoj indiĝenaj, tamen, ĝi estas koncepto pli ampleksa kaj kompleksa, ol oni ofte agnoskas. Antaŭ ol reveni al la lingva demando, ni rigardu ĝin pli atente.

Laŭ la kanada politika sciencisto Nicolas Houde, ekzistas ses aspektoj de tradicia ekologia scio:

(1) specifaj observoj, klasifikoj kaj konoj pri longdaŭraj evoluoj en la naturo;

(2) sistemoj de ekologia mastrumado;

(3) scioj pri tradicia utiligo de la tero, ekzemple la kolektado de plantoj;

(4) etiko kaj valoroj;

(5) kultura identeco; kaj

(6) kosmologio.

Precipe la tri lastaj estas malfacile kompreneblaj el neindiĝena vidpunkto. Etiko, identeco kaj kosmologio estas aspektoj de la tuta kultura sistemo; ofte oni transdonas la komprenon de ili kadre de tradiciaj rakontoj, tre malproksimaj de la sciencaj kaj administraj kadroj, en kiuj oni laboras pri ekologia mastrumado. Ne estas surprize, do, ke la literaturo pri tradicia ekologia scio, same kiel la juraj kaj administraj kadroj pri ĝia utiligo por praktikaj mastrumaj celoj, preskaŭ plene neglektas tiujn aspektojn kaj fokusiĝas al la tri unuaj punktoj en la listo de Houde. Tiuj estas ja pli facile redoneblaj kaj uzeblaj en la regantaj lingvoj kaj konceptokadroj de la ŝtato.

Estas do konsilinde iom singarde rilati al mencioj pri tradicia ekologia scio en la traktadoj de la registaroj – tio ne nepre signifas la plenan manĝoferton, kiel ni diras en la angla. Tamen, mi emfazis la koncepton, ĉar ĝi estas ŝlosila por la ĉefa temo de mia hodiaŭa prelego: la rilato inter indiĝenaj lingvoj kaj la streboj al daŭripovo.

## Daŭripovo kaj indiĝena scio

La unua granda konferenco de UN pri la protektado de la naturo okazis en 1972, antaŭ ol plene ekruliĝis la ondo de konsciiĝo pri indiĝenaj rajtoj. La dua okazis en Rio-de-Janejro en 1992, kaj tie la rilato inter biologia kaj kultura diverseco jam ŝvebis en la aero. Unu el la ĉefaj atingoj de Rio estis la subskribado de la Konvencio pri Biologia Diverseco, unu el la unuaj internaciaj traktatoj pri ekologia mastrumado. Grandparte, kompreneble, la Konvencio baziĝas sur la metodoj kaj konstatoj de la okcidenta naturscienco, kaj antaŭsupozas unuecajn naciajn registarojn kiuj faras kaj kontrolas la leĝojn sur sia tuta teritorio. Tamen, en Artikolo 8, la ŝlosila artikolo kiu traktas la konservadon de naturaj sistemoj kaj naturaj lokoj, oni trovas jenan subartikolon 8(j):

> [La subskribintaj registaroj] konforme al sia nacia leĝaro, respektu, protektu kaj subtenu sciojn, novigojn kaj praktikojn de indiĝenaj kaj lokaj komunumoj, kiuj enkorpigas tradiciajn viv-

> stilojn ligitajn al la konservado kaj daŭripova utiligo de biologia diverseco, kaj antaŭenigu ilian pli vastan aplikadon kun la aprobo kaj engaĝiĝo de la tenantoj de tiaj scioj, novigoj kaj praktikoj kaj kuraĝigu la egalecan kunhavigon de la gajnoj kiuj ekestas el tiaj scioj, novigoj kaj praktikoj.

Oni devas konfesi, ke la lingvaĵo ne estas aparte glata aŭ inspira! Kaj tamen la principo estas gravega. Unuafoje oni klare lokas indiĝenan ekologian scion en la kadro de naturprotekta politiko, kaj substrekas ke la indiĝenaj popoloj devas mem havi gvidan rolon pri la utiligo de tiu scio.

Laŭ la Konvencio, la subskribintaj registaroj – temas nun pri 194, do granda plimulto de la landoj de la mondo – devas ellabori naciajn strategiajn planojn kaj regule raporti pri progreso. En la nuna jardeko, tiun procezon gvidas la Celoj de Aichi, akceptitaj ĉe interregistara konferenco en Japanio en 2010. Celo 18 fokusiĝas al tradicia ekologia scio; laŭ ĝi, indiĝenaj komunumoj estu integritaj je ĉiuj niveloj en la protektado de biologia diverseco. En la raportoj dum tiu periodo, la registaroj devas interalie raporti pri la stato de la indiĝenaj lingvoj en sia lando, kiel unu el la indikiloj de progreso.

Nu, jam delonge evidentiĝis, ke indiĝenaj lingvoj estas minacataj de la samaj procezoj, kiuj minacas naturajn sistemojn. La senbrida ekspluatado de la tero montriĝis esti la alia flanko de la senbrida ekspluatado de homoj sub koloniismo: esence sama pensmaniero, sama dinamiko, kaj samaj rezultoj. Indiĝenaj popoloj estas kompreneble trafitaj ambaŭmaniere, ĉar ju pli damaĝitaj aŭ privatigitaj estas iliaj teroj, des pli malfacile ili plu disvolvas siajn proprajn kulturojn kaj lingvojn, kiuj jam estis la celo de sistema diskriminacio dum jardekoj aŭ jarcentoj. Ne estas surprize, do, ke granda plimulto de la indiĝenaj lingvoj de la mondo perdadas parolantojn, kaj granda nombro jam troviĝas rande de malapero.

Samtempe plimultiĝas la indikoj pri la severeco de la krizo de biologia diverseco. La lasta granda raporto pri tio, la t.n. Mon-

da Pritakso pri Biodiverseco kaj Ekosistemaj Servoj, aperis komence de majo 2019. Laŭ ĝi, unu miliono da specioj estas minacataj de malapero. Inter multaj aliaj temoj, la raporto donas specialan atenton al indiĝenaj popoloj, konfirmante, ke la perdo de biologia diverseco aparte severe trafos ilin, sed aliflanke, la regionoj kie ili ludas aktivan rolon en ekologia mastrumado estas iom pli rezistaj al la detruaj tendencoj. Tamen nur iom pli – estas klare, ke la povo de indiĝenaj komunumoj ankoraŭ ne estas sufiĉe granda por plene protekti iliajn teritoriojn, kiuj kune konsistigas, laŭ la raporto, almenaŭ unu kvaronon de la tuta terareo tutmonde.

La Monda Pritakso alvokas por "transformaj ŝanĝoj," per kio ĝi celas "fundamentan, tutsisteman reorganizon trans teknologiajn, ekonomiajn kaj sociajn faktorojn, inkluzive de paradigmoj, celoj kaj valoroj," laŭ la prezidanto de la respondeca komisiono IPBES, Robert Watson. Nu, tiu estas klarigo kiu ne igas la ideon multe pli klara, sed ni povas almenaŭ kapti la kernan punkton, ke ne temas nur pri etaj adaptoj de la ĝisnunaj paŝoj sub la Konvencio pri Biologia Diverseco. Se ni volas protekti la diversecon, kaj do fakte certigi nian propran pluvivadon – interalie ĉar ni riskas detrui la agrikulturan bazon de la moderna civilizacio – ni devas reorienti niajn sociojn laŭ aliaj konceptoj, ol tiuj kiuj regis en la lastaj kelkcent jaroj.

## Proteki lingvojn, protekti la teron

En la rondoj de Unuiĝintaj Nacioj, kaj pli vaste, regas ĝenerala malatento al la rolo de lingvoj en tiu reorientiĝo. Por diversaj indiĝenaj pensuloj, tio estas memevidenta, sed por la homoj, kiuj edukiĝis en la okcidenta, aŭ pli vaste la moderna industria pensokadro, ĝi estas nur pene ekperceptebla.

Mi kovas tamen iom da espero, ke en la Esperanto-movado ni povos pli facile adapti nian pensmanieron al tiu konstato, kaj pli sisteme alianciĝi kun indiĝenaj kaj aliaj organizoj por ĝin dis-

vastigi. La kerna konkludo por mi estas tio, ke movado por *lingva* diverseco – kiel nuntempe ni ĝenerale konsideras nin – devas esti samtempe movado por protekti la diversecon de la tero. Se 90% de la lingvoj de la mondo pruntas sian signifon kaj sian ekologian funkciadon el la rilatoj inter indiĝenaj popoloj kaj la naturo, la naturo mem devas esti en la fokuso de niaj konservadaj streboj.

Laŭ mia scio, Zamenhof ne esprimis sin rekte pri ekologiaj demandoj. Tamen en liaj verkoj oni retrovas lian insiston, ke "la doma vivo de la popoloj" estas io sankta kaj protektinda, kaj ke tiu protektado estas unu el la pozitivaj sekvoj de la ĝenerala enkonduko de Esperanto. En tio mi vidas embrian ekologian pensadon, ĉar la vorto *ekologio* mem signifas laŭvorte la "hejm-scienco" aŭ "scienco pri la doma vivo" (de la plantoj, la bestoj, ktp). Laŭ indiĝena perspektivo, la doma vivo de la popoloj *inkluzivas* aliajn popolojn ol la homaj. Estus bele, se esperantistoj komencus simile kompreni sian etikon kaj mision.

En ĉi tiu prelego mi povis doni nur kelkajn indikojn pri la profunda krizo, en kiun falas la monda civilizacio, pro tio ke homoj forgesis siajn amon kaj dankemon kaj devojn al la tero. Ŝanĝi tion estas *la* defio de la 21-a jarcento. Nek la indiĝenaj popoloj de la mondo, nek ni esperantistoj, kapablas solaj efektivigi tian transformon. Sed al la streboj por daŭripovo ni kune portas lingvan dimension, kiu devus esti integra al iu ajn tuteca ekologia vizio pri nia estonteco. Mondo, kie regas respekto, eĉ amo, por diverseco – kie indiĝenaj lingvoj povas pluvivi kaj disflori – estas mondo kie Esperanto trovos plenrajtan lokon.

# Referencoj


*Celoj de Aichi, Konvencio pri Biologia Diverseco*: *https://www.cbd.int/sp/*

Houde, Nicolas. "The six faces of traditional ecological knowledge: challenges and opportunities for Canadian co-management arrangements." *Ecology and Society* 12.2 (2007).

Kohn, Eduardo. *How Forests Think. Toward an Anthropology beyond the Human.* University of California Press, 2013.

*Konvencio 169, Internacia Labor-Organizo*: https://www.ilo.org/dyn/normlex/en/ f?p=NORMLEXPUB:12100:0::NO::P12100_ILO_CODE:C169

*Monda Pritakso de Biodiverseco kaj Ekosistemaj Servoj*: *https://www.ipbes.net/news/Media-Release-Global-Assessment*

Rasmussen, Derek; Akulukjuk Tommy. "'My Father Was Told to Talk to the Environment First before Anything Else': Arctic Environmental Education in the Language of the Land." *Fields of Green: Restorying Culture, Environment and Education*, redaktis Marcia McKenzie, Paul Hart, Heesoon Bai kaj Bob Jickling, Hampton Press, 2009, pp. 279-292

Simpson, Leanne Betasamosake. *As We Have Always Done: Indigenous Freedom through Radical Resistance.* University of Minnesota Press, 2017.

*Документально-научное издание*

Марк Феттес
**Не только доверие**
*На языке эсперанто*

Подписано в печать 29.07.2020. Формат 84x108/32.
Печать цифровая. Усл. печ. л. 4,2.
Тираж 50 экз. Тип. заказ 92869

Издательство «Импэто», Москва, 117593, Литовский б-р 13/12.
impeto@impeto.ru
www.lernolibro.ru

Отпечатано в типографии ООО "САМ ПОЛИГРАФИСТ"
г. Москва
Волгоградский проспект, 42, корп. 5